# Heleco

Pres-organo de:
Astura Esperanta Asocio

Numero 86 Junio 2011


# EKONOMIA KRIZO



# Heleco

Pres-organo de: Astura Esperanta Asocio

Numero 86 Junio 2011



**Astura Esperanta-Asocio**

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://uica.info/esperanto

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info


**Astura Esperanto-Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

| Enhavo . | Paĝo |
|---|---|
| ASTURA ESPERANTA ASOCIO.- Dumjara vivo de la E-rondo | 3-4 |
| 69a Hispana Kongreso de Esperanto | 5 |
| 95a Universala Kongreso de Esperanto | 6-7 |
| 18a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo | 8 |
| ECONOMIA KRIZO | 9 |
| CIKLAJ KRIZOJ – Kapitalismo estas krizo | 10-11 |
| La granda krizo de 1929 | 12-13 |
| La longdaŭra komfort-socio | 14-15 |
| Reagas la kapitalismo: NOVLIBERALISMO | 16-18 |
| Eksplodas la konstruad-bobelo | 19-22 |
| Karakteraĵoj de la nuna krizo | 23-24 |
| KION FARI? | 25-27 |
| Tio, kion mi lernis pri la tutmonda ekonomia krizo ekde la Internacia MonFonduso | 28-32 |
| Financaj krizoj kaj nenia instruo tirata | 33-37 |
| Demokratio kaj merkatoj en la Nova Tutmonda Ordo: Ĝenerala ekonomia krizo | 38-40 |
| La Rom-Katolika Eklezio elektis la riĉulojn | 41-42 |
| JOSE COMBLIN, Pioniro de la Teologio de Liberigo | 43-46 |
| Recenzo de verkoj pri la ekonomia krizo | 47-50 |
| Estas la Revolucio! | 51-52 |
| Kuirante kun Pilar | 53 |
| Dek reguloj por manipulado pere de amas-informiloj | 54-56 |
| Suferante kun rideto la pezon de la hipoteko | 57 |
| Trasuferante humure la ekonomian krizon | 58 |

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85



# Astura Esperanta Asocio

## DUMJARA VIVO DE LA E-RONDO

Dek unu monatojn post la apero de la antaŭa numero de nia revuo, speciale dediĉita al la Jakoba Vojo de pilgrimado al Kompostelo profitante ke 2010 estis Jakoba Jaro, jen la 86a numero de **HELECO** kies ĉefa temo estas la ekonomia krizo en kiu nuntempe dronas la tutmonda kapitalisma sistemo**.** La ellaborado de la revuo kaj la subtenado de la interret-paĝo de la E-Asocio estas inter la dumjara aktivado de nia esperantista rondo. Sed la ĉefa tasko de ĉiu esperantista grupo estas la instruado pri la Internacia Lingvo. Tiu rilate ĉiuj geesperantistoj, ĉefe tiuj de nia lando, scias kiel malcile estas en la nuna epoko varbi novajn gelernantojn –kaj eĉ konservi tiujn antaŭe varbitajn–. Oni povas diri ke tiu estas la plej grava problemo de nia E-Asocio. Dum la antaŭaj jaroj ne okazis E-kursoj en nia ejo, kaj nuntempe estas unu lernanto al kiu gvidas klason la Prezidanto de nia Asocio, Carlos E. Carleos Artime.



**Frontpaĝo de la antaŭa numero de nia revuo.**

Kaj temante pri la dumjara vivo de tiu Asocio ni devas mencii ke la 16an de novembro de 2010 forpasis nia samideano José Palacio Tuero. Li estis 101-jaraĝa, naskiĝinta en la jaro 1909, la saman jaron de la fondiĝo de **Astura Esperanta Asocio**. Li jam de sia junaĝo membris en tiu E-Asocio, kaj partoprenis en la rekuperiĝo de la E-movado en Gijón post la CivilMilito. Dum iom da tempo li apartenis al la komitato de la E-grupo de Gijón kaj ĝis sia forpaso li daŭre estis membro de **Astura Esperanta Asocio**. Kun lia morto **AEA** perdas sian plej antikvan membron kaj atestanton de la unua epoko de la esperantismo en Gijón kaj Asturio.


**José Palacio Tuero**

Al liaj familianoj ni kondolencas pro tiu perdo kaj dankas al ili pro la donaco de lia esperantista biblioteko al nia E-Asocio.

Eĉ se modestece, en la pasinta jaro, 2010, ni festis la Zamenhofan Tagon. Ĉi foje la geesperantistoj de Avilés kaj Gijón kunvenis en ĉi lasta urbo. En la sekva paĝo videblas fotoraporto de la tiutaga bankedo de la gasamideanoj, okazinta en Restoracio **"Parrilla Muñó".**

La 8an de aprilo de la nuna jaro okazis la ĉi-jara ordinara asembleo de la membraro de **Astura Esperanta Asocio**. Oni traktis en ĝi la kutiman temaron de tiutipaj asembleoj. Post la legado de la akto de la antaŭa asembleo kaj de informo pri la ekonomia situacio de la Asocio, oni ekzamenis la aktivadon de la an-taŭa jara periodo kaj oni pristudis la farendajn taskojn por la sekva jaro. Fine, la Prezidanto de la Asocio, Carlos E. Carleos informis pri la translokiĝo de la ejo de nia Asocio. Okazas ke la **Katedro pri Universitata Disvastigo**, en kiu estas enkadrigita nia esperantista asocio, devas cedi ĝian ĝisnunan domon al la urba administracio kaj translokiĝi al la universitata kampuso de Vieskes. Do, kelkaj el la komponaĵoj de tiu institucio, inter ili nia **Astura Esperanta Asocio**, devas efektivigi jam tiun translokiĝon. Tiurilate ni jam pakis ĉiujn niajn havaĵojn (libroj, revuoj, arkivo…) por esti portataj kun la koncerna meblaro al la menciita Kampuso. Kiam nia asembleo estis okazanta, kaj kiam oni redaktis ĉi tiun informon, ankoraŭ ne estis efektivigita la transportadon de la materialo kaj oni atendis ke oni faros tion baldaŭ poste.



La esperantista festo de la jaro 2010 okazis en Gijón la 19an de decembro. La bankedo, al kiu rilatas ĉi fotoj, okazis en restoracio **“Parrilla Muñó”**

Laŭ la informo de la Prezidanto, la nova ejo destinita al ni en la Vieskes-Kampuso ne estas tiel ampleksa kiel tiu kiun ni ĝuis ĝis nun en la urba ejo, sed por la klasoj, asembleoj k.s. ni povos disponi tie je aparta salono. Alie, eblas ke la proksimeco al la gestudentaj centroj de tiu Kampuso ebligus altiri novajn geesperantistojn. Por ilustri la manieron alveni al la nova loko li provizis al la planon de la Kampuso kiun ni prezentas sube.




**La kampuso de Vieskes konsistas el:**

**1) La Laboral = Fakultato pri Komercado, Turismo kaj Merkatiko.**

**2) La Escuela Politécnica de Ingeniería de Ŝiŝon' (EPIG). Siavice, la EPIG ampleksas je kvin konstruaĵoj:**

- **a) la ĉefa konstruaĵo, kun formo dent-rada (maldekstre sur bildo);**
- **b) la longa kaj mallarĝa «edificio departamental oeste»;**
- **c) Aulario Norte (tie estas nia nova sidejo!);**
- **d) Aulario Sur (la ĉambraroj formas ion pli ol duoncirklo, meze);**
- **e) «edificio departamental este».**

**Estas pluraj linioj de aŭtobusoj irantaj al kampuso. Tra la kampuso pasas la linioj 2, 4 kaj 18. Proksime de la kampuso haltas la linioj 1 kaj 26**

# 69a Hispana Kongreso de Esperanto





Kompostelo, de 2a ĝis la 5a de julio - 2010

Malgraŭ la senhelpo de HEF al la LKK, la manko da informoj en la paĝaro, la pluvo de la unua tago, la amaso da pilgrimantoj en la urbo, la senflaga kongresejo, kelkaj el la prelegoj en galega lingvo, la longa nokta promenado tra la urbo por atingi trinkejon por preskaŭ 20 gekongresanoj, la manko de prelego de A. Valén… malgraŭ ĉi-tio... estis por mi unu el la plej bonaj hispanaj kongresoj kiujn mi partoprenis. Dankon al LKK kaj al Lourenzo kiel Prezidanto.

La kongresejo estis bela salono kaj la afiŝoj anoncante nian kongreson estis gluitaj en diversaj lokoj de Santiago… eĉ en la enir-pordo de la katedralo. Ángel faris belegan kaj profesian desegnon.

Ni kunvenis pli ol 50 esperantistoj, multaj el ili junaj ekstremaduraj gelernatoj de Kani, kaj ankaŭ eksterlandanoj, germanaj geedzoj kiuj antaŭ la kongreso faris la jakoban anglan vojon. Elvira, kasistino de LKK, deĵoris en la kongres-budo kie disdonis, kune kun abundaj dokumentoj, belegan T-ĉemizon kaj dorsosakon.

En mia menso restos la inaŭgura prelego farita de Xesús Alonso Montero, galega historiisto pri Esperanto kvankam li ne parolas ĝin, la akcepto en la urbodomo kaj la fotografaĵo en la balkono sur la Placo de Obradoiro, la vizito al la domo-muzeo de Rosalía de Castro kun paroloj de la direktorino kiu dediĉis sian artikolon de "El Correo gallego" al Esperanto, la ekskurso tra la rio de Arosa kun abunda bankedo de mituloj kaj vino… la sama tago de la sukceso de Hispanio en la matĉo de la futbal-mond-ĉampioneco, la vizito al la urbo gvidata tre amuze, en galega lingvo, de Gualteria Muíños kiu la sekvontan tagon prelegis pri la "malbonaj" virinoj en la ikonografio de la katedralo. Kaj ankaŭ mi rememoros la viziton al la tegmentoj de la katedralo kiun mi faris kun aliaj kongresanoj jam private kaj post la kongreso.

Ni faris malgrandan pilgrimadon tra parto de la jakoba vojo ĝis la katedralo, kie ni povis vidi kiel funkcias la "botafumeiro" kaj kie okazis meso en Esperanto en unu el la ĉapeloj, feliĉe la movado rekaptis en Valencia al padre Ángel. Dankon al Félix kiu atingis la malfacilan permeson por la meso.

La kultura programo inkludis viziton al Museo de la Galega Popolo, komentita de Suso en Esperanto same kiel en la Pilgrima Muzeo. En la hispana oni montris la Muzeon pri Nuraj Sciencoj kaj ekspozicio pri pentraĵoj.

Mi sekvis kurseton pri la galega lingvo gvidata de Valentín kiu estis tre interesa por mi, dum aliaj kongresanoj partoprenis en kurso de Esperanto.

La LKK programis kunajn manĝojn en malmultekostaj kaj bonaj manĝejoj kiuj multe plaĉis al la gekongresanoj. Dum la adiaŭa vespero la gekongresanoj partoprenis en brando-brulado (queimada) en tre agrabla etoso kaj desorĉo en Esperanto.

La fermo, krom la vortoj de la Prezidanto de LKK, inkludis komentojn de partoprenantoj kiuj multe laŭdis la organizadon kaj gratulis al LKK pro la bonega laboro farita.

Mi pensas ke tiu-ĉi kongreso povas esti la komenco de nova modelo por fari niajn kongresojn pli allogaj por niaj amikoj ne-esperantistoj kiuj povas vojaĝi kun ni al Esperantaj eventoj.

Kaj por fini mi rakontas anekdoton: en la katedralo, en la tombejo de Sankta Jakobo, la plej sankta loko ekde mezepoko, estas komputil-ekrano plena de kandeloj kaj sube diras: *bv ne lasi monon; sendu SMS kun "Santiago01" al la numero 25000*… ĝis kie ni atingos?

Lupe Sanz Bueno

**95a Universala Kongreso de Esperanto**

**Havano, 17–24 julio 2010**




La **17**-an de julio, en Palacio de Convenciones, kiu estis la Kongresejo de la 95a U K, ni ricevis, post longa vico, la kongresajn dokumentojn. Dum la vojo al la giĉeto por ricevi ilin kaj dum la atendado, ni havis eblecon saluti plurajn amikojn kaj konatulojn de pasintaj UK, tio kio ĉiam estas tre agrabla parto de la internaciaj eventoj.

Tralegante la kongresan programon mi jam konstatis la multnombrajn kunsidojn kaj variajn programerojn, do, mi jam pensis ke kiel okazas en ĉiu UK oni ne povas ĉion partopreni. Venas la malfacila momento elekti.

Interesa estis la Movada Foiro kun multaj standoj el diversaj naciaj, regionaj kaj fakaj asocioj, kiujn oni starigis en la granda halo.

**La 18-an** okazis la Solena Inaŭguro de la Kongreso en Salono Zamenhof. Post bonvenigaj vortoj de la Prezidanto de UEA, S-ro Probal Dasgupta, kiuj prezentis la podianojn, sekvis bela kaj sentema paroladeto de la Prezidanto de LKK S-ro Hernández, invitante la gekongresanojn ĝui la Havanon kaj la kongreson.

Profitante la tagon de Nelson Mandela, S-ro Vergara legis tekston per  kiu Esperanto aliĝas al tiu speciala Tago, starigita de UN ĝuste por ĉiu 18-a de julio, kaj li promesis sendi mesaĝon al Nelson Mandela. Ankaŭ li havis gratulajn sentojn por la unuafojaj kongresanoj, kiuj ĉijare estis multnombraj, ĉar junaj latinamerikaj esperantistoj havis ĉifoje okazon ĝui la Universalan Kongreson. Sekve, S-ro McGill, Prezidanto de ILEI menciis la ILEI Kongreson okazinta en Matanzas, kaj S-ro Osmo Buller anoncis la novan estraron. Sekvis la salutoj de reprezentantoj de Landaj Asocioj, salutante nome de Hispanio, Rafaela Urueña, kiu, laŭ  propono de Vergara, saluti ĉiuj en la propra lingvo, per difinita frazo,  ŝi salutis kastil-lingve  per la jena frazo*: "el hombre es un ser sociable por naturaleza y libre de ir de un lugar a otro. El derecho de comunicación es un derecho natural y principio de solidaridad"*, de Francisco de Vitoria, Patro de la Internacia Juro.

Post diversaj kantoj de junulara kuba koruso finiĝis la inaŭguro.

Posttagmeze, Dro Tonkin, rektoro de Internacia Kongresa Universitato (IKU)  prezentis la prelegontojn, kiuj, skize, prezentis la temojn de iliaj prelegoj, kaj sekve li mem prelegis pri Shakespeare kaj la paralelismo inter li kaj Zamenhof kiel aŭtoro de Esperanto; ĉar ambaŭ transiris la limon de iliaj naskiĝurboj kaj fariĝis universalaj.

Je la 5-a mi ĉeestis al  prelego de S-ro Besada pri Kubo. Li elstarigis la personojn kiuj kontribuis al la nacia propra kuba kulturo. Félix Varela, Manuel Zequeira, Gertrudis Gómez de Avellaneda ktp, kiuj antaŭenigis la filozofion de la moderneco. Fine vespere, en la Teatro Mella okazis la Nacia arta vespero.

La **19-an**, kadre de la Kleriga Lundo okazis la Kunsido pri UN kaj Unesko prezidate de D-ro Tonkin. En la sino de IKU prelegoj, la vico estis por mi mem, kiu prelegis pri la "Protektado de la Medio kaj daŭropova evoluo", ĉar ĉijare mi decidis prelegi en IKU kaj en du sesioj de AIS.

Vespere, mi vidis la Kabaredon, bela spektaklo en kiu ni ĝuis diversajn dancojn kaj muzikojn tipe kubajn.



Prof. Tonkin, rektoro de I K U, (Internacia Kongresa Universitato) prezentas la prelegantinon.




La Prezidanto de UEA (maldekstre) dankante la salutvortojn de la Alta Protektanto de la UK, Vicministro pri Kulturo (dekstre).

Marde, mi partoprenis duontagan ekskurson tra la spuroj de Hemingway: *Finca Vigía*, tre interesa loko ĉirkaŭata de arboj kaj floroj, kie, klarigatan de spertulo, ni vidis ĉion. Oni konservas la domon kie loĝis tiu fama romanisto dum li vivis en Havano. Oni gardas ankaŭ lian ŝipon per kiu li tre ofte iris tra la maro. Kurioza afero estas ke la hispanoj komprenis dufoje la klarigojn de la spertulo: unue en hispana lingvo kaj poste la tradukon en esperanto. Sekve ni veturis al Monumento de Hemingway en **Cojimar**, al vendejo de famaj cigaroj Romeo y Julieta, kaj vizitis la faman trinkejon "Floridita" kie ni gustumis daikirion.

Vespere, ni ĉeestis al la akcepto kiel membroj de la Societo Zamenhof, en Hotelo Palco.

Merkrede, estas tradicia tago por ekskursoj en la UK. Mi ekskursis al fama strando **Varadero,** kiun vere ni ne vidis bone kaj ŝajnis al ni ne tre interesa ekskurso.

**La 22-an** okazis kunsido de la Esperanta Jura Asocio, kiun mi prezidis kaj kie mi disdonis al la ĉeestantaj juristoj, ekzemplerojn de nia revuo "Jura Tribuno Internacia", eldonita de José Mª Rodríguez, en Córdoba. En tiu kunsido oni devis elekti novan estraron kaj mi estis elektita Prezidanton.

Tiu sama tago, mi devis prelegi en la sino de AIS (Akademio pri Sciencoj de San Marino) pri la tutmonda klimatŝanĝo, temo, kiun mi konsideras tre aktuala kaj grava.

La akcepto de la Alta Protektanto de la UK, Vicministro pri Kulturo de Kubo, en la internacia salono de hotelo Riviera, kunigis multajn kongresanojn kiuj estis regalitaj per abunda bufedo, kaj fine, per specialaj autobusoj ni estis kondikitaj al Teatro Nacional kie okazis la "Canto general" de Neruda-Theodorakis. Per la samaj aŭtobusoj ni estis veturigitaj al niaj diversaj hoteloj.

La sekvantan tagon, denove mi prelegis en AIS, ĉifoje pri "La akvo fonto de vivo, fonto de konfliktoj", ankaŭ aktuala kaj grava problemo pri la manko de akvo en multaj partoj de nia planedo, kiu povas konduki al multnombraj konfliktoj kaj eĉ al militoj. Poste, mi ĉeestis al la amuza kvizo gvidate de Prof. Tonkin, ĉiam sprita.

Fine **la 24-an** estis la Solena Fermo. Post la kutimaj prezentadoj de la podianoj, multaj el ili membroj de la nova estraro, kaj informoj pri la premiitoj en la belartaj konkursoj, venis la transdono de la flago al la prezidantino de la estonta UK en Kopenhago. La Fermo finiĝis per la dankvortoj de la Prezidanto de LKK kaj donaco de floro al ĉiu membro de la Organiza Komitato, kiuj ĉifoje estis multnombraj.

Do, tre interesa kongreso, kie krom la ekstera varma temperaturo, ni ĝuis la ĝentilecon kaj afablecon de la kuba popolo. Kiel en pasintaj UK ni ĉiam gardos la rememorojn pri la babiladoj kun niaj gekonatulojn kaj, inter tiuj, kortuŝa estis por ni la fakto ke meksikiaj sinjorinoj parolis al ni pri nia forpasinta komuna amiko Julio Argüelles, tiel konata en la Universalaj Kongresoj pro sia esperantismo kaj gaja karaktero, revante tra la mondo pri Asturio.

M. Rafaela Urueña




**LA 18-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO OKAZIS EN COMA-RUGA, KATALUNIO (HISPANIO) 2-9-an de Oktobro 2010.**

**RESUME**

**Al ĝi aliĝis 133 gesamideanoj (el kiuj ĉeestis 130) el diversaj landoj de Eŭropo kaj eĉ de Suda Koreio. La evento okazis en la sama hotelo, kie estis gastigataj ĉiuj partoprenantoj. La etoso estis mirinda kaj ĉiam regis plej bona harmonio. Feliĉe la bona vetero nin akompanis kaj ĉiuj ĝuis la plezuron troviĝi apud la Mediteranea maro.**
**La inaŭguron prezidis la magistratano S-ro Raul Buira, Vicurbestro de El Vendrell (municipo al kiu apartenas Coma-Ruga). Ni havis la okazon lin danki pro la helpo, kiun ni ĉiam ricevis de la menciita magistrato. Siavice li deziris al ni grandan sukceson en nia agado, por ke almenaŭ estu lingva interkompreno en la mondo.**
**Prelegoj.**
**Nia S-ano Renato Corsetti prelegis laŭteme "Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas paroli ĝin eŭrope". Serioza analizo pri la lingvo problemo en la mondo kaj precipe en Afriko, kie oni devas meti plian intereson kaj agadon.**
**S-anino Anna Löwenstein, sub la temo "Romo antaŭ 2000 jaroj", transigis nin al tempo de la romia imperio, kvankam ŝi dediĉis sian lecionon precipe al la vivo, de mezaj kaj altaj sociaj klasoj tiutempaj.**
**S-ano Gian Carlo Fighire, alportis al ni la esencon de la japana kino, per la filmo: "Rashmon" Filmo pri la kvar veroj. Interesa filmo, kiu meritas gravan atenton por ĝin bone kompreni. Ankaŭ Gian Carlo parolis pri Kelkaj noveloj de Boccacio".**
**S-ano. Antoni Marco Botella, sub la temo Centjara datreveno de granda poeto Miguel Hernández, rememorigis al ni pasintajn malfeliĉojn okaze de la hispana intercivitana milito. Miguel poeto, kiu mortis en la karcero.**
**La geedzoj Michéle kaj Hubert, sub la titolo, Belgujo, lando de arto, scienco kaj folkloro", kronologie montris al ni la historion, monumentojn kaj sciencaĵojn de la nuna kaj antikva Belgujo.**
**Niaj korea s-ano An Jong, instruis nin pri la agado de la Esperanto–movado por la paco, al kiu aliĝas homoj, kiuj ne estas esperantistoj. Lia ĉarma edzino Ko Kyun Ja, entuziasmigis nin per koreaj dancoj kaj kantoj kaj multe pli ĉar ŝi surmetis elegantan tipan vestaĵon de la tradicia folkloro korea.**
**Fine s-ano Wolfang Guhenter, montris al ni, sian "Kioskon de Levante", almanako 400 paĝa, kiu konsistas el artikoloj verkitaj de diversaj aŭtoroj. Li insistis, ke UEA devos akcepti la ekologion kiel unu el ĝiaj taskoj.**
**La Premio Ada Sirkorska Fighiera estis aljuĝita al Rafaela Urueña. Iam prezidanto de Hispana E-Federacio kaj de la Esperanta Jura Asocio. Ŝi ĉiam tre agema en la enlanda movado kaj ofta preleganto en diversaj eventoj.**
**Ekskursoj. Ni vizitis Muzeon de Pau Casals, unu el la plej famaj violonĉelistoj de la mondo.**
**Plej grava ekskurso estis al Vendrell, kie ni malkovris strat-tabulon en la fasado de la urbodomo mem. Al tiu aranĝo ĉeestis s-ro Benet Jane i Palau, urbestro de El Vendrell, al kiu ni donacis platon, kiel rememoraĵon.**
**Ni ekskursis al Monaĥejo de Montserrat. Religia institucio plena je historio, kaj konsiderata kiel identigo de la kataluna popolo. Aparte menciinda estas la mirinda pejzaĝo kaj kampa panoramo rigardata ekde ĝia altano.**
**Kaj menciinda estas la nokto de la folkloro, en kiu muzika emsemblo ludas muzikon el Kubo, inter aliaj. Tiu folkloro estas akompanata de la fama (cremat) rumo bruligita kun aliaj specaĵoj. Ni okazigis du interkonajn vesperojn, en kiuj ne mankis ĉampano Esperanto kaj aliaj trinkaĵoj kaj frandaĵoj.**
**La Esperantan-kurson, gvidis Stano Marĉek, redaktoro de la UEA organo Esperanto. Estis libro-servo.**
**En la programero dediĉita al Esperanto, troviĝis la demando: Kio pri la Esperanta gramatiko, ĉu vi realigus modifojn? Varma debato. Iuj konsideris, ke ne estas bezonata studi la gramatikon por posedi Esperanton. La artikolo *la* ricevis gravajn batojn, ĉar iuj opiniis, ke ĝi ne estas ĝuste aplikata. Fine oni venis al konkludo, pri la nepra bezono respekti la Fundamenton, ĉar alimaniere Esperanto displektiĝos.**
**Restas multo por rakonti kaj fotoj, sed mankas spaco. Venu, kaj vidu ĝin persone.**

**Luis Serrano Pérez**

# EKONOMIA KRIZO




*Verkis:* **Faustino Castaño**

De antaŭ kelkaj jaroj la tutmonda ekonomio dronas en profunda krizo. Ĝia efiko manifestiĝas per la kresko de la senlaboreco en la industriaj landoj kaj la pliintensiĝo de la mizero en ampleksaj zonoj de la planedo. Oftas kaj abundas la teorioj kaj eksplikoj de la fakuloj de la ekonomika scienco intencante klarigi la kaŭzojn kaj originon de tiu grava fenomeno, same kiel ties amplekson, gravecon kaj eblan daŭron. Ne tiel estas ambicia la celo de la pritemado de tiu afero en ĉi tiu numero de nia revuo. Krome la afero estas nek klara nek facila: la ekonomikistoj mem malkonsentas inter si pri la kaŭzoj kaj ebla disvolviĝo de la krizo, sed ili ĉefe malkonsentas pri la aplikendaj disponoj cele super-pasi la krizon. La politikistoj kaj regantoj de la nacioj evidentigas similan perplekson kaj malkapablon solvi la problemon. Nia eseo pli estas laboro de historiisto ol de ekonomikisto. Fakte, ni detale trastudos la evoluon de la kapitalisma ekonomio ekde la granda krizo de la jaro 1929 ĝis nun.
Tamen, el nia teksto eblas eltiri instruon, aŭ ion kio pretendas esti instruo. Ne estas alia la celo de la historio: instrui pri pasintaj okazintaĵoj por inspiri estontajn procedojn. Kvankam la historio ne ripetiĝas, en la disvolviĝo de la eventoj estas inter ili ia rilato de kaŭzo kaj efiko. Ĝuste tiu rilato estas la instruo de la prihistoria raportado. Do, nia raporto enportas ian interpretadon de la historio, kaj neniu historia inter-pretado neŭtralas en mondo kaj en ekonomia sistemo kie la sociklasoj kontraŭ-batalas. Apriora teniĝo nia estas tiu ke la ekonomio devas esti serve de la homaro kaj ne male. Ĝuste tiu formulado trafe esprimas nian radikalan malakordon kun tiuj, ekonomikistoj aŭ ne, kiuj volas kaj celas la plukonservadon de la kapitalismo, tiu sistemo kiu kulpas je ĉiuj krizoj, kontraŭdiroj kaj putraĵoj de nia socio.
Sed la fakto ke ni rifuzas kaj kondamnas la nunan produktad-sistemon, kiu baziĝas sur la kapitala profito kaj ne sur la interesoj de la homaro kaj la plenumado de la homaj necesoj, ne signifas ke estas klara alternativo. Ni devas ne forgesi ke la ĝis nun praktikita alternativo de ŝtata kontrolo kaj gvidado de la ekonomio kaj la produktad-procezo evidentigis mankojn kaj misfunkciojn kiuj igis fiaski la eks-perimenton. Do ni troviĝas antaŭ problemo kiu, almenaŭ provizore kaj eventuale, ŝajnas sensolva.
Krome aperas problemoj novaj, kiel la iompostioma elĉerpiĝo de la energifontoj kaj la senĉesa fuŝiĝo de la naturmedio, kiuj efikas kontraŭ ĉiu produktad-sistemo, ĉu kapitalista aŭ alternativa.
Nu, temas pri problemaro kiun nia homa specio devas alfronti, kaj indas ke ni, kiuj zorgas pri alia problemo –la lingva– pritraktu per nia Esperanta solvo tiun gravan aferon kun la deziro iamaniere kontribui al ties solvado.
Kvankam nia priekonomia eseo dediĉas plian atenton al tio kio koncernas al nia lando, ni klopodas enkadrigi la studon en la funkciado de la tutmonda ekonomio kun kiu pli kaj pli interligiĝis, dum la lasta jarcento, la hispana ekonomio.




# CIKLAJ KRIZOJ

## Kapitalismo estas krizo



Tre ligata al la moderna industrio, la kapitalismo suferis multajn krizojn ekde la mezo de la 18a jarcento. Fakte, la kapitalismo havas tre konfliktan historion, plenan de krizoj, kaj tio ne estas hazardo sed rezulto de la naturo de la kapitalismo mem kaj de ties logika funkciado. Tiu ekonomia sistemo baziĝis sur la privata proprieto de la produktiloj (fabrikoj, maŝinoj) kaj la posedo de la kapitalo estas fonto de monprofito.

La baza kontraŭdiro de tiu sociekonomia sistemo estas tiu ke la motoro aŭ instigilo de ĝia funkciado estas la atingado de rento aŭ monprofito, kaj tamen, ĝuste tiu funkciado iompostiom fuŝas, damaĝas, la kondiĉojn kiuj ebligas la profit-kapablon aŭ rentecon.




La kapitalo-posedantoj faras investadon nur surbaze de la ebleco atingi konvenan profiton, kaj oni daŭre investas kaj plu produktadas surbaze de la renteco de antaŭaj operacioj. Tio signifas ke oni produktadas ne la necesajn varojn, kaj la produktado okazas ne kiam ĝi estas necesa por la socio. La orientilo por determini kiujn varojn produktadi kaj kiam oni faru la produktadon estas la ebleco de mongajno por la investanto(j).

La ĉefa mezur(il)o de la kapitalisma ekonomio estas tiu datumo, la profito-takso aŭ intereza normo, tio estas, la proporcio inter la kapitalo investita en la produktado kaj la atingita rentumo aŭ interezo. Tial ke tre gravas por la investantoj atingi tiun profito-takson, ilia intereso ĉiam estas pligrandigi ĝin kiel eble plej multe. Sed por atingi tion, la demarŝantoj de la interesoj de la kapitalo elpensas kaj efektivigas strategiojn kiuj, kiam ili estas efikaj, favoras iujn entreprenistojn domaĝe al aliaj produktantoj de la samaj varoj, sed tio nur dum la tempo-daŭro ĝis kiam la konkurantoj reagas kaj alprenas samajn disponojn. Tiu procezo de interkapitalisma konkurado damaĝas la bazojn de la produktad-procezo ĉar ĝi tendencas malpliigi la kapitalistan profiton. Tiu tendenco, eĉ se ne konscie, estas memmortiga por la kapitalismo ĉar igas ĝin detrui tion kio estas la ĉefa afero por tiu sistemo: la renteco-takson. Kaj tio efektiviĝas sufiĉe regule en la tempo laŭ malsamaj formoj. Notindas ke la rimedoj aplikitaj en la diversaj krizoj laŭlonge de pli ol du jarcentoj por restarigi la rentecon de la investado estis kvazaŭ flikaĵoj en la sistemo kiu siavice fine okazigas pluajn krizojn.

Tiu **Leĝo de la tendenca deklivo de la profito-takso**, kiel titolis tiun kontraŭdiron Karlo Markso, funkcias kiel objektiva realaĵo dependanta de la naturo mem de la kapitalismo. Sed kunestas kun ĝi ankaŭ subjektivaj faktoroj, dependantaj de la homa agado, kiel povas esti la klasbatalo. Plurfoje en la historio de la kapitalista sistemo la krizoj generis militojn, eĉ Mond-militojn, kaj rezulte de ĉi tiuj, revoluciaj aŭ kontraŭ-kapitalismaj fortoj starigis ekonomiajn alternativojn al la kapitalista sistemo. Ĉiukaze, krom kaj preter la objektiveco kaj neevitebleco de la krizoj, ĉiu krizo manifestiĝas laŭ sia aparta kaj specifa maniero kaj havas propran historion en kiu intervenas ankaŭ la subjektivaj faktoroj. Tio signifas ke kvankam la krizoj estas, pro la naturo de la sistemo, nepraj kaj neeviteblaj, siaj formoj kaj rezultoj estas, pro la komplekseco de la socio kaj ties multenombraj agantoj, neantaŭvideblaj.

Do, konstatinte ke la funkciado de la kapitalisma produktad-procezo senĉese korodas la propran bazon de sia profiteco okazigante periodajn krizojn, ni povas rimarki ke krom la normala periodo de ĉiu kriz-daŭro (prospera epoko kun ties sekva recesio) ekzistas ankaŭ la krizoj de longa skalo, kiuj ampleksas kompletajn sinsekvajn fazojn de ekonomiaj ekspansioj kaj recesioj. Ni volas montri ke ekde la granda krizo de la jaro 1929 ĝis la nuntempo okazis du el tiuj longskalaj krizoj, kaj en ĉi tiu studo, laŭlonge de la sekvaj paĝoj, ni pristudos sufiĉe detale tiujn du periodojn kiuj, eĉ se distingeblaj, havas inter ili sufiĉan interrilaton. La mezpunkto inter ambaŭ periodoj estis, kiel supozeble, la Dua Mondmilito.

Ni insistas pri tio ke la reale okazinta procezo ne estas mekanika, antaŭvidebla, tio estas, en la historio estas neniu determinismo, neniu aŭtomatismo (provu diveni aŭ antaŭvidi la titolan tekston de la ĵurnaloj eldonotaj post unu jaron, post dek jarojn…). Eĉ se ekzistas iaj nepraj kaj bone konataj elementoj, kiel la kapitalista tendenco subfosi la bazon de ĝia ekzistado, ne estas antaŭvidebla aŭ antaŭanoncebla la disvolviĝo kaj estonta evoluado de la sistemo. La longskalaj krizo-procezoj estas rezulto ne nur de la objektivaj kaj neŝanĝeblaj ecoj de la kapitalista dinamiko sed ankaŭ de faktoroj kaj fortoj kiuj ne dependas nur de la logiko de la kapitalo. Tiu logiko havas ian aŭtonomion kaj ĝia antaŭvidebla efiko tendencas al la ruinigo de la profito, sed tamen la tendenco estas influita ankaŭ de cirkonstancoj kaj agantoj de ĉiu historia momento, inter ili, kaj ĉefe, la klasbatalo.

Kiel plej multe, oni povas identigi la ekonomian rilaton inter la kulmino de iu ekspansia fazo de longskala periodo kaj la sekva falo de recesio. Sed eĉ tiukaze agadas ankaŭ aliaj influaj faktoroj, kiel la ĉiam-estanta kaj ĉie-estanta klasbatalo, kiuj ofte determinas la rezulton kaj pluan evoluon de la procezo. Sed oni konas neniun certan elementon aŭ meĥanismon kiu nepre okazigu la alvenon de ekspansia fazo kiu metu finon al la kriza recesio kadre la longskala periodo. Ĉiam, kiam okazis tiutipaj resaniĝoj de la kapitalista sistemo, tio estis rezulto de eksterekonomiaj cirkonstancoj kiel militoj, malkovro de de novaj riĉ-fontoj aŭ energifontoj, enkonduko de novaj teritorioj en la tutondan merkaton, politikaj aŭ sociaj ŝangoj…

Do ni povas denonci la senracion kaj la ekspluatadon de la kapitalista sistemo, sed nenio permesas anonci la neeviteblecon de la kolapso de la kapitalismo kaj la starigo de la socialismo. La socialismo, se ĝi alvenos, estos frukto de la konscia homa agado kaj la organizita batalado de multaj personoj, ne de iu aŭtomata meĥanismo de la ekonomia funkciado.



La socialismo, se ĝi alvenos, estos frukto de la konscia homa agado kaj la organizita batalado de multaj personoj.

# La granda krizo de 1929



La Granda Depresio estis iu grava tutmonda ekonomia krizo okazinta laŭlonge de la jardeko antaŭ la Dua Mondmilito. Ĝia komenciĝo situiĝis en Usono kaj etendiĝis poste al la ĉiuj industriigitaj landoj. Kiam finis la Unua Mondmilito, la industrio de Usono respondecis pri preskaŭ 50 procento el la tutmonda produktado. Tiu lando kreis novan vivstilon: *the American way of life* (la Usona vivstilo). Tiu vivstilo karakteriĝis per granda kresko en aĉeto de aŭtomobiloj kaj ĉiuj specoj de industriaj produktoj. Sed Usono suferis grandan depresion en la jaro 1929, kiam okazis terura krizo, kiu atingis la tutan mondon. La Novjorka burso disfalis en du dramecaj sesioj kies graveco kaj kvanto ne estis konataj iam antaŭe nek poste: la tiel nomita **Nigra Ĵaŭdo** (24a de oktobro de 1929) kaj tiu nomita **Nigra Mardo** (29a de la sama monato). Pro la kolapso de de la prezo de la akcioj multaj investistoj perdis, en la daŭro de kelkaj tagoj, sian monon, kiu en multaj kazoj estis prunteprenita de la bankoj kaj pro tio ĉi tiuj ne povis rembursi ĝin al ties deponintoj.



CITY EDITION London Herald LATE PRICES

WALL STREET CRASH!

Black Thursday in America

What Went Wrong?

La paniko okazigita de tiuj procezo rapide etendiĝis al la tuta mondo, kaj efikis sur ĉiuj landoj ĉu riĉaj aŭ malriĉaj. En Usono la senlaboreco pligrandiĝis al 25 procento kaj en iuj landoj atingis eĉ 33 procenton. La sektoroj de la produktado sur kiuj plej efikis la krizo estis la peza industrio, la konstruado kaj la agrokulturo.

Tiu estis la unua pura krizo de kapitalismo, la krizo de superproduktado. La altaj interezaj taksoj de Usono, kune kun deflaciiga politiko, celanta disvendi la troon de la komerco, kiu aperis post la milito kaj la krizo de 1921, kaj eviti la eliron de kapitaloj, altiris al Usonaj Borsoj investojn de la tuta mondo. Tio rezultis en periodo de financa spekulado, kiu atingis grandegajn proporciojn. La prezo de akcioj estis multe pli alta ol ilia vera valoro, kaj oni kreis falsajn entreprenojn nur por aĉeti kaj vendi akciojn. Samtempe, la plibonigo de produtad-kapablo de la Fordisma sistemo pligrandigis la kvanton de produktoj. Oni oferis senliman krediton por ebligi la vendojn kaj stimuligis la konsumismon per propagando, sed la ofero daŭris tre supera al demando kaj la merkato restis saturata.

La Neoklasika ekonomika skolo, kiu tiam estis la sola ekonomika teorio kiel alternativo al la marksisma teorio, diris ke ekonomiko estas la scienco pri la malabundeco. Do, ne estas taŭgaj teorioj por la troo de produktado.

Tiel, bankrotis la unua angla entrepreno, kaj oni retiris rapide la anglajn kapitalojn de la Borso de Novjorko la 24an de oktobro 1929, la Nigran Ĵaŭdon, la plej fatalan tagon de la historio de kapitalismo. Tro granda kvanto da akcioj estis oferata, kaj iliaj prezoj falis. La sindikato de bankistoj kaj la usona registaro intervenis, sed la deflacio en prezoj de akcioj iĝis neinversigebla. Al tiu financa krizo kuniĝis alia ekonomia, artikloj kaj tropikaj produktoj (kafo, kaŭĉuko, kotono) perdis postulon, tuj poste tiuj ekonomiaj sektoroj estis afektataj. Tiu bankrotaro ne nur malgrandigis la rentojn, sed ankaŭ malpligrand-igis la povon de aĉeto kaj, sekve, malkreskigis la dungitecon. Ankaŭ la ekonomia komerco eniris recesion kaj pligrandigis la internaciajn vendojn de usona produktado.

La bankroto de multaj entreprenoj kaj la manko de investo igis la krizon daŭri longan tempon. La bankaro estis la sektoro plej atingita de la krizo. La "*crash*" (disrompo) de Novjorka Borso kaŭzis ankaŭ la retiron de usonaj kapitaloj investitaj en eksterlando, kaj la konfida krizo igis la privatajn investantojn nuligi siajn bankajn deponaĵojn kaj aĉeti oron. Tio kaŭzis krizon en kredito. En majo de la jaro 1931 bankrotis la ĉefa aŭstra banko, regata de la Rothschild-familio: malaperis

la kredito al entreprenoj de centra Eŭropo, kiu ankaŭ bankrotis. La fakto, ke la familio Rothschild esti juda, pligrandigis la senton kontraŭ la judoj en Eŭropo.

De 1929 ĝis 1932 Usono perdis 55 procenton el sia laborkapablo. La registaro provis krei novajn publikajn dungojn kaj pligrandigi la socialan protektadon. Germanio haltigis pagon de militreparaj ŝuldoj al Francio kaj Britio, kiuj ĉesis pagi debetojn al Usono.

Unu el la kaŭzoj de la disetendiĝo de la krizo estis la drasta kolapso de la internacia komercado, kies perdoj atingis du trionojn el la valoro atingita ĝuste antaŭ la komenciĝo de la depresio. Tiu katastrofo en la monda komerco pli efikis sur tiuj landoj kies ekonomioj estis malfermitaj al la ekstera interŝanĝado. Kaj la efiko krom intensa estis ankaŭ longdaŭra, en la jaro 1938 la valoro de la tutmonda komerco restis ankoraŭ sube de tiu atingita en la jaro 1939, antaŭ la komenciĝo de la krizo. En la jaroj kiuj sekvis al la bursa krako okazis la revenigo de la kapitaloj, ĉefe la usonaj, investitaj en fremdaj landoj. Ĉi tio estis speciale domaĝa por la landoj plej enŝuldigitaj, pro ties dependeco de la fluo de eksteraj kapitaloj, kio okazigis gravajn financajn problemojn.

La usona registaro provis protekti la enlandan industrion kontraŭ la fremda konkurenco per la plej altaj impostoj al importado de eksterlandaj varoj. Kiel kontraŭago, aliaj landoj pligrandigis la tarifojn al usonaj importaĵoj. Tio kaŭzis la malpliiĝon de monda industria produktado laŭkvante de 36 procento inter la jaroj 1929 kaj 1932, kaj la tutmonda komerco suferis falon de 62 procento.

En 1932 Usono elektis Franklin Delano Roosevelt kiel prezidenton. Li proponis la "*New Deal*" (nova Vojo), platformon de registaraj programoj por stimuli kaj revitalizi la ekonomion. *New Deal* (Nova Vojo) estis aro da agoj celantaj venki la krizon. La *New Deal* estis inspirata de ideoj de la angla ekonomikisto John Maynard Keynes. Ankaŭ Britio kaj Francio intervenis en siaj respektivaj ekonomioj kaj eskapis el la plej malbonaj efikoj de la depresio. Samtempe Sovetunio kreis la kvinjarajn planojn.

En Germanio la depresio kaŭzis tre altan inflacion kaj ekonomian krizon. Kiam la naziistoj prenis la politikan povon, Adolf Hitler aplikis rimedojn por neŭtraligi ĝin pligrandigante la armeon por absorbi la senlaborajn homojn kaj aĉetante armilojn de la enlanda industrio, kiu tiamaniere reprenis kreskon.

La depresio finiĝis nur en la jaro 1939, kiam komenciĝis la Dua Mondmilito, kiu detruis la troon de produktado en la monda ekonomio.

## La Dua Mondmilito kiel solvo de la ekonomia krizo de 1929

En la krizaj periodoj ĉiu kapitalisto intencas elimini la konkurencon far la ceteraj kapitalistoj de la sama produktad-branĉo serĉante novajn zonojn de ekspluatado. Kiamaniere oni atingas novajn zonojn de ekspluatado? Pere de konkerado. Germanio intencis konkeri la mondon, Usono intencas konkeri la mondon, ili ambaŭ bone pretiĝis. Kaj la malgrandaj imperialistoj intencas eltiri profiton el ĉio ĉi.

La kapitalismo povas demarŝadi la krizon nur pere de iu ĝenerala milito. Pendas tiu minaco sur la popoloj de la tuta terglobo. La demando por la popoloj estas ĉu ili konsentos ke la kapitalo solvu la krizon pere de nova Mondmilito. La manko de iu ne-kapitalisma alternativo kaj de ia popola reago celante profundajn transformigojn ebligas la aplikadon de milita solvo por alfronti la krizon.

Tiam oni trompis per granda mensogo al la popolo. En tiu epoko oni deklaris ke la ŝtatoj ne intervenos en la ekonomio, sed tamen poste ili tuj intervenis kaj naciigis la bankan sektoron. En Germanio Heinrich Brüning (katoliko), kiu regis ekde la jaro 1930 al 1932, fakte naciigis la bankojn (kiujn Hitler redonus poste al la bankieroj, senkoste, en 1933-34). Kaj la ŝtato alprenis la koston de granda serio da ekonomiaj sektoroj.

La tiamaj regantaroj reagis tute same ol nuntempe, protektante la grandan kapitalon kaj subpremante la popolajn amasojn.

La "New Deal" (plano de ekonomia rekuperado de la usona Prezidento Rooselvet inter la jaroj 1933 y 1938) en Usono karakteriĝis, unuflanke, pro iu konsiderinda financado fare de la ŝtato kiu pezis nur sur impost-kontribuantoj, kaj aliflanke, pro la preparado de la milito. Menciindas, krome, ke tio kio savis Usonon el la krizo ne estis la "New Deal", sed la milito.

En 1945, jam estis estintaj mobilizitaj pli ol 12 milionoj da homoj. Tio postulis transporti, nutri kaj ekipi ilin koste de la publika enspezo de la ŝtato. La industrio rekuperiĝis ĝis la niveloj de antaŭ la krizo.

Ĉu nia generacio "ĝuos" similan militan solvon por eliri el la krizo en kiu ni dronas nun?




# La longdaŭra komfort-socio

La periodo inter la fino de la Dua Mondmilito kaj la krizo komenciĝinta en la jaro 1974 estis la plej longa tempo-daŭro de seninterrompa ekonomia florado en la ĝisnuna historio de la kapitalismo. Tiu tridekjara periodo estis nomata “la ora erao” de la kapitalismo. Kompreneble, la progreso kaj la konsum-socio kiu karakterizis tiun epokon estis ĝuitaj nur en la disvolvigitaj aŭ alte industriigitaj landoj. Fakte, en plejparto el la landoj de la mondo stariĝis kondiĉojn por la persisto de malevoluo kaj malprogreso. Kaj en la riĉaj landoj mem ne mankis getoj kaj insuloj de mizero aŭ deprimitaj zonoj.

Ĉiukaze, en la unuaj jaroj post 1970 komencis manifestiĝi la rezulto de la baza kontraŭdiro de la kapitalo: malpliiĝas la renteco de la investado en la disvolvigitaj landoj. La investita kapitalo ne sukcesas generi la profiton kiu igus interesa daŭre investi. Estis la unuaj simptomoj aŭ signoj anoncantaj la ĉeson de la funkciado de produktad-sistemo kiu estis travivinta tiun eksterordinare longan periodon de senĉesa ekonomia kreskiĝo. Sed, kio ebligis la estiĝon kaj persiston de tiu escepta periodo, al kiu iuj ekonomistoj asignis la nomon de “fordismo”? Kiel dirite, ĝi komencis post la fino de la Dua Mondmilito. Tiu konflikto ruinigis Eŭropon kaj definitive konfirmis aŭ signis la usonan plejsuperecon mondskale.

Por la vera venkinto de tiu milito, la usona superpotenco, ne estis interesa ke Eŭropo refalu en la staton de malevoluo simila al ties de Afriko aŭ de la Ŝton-epoko; la popoloj de tiutipaj socioj ne konsumas usonajn industriajn produktaĵojn. La usona helpo pere de projektoj kiaj la “Marshall-Plano”, kontribuis al la rekuperiĝo de la eŭropa industrio kaj ekonomio, ĉiam en dependeco de la usona potenco. Io simila okazis en la venkita Japanio. La amasa usona kapital-investado en tiuj landoj permesis la formadon de iu alte industriigita kapitalista merkato kiu estis la scenejo de tiu longa ekonomia ekspansio. Estas necese atenti pri alia grava karakteraĵo de la socio kiu tiam formiĝis. Rezulte de la Mondmilito estis ankaŭ alia potenco kiu rezultis fortigita de la venko sur la faŝismoj. La komunista Sovetunio, kun ties kontrolo sur kelkaj landoj de Orienta Eŭropo, estis referencaĵo por la laboristoj de la kapitalistaj landoj kaj ties sindikataj organizaĵoj kiel alternativo de pli socia, nekapitalisma, ekonomio. Alfrontante tiun defion, la kapitalismo estis devigita fari grandajn koncesiojn al la laboristaro de tiuj landoj por ke ĉi tiuj ne sentu emon al socia revolucio celanta meti finon al la burĝa sociordo. En kio rilatas al la tiama viv-maniero de ampleksaj amasoj de tiu kapitalista bloko, tiu sistemo ricevis la nomojn de “komfort-socio” kaj “konsum-socio”. Ties karakteraĵoj estas: socia, interklasa paco (preskaŭ nula kontraŭfrontiĝo inter la laboristaro kaj la kapitalistoj, manko -aŭ preskaŭ- de strikoj…), plenlaboreco, relative alta konsumnivelo, la ekzistado de ia grado je ŝtata kontrolo de la produktad-procezo kaj iuj potencaj publikaj, ŝtataj, ĝenerala pliboniĝo de la vivkondiĉoj de la laboristoj en la disvolvigitaj landoj kun sociaj servoj rilate al la saneco, la instruado, la pensioj de la laboristaj familioj, longa daŭro de ia dinamiko de stabila kaj potenca ekonomia kreskiĝo. Ja, tiu formulo, kiun la ekonomikistoj nomis “kejnesismo” laŭŝajne permesus ian harmonian kapital-



Marshall-Plano de helpo al Okcidenta Eŭropo 1948-1952

isman disvolviĝon: la enorma disvolviĝo de la produktado kunvivadis kun la avanco de gravaj sociaj konkeraĵoj por la laboristoj. La ŝtata interveno ŝajne garantiis la finon de la periodaj krizoj. Dume, la kreskiĝo de la salajroj super la produktiveco, la konsumo far de la amasoj kaj la ascendo de la publika elspezado ŝajnis ne nur eblaj sub la kapitalismo sed ankaŭ necesaj por ĝia disvolviĝo.

Tiuj jardekoj de ekonomia progreso estis subite interrompitaj fine de la 70aj jaroj. Ja, spite al tio ke oni nomis ĝin "krizo de nafto" kaj la tiama plialtiĝo de la nafto-prezo sufiĉe gravis, la titolo ne estas tute ĝusta. La mankoj de la supozita harmonio inter la kejnsismo kaj la kapitalismo estas de pli profunda naturo. Kaj, fakte, la unuaj signoj montriĝis antaŭ la plialtiĝo de la nafto-kosto. En Okcidenta Germanio komenciĝis en 1968-69 la unua recesio de la postmilito. La malpliĝo de la renteco de la kapital-investoj komenciĝis en 1971; plikreskiĝis la senlaboreco kaj malpliiĝis la internacia komercado. Printempe de la jaro 1970 okazis bursaj krizoj en kelkaj landoj kaj estis devalutita ties mono. En tiu kunteksto de serioza krizo en 1973 okazas la plialtiĝo de la internaciaj prezoj de kelkaj bazaj produktaĵoj: tritiko, kotono, kupro… kaj fine venis la menciita plialtigo de la prezo de la nafto.

Same ol nuntempe, la tiamaj aŭtoritatoj kaj la inform-medioj preferis ne rekoni la krizon kaj penis kvalifiki ĝin per etikedoj kiuj kaŝas la veran naturon de la problemo, t.e. ke la kaŭzo de la krizo estas la kontraŭdiroj kaj la funkciad-maniero de la sistemo mem. Pli profunda analizado de tiu krizo evidentigas ke ekzistis gravaj problemoj kiuj malfaciligis la procezon de kapitalista akumulado. Vere, tiu krizo montris la finon de la kejnsismo kiel konkreta formulo de kapitalista demarŝado. Reale, la origino de la krizo estis la problemoj de renteco kiujn komencis suferi la kapitalista sistemo fine de la 70aj jaroj.

Du estas la kaŭzoj kiuj eksplikas tiun progresivan malboniĝon de la renteco de la produktado. Unue, la kapitalista kontraŭdiro de la tendenco de tiu sistemo ruinigi la generadon de plusvaloro. Dum la 60aj jaroj okazis la elĉerpiĝo de la teknologia ondo komenciĝinta post la Dua Mondmilito, bazita sur la progreso de la elektronika industrio, la plastoj, aeronaŭtiko, kemio kaj daŭrantaj konsumaĵoj. Saturitaj la merkatoj, la produktiga ekspansio jam ne plu povas baziĝi en la ampleksigo de la produktado sed en la diverseco kaj kvalito de la produktaĵoj, kio okazigas la malpliiĝon de la profito. Krome en iuj landoj la vetarmado kaj ties koncernaj esploroj konsumis pli kaj pli da publika elspezo domaĝe al la civila industrio. En tiuj cirkonstancoj, fine de la 70aj jaroj, la pliigo de la takso de akumulado ne generis novan kaj paralelan pligon de la takso de profito, aperante tiam la fenomeno de kapitala superinvestado kaj la sekva falo de la renteco de la kapitalo. La falo de tiu rentec-takso estis 25 procento en Eŭropo inter 1966 kaj 1980, Kaj pli ol 30 procento en Usono.

La alia kaŭzoj de la progresivan malboniĝon de la renteco de la produktado estis tio ke la sociaj fortoj kontribuis alvenigi la kapitalismon al ties limo. Ja, al tiuj elementoj specife ekonomikaj kiujn ni priskribis oni devas aldoni ankaŭ iun bazan faktoron: la klasbatalo. La fordista salajr-rilato baziĝis en iu formulo de labor-pagado ligita al la produktiveco. Tiu sistemo ebligis iun ampleksan kaj ĝeneralan konsumadon de la loĝantaro akorde kun la normigitaj produktad-procezoj, instituciigo de la kolektiva negocado kaj forteco de la sindikatoj.



Depost la 70aj jaroj la senlaboreco iĝis struktura; ne plu estis plenlaboreco.

Laŭlonge de la jardeko de la 60aj jaroj, la nivelo de la laborista kaj socia konfliktiveco akcentiĝis. La sindikatoj, memkonsciaj pri sia forto agadis bataleme: boikoto, organizita sendisciplino, strikoj… Sed, krom la laborista movado, en tiu epoko aperis en aliaj sociaj sektoroj diskutadon de iuj bazaj valoroj de la kapitalismo: disciplino, aŭtoritato, hierarkio… Iu simbolo de tiu fenomeno estis la senordo de majo de 1968 en Francio. En tiu kunteksto de fortaj sindikataj organizaĵoj kaj laborista batalemo, la kreskiĝo de la salajroj en Usono kaj Eŭropo eblis dank´ al la superekspluatado de la laboristoj de la cetero de la planedo. Krom la salajroj, ankaŭ la fiskaj impostoj por la subtenado de la komfort-socio kontribuis damaĝi la rentumecon de la investita kapitalo.

Se oni ne atingas rentumecon la kapitalo ne investas. La malpliigo de la investado siavice damaĝas la atingitan profiton tiamaniere ke ambaŭ procezoj retroefikas unu sur la alian.

Sekve de ĉio ĉi, la disvolvigitaj landoj ĉesis daŭre kreskadi esceptante tre specialajn situaciojn kiel tiu de Usono en la 90aj jaroj sed kreante situaciojn kiuj fine eksplodas. Dume la senlaboreco superis takson de 8 procento kaj fariĝis fenomeno struktura, de tiam ne plu estis plenlaboreco. Estas specifaj kolektivoj kiuj suferas la senlaborecon pli intense ol la ceteraj; estas la kazo de la gejunuloj kaj de la virinoj.



# Reagas la kapitalismo: NOVLIBERALISMO



En despera provo reakiri rentecon, la super-regantaj klasoj entreprenis en la 70aj jaroj iun ideologian, socian kaj politikan ofensivon, kies konkretiĝo en la tereno de la ekonomia politiko estas konata kiel "novliberalismo". La nov-liberalismo havis kiel unua akto la sangoverŝa puĉo de Pinoĉeto en Ĉilio en 1973, kaj ĝiaj pri-ekonomikaj teoriuloj estis homoj kiel Milton Friedman kaj Von Hayek kiuj antaŭe gravis ne-nion ĉar ili estis sekvantoj de la liberala politiko kiu restis tre senkredigita post la depresio de 1929. Do, en la jardeko de la 70aj la kapitalismo repre-nas ekonomiajn formulojn kiuj jam estis fiaskintaj antaŭ duonjar-cento. La nova liberalismo baziĝis sur tri elementoj: unue, (re)privat-igo de publikaj entreprenoj, due, senreguligo aŭ malreglamentigo de la ekonomiaj interilatoj, kaj trie, ampleksa malfermo al ekstere por kapitaloj kaj varoj.



La neceso reakiri rentecon fare de la privata kapitalo instigis la serĉ-adon de novaj ekonomiaj spacoj, novaj terenoj kie eblus akiri profiton. Rezulte de tio okazis serio da privatigoj aŭ malnaciigoj de profitdonaj produkt-ad-sektoroj kiuj ĝis tiam estis kontrolitaj de la ŝtatoj. La ne-renteblaj entreprenoj neniam estis privatigitaj escepte se antaŭe oni sanigis ilin koste de la ŝtatoj. Sub ŝtata, publika, kontrolo troviĝis, ĝenerale, strategiaj produktad-sektoroj kiel la entreprenoj pri transportado, energio, telekomu-nikado… kiuj estis starigitaj dank' al granda publika investado en la antaŭaj jaroj kaj ke utilis kiel apogo de privata kapital-akumulado en aliaj sektoroj. Kune kun tiuj produktad-sektoroj estis privatigitaj krome serion da esencaj publikaj servoj: saneco, edukado… kiuj estis frukto de pas-intaj sociaj konkeroj far batalado de la laboristoj.

Ĉiuj ĉi sektoroj estis tre dezirindaj por la privata kapitalo kiel fontoj de nova profito ĉar ili ne estas subriske de bankroto tial ke ili estas esencaj. Ja, la negoco estas certa en terenoj kiel la energio, san-eco, transportado, edukado… kaj ili ankaŭ ne estas subriske de konkurenco ĉar antaŭe ili estis ŝtataj monopoloj kaj nun ili estas privataj monopoloj kun malfacila eniro de novaj konkurantoj. Tiusen-ce la privatigo de publikaj entreprenoj konstituis veran disrabadon de la publika, ŝtata, trezoro, kro-me konsiderante ke ofte oni plenumis tion kun grandaj dozoj da politika korupteco kaj klientismo for de ĉiu efika demokratia kontrolo.

Ĉar la esencaj kontraŭdiroj de la kapitalismo pro-vokis la malpliiĝon de la kapitala profito, fariĝis necese nuligi la diversajn leĝajn barojn kaj regul-igojn kiujn la publika sektoro trudis al la logiko de la kapitalo kaj kiuj estis necesaj por ne refali en la erarojn kiuj kondukis al la granda depresio de 1929, kaj aliaj kiuj es-tis frukto de la sociaj konkeraĵoj de la laborist-klaso. Tio rilatas al la sociaj servoj, la regulitaj pre-zoj… Tiamaniere la novliberala politiko, kalkulante pri kurta-tem-pa profito pligrandigas la kontraŭ-dirojn longa-tempe.

La sinsekvaj reformoj de la labor-merkato celis malpliigi la organiz-kapablon de la laborist-klaso kaj, sekve de tio, pligrandigi la kapital-profiton domaĝe al la salajr-kvanto kaj la ne-salajraj rajtoj antaŭe ĝuitaj de la laboristoj kaj ties familioj. Ja, cedante al la politi-ka kaj ideologia ofensivo de la superregantaj kla-soj la diversaj registaroj iom-postiom eliminadis historiajn konkeraĵojn kiuj estis fortikigintaj la ne-goc-kapablon de la laborist-klaso: Oni elpensis kontrakt-formojn kiuj faciligas la maldungon de la laboristoj. Oni leĝe permesis la inter-mezajn en-treprenojn de portempa laborado, oni malpliigis la subvenciojn pro senlaboreco kaj oni efektivigis politikajn premojn por la malgrandigo de la salaj-roj. La rezulto de ĉio-ĉi estis iu grava malvenko tiel socia kiel politika de la laborista klaso, kaj poste malpliiĝis la batal-kapablo de la laboristoj kaj la batalemo de la sindikatoj. Multaj laboristoj serĉis individuajn, ne-solidarajn solvojn al ties problemaro kaj okazis ĝenerala direkto-ŝanĝo dekstren.

Poste, surbaze de tiuj reformoj eblis efektivigi ŝanĝojn en la organizaj formoj de la produktado,

kiel la dislokigo de la produktado, t.e. la transigo de la produktad-centroj al landoj kun malpli altaj kostoj rilate al la salajroj kaj la konservado de la natur-medio. Menciindas ankaŭ la praktikadon de la subkontraktoj, t.e. la eksterigo de produktad-procezoj kaj eĉ funkcioj de administra demarŝado de la entreprenoj kiuj antaŭe estis plenumitaj ene de la propraj entreprenoj. Kaj al tio aldoniĝas formoj je kontraktado kaj individua stimulado aŭ de demarŝado de stokoj kaj de organizado en kiuj la laboristoj pli kaj pli restas suferante kontrakt-formojn tre malfirmajn kaj malstabilajn, kio tre damaĝas la organiz-kapablon de la laboristaro.


Ĉio ĉi, kio misefikas kontraŭ la rektaj salajroj, kune kun la malboniĝo de la publikaj servoj kaj de la programoj de socia sekureco, igis ke la nura fakto atingi laboron laŭ kompleta labortago signifas eliri el la malriĉeco, privilegio kiun ĝuas tre malgranda procento da laboristoj eĉ en la riĉaj landoj. La nombro da laboristoj ekskluditaj de tiu laborformo senĉese kreskis dum la lastaj jaroj. Eĉ se kurta-tempe, ĉi tio signifus pli grandan plusvaloron kaj rentecon por la kapitalo, siavice ĝi generas novajn problemojn kiel kaj malbonigo de la aĉetkapablo de ampleksaj sociaj tavoloj kaj la ekstrema enŝuldiĝo de la familioj bazita en malmultekostaj kreditoj kiuj –kiel montris la nuntempa krizo– ne povas daŭre solvi tiun kontraŭdiron.

Aliflanke, pro la interrilato de la financa kapitalo kun la industria kapitalo en la kunteksto de la krizo je renteco, la novliberala programo radikale transformas la financan terenon, igante ĝin taŭga spaco por la atingo de granda kaj rapida renteco. Fakte, jam oni povas diri ke la produktado estas nur unu el la faktoroj de plusvalorigo de grandaj industriaj grupoj. Pro la neebleco trovi iun stabilan kadron de akumulado kaj renteco en la tereno de la produktado, la industria kapitalo fluis al la financa spekulado, multe pli profitdona. Tie oni atingas profitojn kiuj poste ne estas destinataj al la produktado. Antaŭ la neebleco krei novajn kampojn je produktado, la spekulema kapitalo serĉas formojn alpropriigi alies partojn, t.e. partoj de aliaj entreprenoj kaj de la laboristklaso, kaj tiucele ĝi uzas la financan sektoron por efektivigi tiun pri-rabadon el la ensemblo de la distribuita riĉeco. Unue estis liberaligitaj la financaj sistemoj. Tio estis nepre necesa ĉar la spekulado surbaze de la financaj prezoj fariĝas formulo por atingo de profito per la simpla aĉeto kaj vendo de financaj valoroj. Krome la landaj financaj sistemoj mal-fermiĝas al la internaciaj fluaĵoj de kapitalo. Sub la preteksto ke la kapitaloj fluu al la landoj kun pli granda neceso je investado, en la realo la libera transnacia fluado de la financaj rimedoj okazigas subitajn spekulac-celajn enirojn kaj elirojn de kapitalo kiuj detruas la ekonomiajn planojn de la landoj kiuj altiras la intereson de la spekulantoj grave endanĝerante la produktadon de tiuj landoj.

Krome, la procezo de liberaligado de la financa kapitalo okazigis la koncentriĝon de mon-rimedoj en malmultaj bankoj, industriaj grupoj, asekur-firmaoj, invest-fondusoj… La generado de fikcia kapitalo estas senĉesa kaj la atingita profito estas destinata, ĉefe, al la spekulado pri ĉiu ajn valor-papero: akcioj, valutoj, hipotekaj kreditoj… kaj rezulte de tio formiĝas spekulac-bobeloj kiuj eksplodos pli malpli frue misefikante kontraŭ iu ekonomio pli kaj pli tutmonda. Tiusence la novliberala politiko estis iu senĉesa fuĝo antaŭen kiu pli kaj pli malstabiligas la sistemon kaj tre ege pligrandigas la diferencojn, sed tute ne kontribuas al la kreado de nova ciklo de stabila ekonomia disvolviĝo.

La novliberalismo kontraŭas la Kejnsan doktrinon en aliaj gravaj terenoj, ekzemple, en la fiska afero, la publika, ŝtata interveno kiu permesus ian redistribuadon de la riĉeco, alireco a iuj publikaj servoj kaj konsumnivelo por ampleksaj popolaj tavoloj. La novliberalismo transformis la nocion de budĝeto, tiel flanke de la enspezoj kiel flanke de la elspezoj, provokante eĉ inversaj redistrubuoj de la rento. Iu ofensivo celanta malgrandigi la rektajn impostojn, ligitajn al la rento, iompostiom








liberigas rentojn al la posedantaj klasoj subpretekste plifaciligi reinvestadon en la produktado por krei laborpostenojn, kio neniam okazas, kaj malpliigas la rimedojn por subteni la socian politikon. Krome la publika elspezo pli kaj pli orientiĝas al la subtenado de formoj je produktado ligitaj al la privata renteco pere de substrukturoj, subvencioj kaj esploroj de industria aplikado, t.e. publika investado serve de privata profito. Samtempe, la ne-rektaj impostoj konstituas plej grandan parton el la publika enspezado dum elĉerpiĝas, la fonto de financado rezulte de la vendo de publikaj entreprenoj kiam jam ne plu estas vendeblaj publikaj industrioj.

Aliflanke, la grandaj entrepreno-grupoj orientiĝis al politikoj kiuj permesas al ili ioman intervenon en la kontrolo de la merkatoj. La koncentriĝo de entreprenoj, kun internacia bazo, kreskiĝis rezulte de akiroj kaj unuiĝoj komenciĝintaj meze de la 80aj jaroj. Grandparto el la financaj monrimedoj estis destinitaj al tiuj operacioj. La liberalaj valoroj de libera konkurenco, malreguligo, decidkapablo de la merkato… vere, celas nur la formiĝon de oligopoloj kaj monopoloj fare de la grandaj entreprenoj, kio, fine, metas en malmultajn manojn la kontrolon sur tre gravaj aferoj kiel la prezoj de tio kion oni vendas kaj aĉetas. Ĉiu koncentriĝo de entreprenoj konstituis, krome, alian ilon por restarigi la kapitalan rentecon, ebligante la ekonomiojn de skalo kaj la entreprenajn sinergiojn samkiel la eliminadon de la superfluaj laborpostenoj. Ĉiu unuiĝo de entreprenoj kreas multe da ekslaborigitoj.

La novliberala ofensivo, celante atingi plej grandan profiton, baziĝis ankaŭ en la malfermo, t.e. la aliro al novaj merkatoj, la uzado de novaj rimedoj, novaj spacoj de negoco kaj ankaŭ iu kontrolo de la energio kaj la krud-materialoj, kaj la serĉado de solvo por la superproduktado. La financa kaj komerca malfermo efektiviĝis laŭgrade subgvide de la imperiismaj landoj, ĉu rekte, ĉu pere de la internaciaj organizoj: **Internacia MonFonduso**, **Tutmonda Banko**, **Monda Komerca Organizo**… kaj eĉ per militista premo. Ĝi celis alpropriiĝon de krudmaterialoj kaj energi-fontoj laŭ malalta kosto, kaj la eliro de varoj destine al nesaturitaj merkatoj. Tamen tio, kio rezultis solvo por la krizo de superakumulado kaj superproduktado havas ĝiajn limojn. Oni ne povas subteni senlime iun konstantan malfermon. Nuntempe la ekonomio estas jam fakte tutmonda. Krome la internaciiĝo de la ekonomio pliampleksigas je tutmonda nivelo la efikon de la krizo. La t.n. “emerĝantaj ekonomioj”: Ĉinio, Hindujo, Brazilo, Rusujo… ĝis nun spertis konsiderindan industrian kreskiĝon dank’ al tio ke ili povis oferti al la kapitalista merkato pli etkostan laborforton ol ties de la alte industriigitaj landoj, sed tamen ili ne sukcesis sin demeti de la internacia ekonomia situacio rilate al la krizo.




**La novliberalismo estas iu ekonomia, ideologia, socia kaj politika ofensivo, je tutmonda skalo, kontraŭ la bonstato, la aĉetkapablo kaj la sociaj rajtoj de la laborist-klaso kaj la popoloj.**





# Eksplodas la konstruad-bobelo

Ni vidis ke la novliberala ofensivo entreprenita de la registaroj, ĉu dekstraj aŭ maldesktraj, dum la lastaj tridek jaroj, celis la liberaligon kaj malreguligon de la financa sfero. Kaj nia studo montris ke tiu politiko, celanta kurta-tempan rentecon, kreis la kondiĉojn por longa-tempa estonteca krizo. La krizo estis neevitebla, sed kiu sektoro de la produktado estus la eksploda punkto estas konjunktura afero. La fakto ke konkretiĝis en la sektoro de la konstru-industrio la punkto de rompiĝo de la sistemo dependis de tio ke, fakte, en la tuta mondo, la produktad-sektoro de la konstruado de loĝejoj estis la lasta rifuĝejo de la kapitalo kiu forlasis aliajn ekonomiajn terenojn kiam la renteco malpliĝis aŭ tute malaperis en ili. Dum iom da tempo, ja, la konstruado de novaj domoj, ĉaledoj, apartamentoj, urbanizaĵoj… generis profitojn por ties entreprenistoj. Ĉi-tiuj, ofte per subaĉetado, atingis de la urbaj aŭtoritatoj disponeblajn terenojn por konstrui sur ili. Dume la bankoj faris negocojn pruntedonante monon al la konstruistoj kaj al la aĉetantoj de loĝejoj. Resume, la sektoro de la konstruado kaj ĉio kion ĝi movas fariĝis objekto de spekulado. Kreiĝis la bobelo de la konstruad-industrio. Kaj la nepra destino de ĉiu bobelo estas eksplodi pli malpli frue. Ni vidos kiamaniere oni alvenis al ĉi tiu situacio.




Kiel dirite, la kejnsan skemon de la ekonomio, universale akceptita dum kelkaj jardekoj post la Dua Mondmilito, generis la t.n. “komfort-socio” kiu, tamen, ne tiel estis universala sed specifa karakteraĵo de la alte industriigitaj landoj, dum en la socialista bloko manifestiĝis per ekonomia kontrolo de la ŝtato kiu garantiis al ampleksaj amasoj la kovradon de la plej bazaj necesoj. La cetero el la popoloj de la mondo, kiuj ricevis en tiu kunteksto la nomon de “Tria Mondo”, restis for de ĉiu profito de la monda ekonomio al kies riĉeco kontribuis multaj el ili per krud-materialoj kaj mineraloj kiujn oni forrabis al ili per la forto de la imperiismaj potencoj. La popoloj kaj laborist-klaso de la landoj kie oni aplikis la kejnsan doktrinon instaliĝis en la ĝuado de ilia situacio kaj faris nenion por efektivigi tutmondan revolucion celante la liberigon de la tuta homaro. Tiun perfidon al sia historia tasko ili devis pagi kaj la horo de la puno alvenis per la finiĝo de la komfort-socio kaj la disfalo de la socialista bloko far la novliberala ofensivo.

La kejnsa regularo kiu estis submetinta la financojn dum la antaŭaj jardekoj al la necesoj de la produktado estis konscie renversita fare de la registaroj de la industriaj landoj subgvide de Usono kaj Britio kaj la internaciaj organizaĵoj kontrolitaj de tiuj potencoj. La financaj merkatoj fariĝis per si mem fonto ŝajne senlima de profito. Ekde la 70aj jaroj oni registris kolosan kreskiĝon de la financa negoco kiu pli kaj pli malkonektiĝas el la dinamiko de la ekonomio de la produktado.




Konkrete, ekde la jaro 1980 la akumulado de kapital-profito okazas ĉefe pere de la financaj kanaloj anstataŭ per la produktado kaj la komercado de varoj. Oni povas diri ke la rekuperiĝo de la renteco de la kapitalo okazas konkrete en la rekuperiĝo de la financa kapitalo. Tiamaniere la valorigado de la kapitalo okazas en aparta sfero sen-konekse kun la produktado kaj sen ia ajn rilato kun la financado de la produktado, kio stimulas la formadon de spekulad-bobeloj. La aktivaj valor-paperoj estis fikcia riĉeco rilate al la vera riĉeco esprimita de la ekonomiaj variabloj: entreprena investado, internacia komercado, nivelo de la tutmondaj rezervoj… Alia indikilo de la kreskiĝo de la spekulad-bobelo estas la bursaj merkatoj: ekzemple, dum la jaroj 2002 al 2007, kiam la reala produktado estis kreskinta mondskale 3 aŭ 4

procente la bursaj valoroj supervaloriĝis ĉiujare 15 al 25 procenton.
Tamen, kiel trafe asertas K. Marks kaj Kejnso, la akumulado de fikcia kapitalo senkonekse kun la bazo de la produktiga agado havas evidentajn limojn. La profito eltirita de la spekulecaj operacioj subite malaperas kiel fumo kiam la aĉetantoj de la financaj valoroj: akcioj, valutoj, konstruaĵoj… perceptas ke ĝia senkonekso kun la reala valoro igos neebla la vendadon je tiuj prezoj, nepra kondiĉo por ke la operacio estu rentebla. Tial, pli malpli frue ĉiuj spekulecaj bobeloj eksplodas, la prezoj rekonektiĝas kun la reala valoro de la objektoj de spekulado kaj ties fikcia valoro malaperas kvazaŭ fumo. Tio instruas al ni ke la renteco kiun la liberala ofensivo sukcesas rekuperi ne estas tiu de la dinamiko de produktado sed nur tiu ligita al la financa aktivado, kiu siavice, kiel ni vidis, sin apogas sur la procezo de generado de financaj bobeloj de spekulado. Tial, la novliberala ofensivo kontraŭ la konkeraĵoj de la laboristoj, unuflanke, ne povas ĉesi agadi kiel konstanta limigo, nekapabla subteni senlime la procezon de valorigo de la kapitalo eĉ postulante pli kaj pli damaĝi la vivkondiĉojn de la salajruloj, kaj aliflanke, tiu procezo estas ĉiam ligata al la proliferado de financaj krizoj rezulte de la eksplodo de spekulad-bobeloj.


La merkato de la loĝejoj disfalis kiam oni perceptis la abismon ekzistantan inter la reala valoro de la domoj kaj ties fikcia valoro kreita de la spekulado.

La eksplodo de la bursa bobelo okazinta en la 2000-2001 okazigis ke grandparto el la kapital-investantoj ekserĉis kapital-rifuĝejon en la produktad-sektoro de la konstru-industrio. Al tio kontribuis ankaŭ la enorma eksceso de libera mono serĉante rentecon pro la emo de la bankoj pruntedoni al la entreprenoj kaj la familioj. Do, al la eksplodo de la bursa bobelo en la jaroj 2000-2001 sekvis la formado de nova spekulad-bobelo, ankaŭ ĝi internaci-skale, sed ĉi-foje bazita sur baza neceso kia la loĝejoj. En Usono la bobelo de la loĝej-merkato estis enorma kaj same la enŝuldiĝo de la familioj tiurilate: la bankoj direktis la eksceson de libera mono al la amasa kontraktado de kreditoj, eĉ hipotekaj kreditoj al familioj malriĉaj kaj sen posedaĵoj. Ĉi-tiuj alte-riskaj hipotekoj estis avalitaj de la propra valoro de la akiritaj loĝejoj, kiuj senĉese revaloriĝis pro la spekuleca dinamiko ekzistanta tiam en la merkato de la konstruaĵoj. Siavice tiu plialtiĝo de la valoro de la loĝejo permesadis la renegocadon de hipotekoj en ascendo tiamaniere ke la familioj uzadis tiun plialtiĝon por financi ĉi tiajn elspezojn de konsumo: aŭtomobiloj, universitato de la filoj… En la usonaj bankoj la alte-riskaj hipotekoj estis 10 procento de la novaj kreditoj en la jaro 2000 kaj ses jarojn poste tiu procento estis duobligita. Kiam la plej malriĉaj familioj en Usono ne plu povis efektivigi la pagojn de la kapitalo kaj la interesoj de la ricevitaj pruntoj, la investintoj komencis percepti la ekzistantan abismon inter la fikcia valoro de iliaj paperoj kaj la reala valoro de la reprezentitaj domoj kaj konstruaĵoj. Tamen la efiko de la eksplodo de la konstru-industria bobelo ekde aŭgusto de la jaro 2007 ne estis nur la alĝustigo de la prezoj de la domoj kaj sekva haltiĝo de la konstruado en Usono, sed ankaŭ okazigis katastrofon en la internaciaj financaj merkatoj. La ĉen-reakcio kiu pelis en bankroton financajn agentejojn en Usono kaj Eŭropo ne rekte ligitaj al la hipoteka kredito rilatas al la procezo de financado supre menciita, kiu generis iun kompleksan teksaĵon de fikcia kapitalo kiu dissolviĝis en la unuaj tremoj de la krizo.
La usonaj bankoj kiuj koncesiis kreditojn ne konservis ilin atendante la iompostioman rehavon de la pruntita mono, sed vendis ilin al aliaj financaj perantoj, plejofte al bursaj investantoj. Siavice la bankoj de investado kamuflis tiujn alte-riskajn investaĵojn aperigante ilin kiel solidecajn kaj rentecajn financajn valorojn. Lastinstance, la realigo de tiuj valoroj dependis de la ĉiumonata pagado de la hipotekoj de milionoj da usonaj familioj.
Sed krome la spekulado surbaze de hipotekoj komplikiĝis kaj pliendanĝeriĝis pro la interveno en la procezo de ĉiutipaj financaj investantoj: pensio-fondusoj, invest-fondusoj, internaciaj bankoj… kiuj siavice enŝuldiĝis por aĉeti tiujn financajn produktaĵojn.
Tiele, kiam eksplodis la bobelo de la loĝej-konstruado kaj pligrandiĝis la takson de pag-prokrastemo, la ĉeno rompiĝis en la plej malforta ĉenero: la plej malriĉaj familioj komencis ne kapabli pagi siajn hipotekojn. La financaj valoroj tuj senvaloriĝis kaj la bankoj kiuj posedis tiujn valorojn komencas sperti problemojn de disponebla mono kaj eĉ de solventeco, kaj la tuta kartluda kastelo disfalas en la daŭro de malmultaj semajnoj.

La amplekso de la financa kolapso estis/as enorma, bankrotis grandaj bankoj de la tutmonda financa sistemo. Aliaj bankoj estis savitaj dank' al la ŝtata interveno. La Banko de Anglio taksis la financajn perdojn en preskaŭ tri bilionoj da dolaroj. Tiel gravas la krizo ke ĝi baldaŭ trapasis la financajn limojn por grave vundi la realan ekonomion de la grandaj potencoj. La kolapso de la konstru-industrio, per si mem, estas jam tre grava bato por la ekonomio de iuj landoj, inter ili Hispanio. Kaj al tio aldoniĝis alia grava fakto: la financaj kompanioj spertis problemojn pri manko de disponebla mono. Tio kaj la fakto ke ĉiu el ili ne konas la kvanton de la perdoj de la ceteraj financaj institucioj provokis la rezulton de limigo de koncesio de kreditoj. La bankoj dediĉas sian havaĵon al la solvo de la truoj en siaj bilancoj, kaj tiuj kiuj estas solventaj ne kuraĝas pruntedoni monon al aliaj bankoj en la interbankaj merkatoj, nek al entreprenoj aŭ al la familioj.

La kredito estas nepra elemento por la funkciado de la produktiga dinamiko. La pri-kredita kolapso blokadas la komercadon, la entreprenan investadon kaj la konsumon; ĉio kune paralizas la ekonomian produktadon, ĉefe por tiuj ekonomiaj sektoroj kiuj ne nur dependas de la kredito por ties funkciado sed krome dependas el ĝi ankaŭ pro tio ke ĝi nutras la mendadon de siaj produktaĵoj fare de la publiko. Tia estas la kazo de la industrio de la aŭtomobiloj, tre grava ene de la hispana ekonomio, kiu spertas de antaŭ pluraj jaroj grandan malpliiĝon en la vendado.

Ŝajnas ke, krom subitaj, la efikoj de la krizo estos ankaŭ longdaŭraj. Oni ne antaŭvidas solvon por la nuntempa situacio por la sekvaj du jaroj. La plej daŭra el tiuj efikoj sendube estos la senlaboreco, kiu anstataŭ malpliiĝi, plu kreskos dum la sekvaj jaroj, (laŭ opinio de la ekonomikaj fakuloj en la jaro 2008). Kaj oni antaŭvidas ankaŭ salajrajn blokadojn. Kiam estas verkata ĉi tiu artikolo (fine de la jaro 2010) la hispana registaro pretigas laboran planon kun pluaj disponoj kontraŭ la rajtoj de la laboristoj; inter tiuj disponoj estas la plialtiĝo de la aĝo por emeritiĝo ĝis 67 jaroj.

La direktoroj de la grandaj financaj kompanioj, kiuj ege pliriĉiĝis dum la generado de la krizo kaj kiuj kulpas pri la krizo mem, konservas siajn enspezojn "blenditajn" dum la krizo. Ekzemple, en la jaro 2007 la salajroj de la Prezidantoj de la 16 usonaj financ-kompanioj pli damaĝitaj de la krizo atingis la sumon de 334 milionoj da dolaroj, 30 procenton super la koncerna sumo de la jaro 2005. Tiuj samaj kompanioj maldungis 80.236 oficistojn kaj funkciulojn dum la jaroj 2007 kaj 2008. En Hispanio, la enspezoj de la Administr-Konsilantaroj de la 15 plej grandaj bankoj sumis 115,7 milionojn da eŭroj en la jaro 2008. Krome, la 27 hispanaj entreprenoj kun pli alta mon-disponebleco havas blenditan sian altan estraron, t.e. 284 altaj direktoroj ĝuas garantion laŭ kiu ili ricevos inter 2 kaj 5 jaran salajron kaze de maldungo.

Dum la lastaj jardekoj ĉie estis kaj superregis la liberal(ism)a retoriko pravigante kaj legitimante la ofensivon kontraŭ la mondo de la laboro kaj la atakojn kontraŭ la rajtoj de la laboristoj. Sed jen nun kun la krizo la kapitalo rapide forgesas tiun liberalan diskurson kaj postulas, siaprofite kaj siaserve, la ŝtatan helpon kaj intervenon. La ŝtata interveno, insultita kaj rifuzita kiam oni faras por promocii sociajn servojn aŭ publikan bonon, estas nun ege postulata por savi tiujn financajn instituciojn kiuj tre ege pliriĉiĝis dum la spekulad-bobelo. Tiuj intervenismaj disponoj faritaj de la registaroj liberalism-favoraj konstituas grandan hipokritecon. Ilia devizo estas "socialismo por la riĉuloj kaj kapitalismo por la malriĉuloj". Sed tio konstituas gravan lecionon por la salajruloj: kiam ekzistas politika volo, ĉiu ajn registaro trovas la rimedojn por preni energiajn disponojn de interveno en la ekonomio. Antaŭ tiu



**La direktoroj de la grandaj financaj kompanioj, kiuj ege pliriĉiĝis dum la generado de la krizo kaj kiuj kulpas pri la krizo mem, konservas siajn enspezojn "blenditajn" dum la krizo.**


realaĵo indas fari jenan demandon: kial oni prenas tiujn disponojn por savi la bankojn kiuj provokis la krizon, kaj krome eĉ ne trudante al ili ŝanĝon de politiko, kaj ne por alfronti la bazajn necesojn kaj garantii socian defendon de la senkulpaj viktimoj de la krizo?

La ŝtata interveno en rilato kun la krizo registris du fazojn. Unue oni faris amasajn mon-donaĵojn al la internacia financ-sistemo por alfronti la problemojn kiujn la financaj institucioj havis pri mon-disponebleco. Sed ekde septembro de la jaro 2008 oni konstatis ke la financaj problemoj ne estis nur pro manko je mon-disponebleco (kapablo alfronti kurta-tempajn pagojn) sed pro manko de solventeco (kapablo plenumi la pagadon de la ŝuldoj surbaze de la havaĵo de la entreprenoj). Tiam la registaroj de la ĉefaj ekonomiaj potencoj komencis desegni kolosajn planojn de ekonomia savo. Usono efektivigis savo-planon laŭkoste de 3 bilionoj da eŭroj, Britio 661.000 milionoj, Germanio 550.000 kaj Francio 390.000 milionoj da eŭroj. La kosto de la koncerna hispana savo-plano estis 320.000 milionoj da eŭroj. Ĉi tiuj planoj efektiviĝas, kvankam laŭ malsama grado dependante de la lando, en kvar terenoj: aĉeto de hipotekaj aktivaj valor-paperoj al tiuj bankoj kun problemoj pri solvenco, ŝtata avalo al la prunte-donoj faritaj de la bankaj institucioj, "naciigo" de la banka sistemo kaj, jam en la lasta fazo, fortaj planoj de publika investado kaj substrukturoj, kaj planoj por la reaktivigo de la produktado. Tiuj planoj konstituas kolosan transigon de rentoj ekde la publika trezorejo (kiuj financiĝas, ĉefe, per impostoj de la laboristaro) al la financaj institucioj, sen ia ajn garantio de posta redono. Tiu helpo al la bankoj estas senkondiĉa; la




Banka savo-plano

monhelpo ne estas transdonata ŝanĝe de garantio ke la bankoj financu la labor-sektorojn kaj familiojn bezonantajn mon-dispon-eblecon. La bankaj "naciigoj" kaj transdonoj de monrimedoj ne signifas efektivan kontrolon de la bankoj fare de la ŝtato (kiu, ekzemple en Usono, ne rajtus sidiĝi en la sesioj de la administr-konsilantaroj de la naciigitaj bankoj). En Eŭropo, la transigoj de monrimedoj al la bankoj fare de la **Centra Eŭropa Banko** estas farataj ŝanĝe de aktivaj valor-paperoj ne senriskaj. Kaj ĉiuj ĉi operacioj estas realigataj laŭmaniere tute ne travidebla por la publiko spite al tio ke temas pri publika mono. Tiamaniere la ŝtato intervenas sociigante la perdojn favore al la financa rentismo kaj tamen ne estis interveninta antaŭen por sociigi la gajnojn (male, antaŭe la ŝtato estis malpliiginte la impostojn de la kapitalo). Tiuj kolosaj savo-planoj per publika mono estis faritaj sen iu ajn kompenso kiu konstituus ŝirmon por la salajrulojn kontraŭ la krizo, kaj samtempe evidentigas la ekzistadon de sufiĉaj mon-rimedoj por preni tiutipajn disponojn se estus en la registaroj politika volo tion fari.








# Karakterajôj de la nuna krizo

La kontraŭdiroj de la novliberala kapitalismo, pli kaj pli eksplod-minacaj, estis laŭregule manifestiĝintaj ekde la mezo de la 90aj jaroj kun ses krizoj dum 20 jaroj: meksika krizo en la jaro 1994, azia krizo en 1997, rusa krizo en 1998, argentina krizo en 2001, krizo de la bobelo Interreto en 2001, krizo de la tro-riskaj kreditoj (subprime) en la jaro 2007… La pov-sistemo Dolaro-*Wall Street* sukcesis ĝis nun devojigi la krizojn al la periferio de la kapitalismo pere de sia kontrolo de la internacia financa funkciado. Tamen, la nuna krizo estas kvalite pli grava ĉar ne estas la periferio sed la koro mem de la tutmonda kapitalista sistemo kiu rezultas trafita.



Tre malmultaj kapitalistaj krizoj generis progresistajn alternativojn. Male, ĝenerale oni venis al diktatorecaj kaj eĉ totalismaj alternativoj.

Tre malfacilas antaŭvidi la posttempajn sekvojn de la nuna krizo, sed multaj analizoj ŝajne koincidas pri tio ke ni povas esti enirantaj en iu dua depresion de la tutmonda kapitalismo kun nekalkuleblaj geopolitikaj kaj socipolitikaj sekvoj. Oni povas pensi ke interimperiistaj kontraŭdiroj inter la diversaj regionaj pov-blokoj, en terzonoj kiel Kaŭkazo, MezOriento, LatinAmeriko… kiuj konkretiĝis post la fino de la Malvarma Milito povos pliakriĝi rezulte de la krizo. La kapitalistaj krizoj pli-akrigas la kontraŭdirojn inter la sociaj klasoj kaj kondukas al situacioj de granda politika kontraŭ-frontiĝo. Tial, oni devas ne malatenti pri la ebleco ke iu kreskiĝanta socia malstabileco konduku gravajn sektorojn de la superreganta klaso elekti solvojn aŭtoritarecajn kaj reakciajn. Tre malmultaj kapitalistaj krizoj generis progresistajn alternativojn. Male, ĝenerale oni venis al diktatorecaj kaj eĉ totalismaj alternativoj.

Sed eble la granda problemo de la kapitalismo ne estas nur la internaj kontraŭdiroj kiel ekonomia sistemo izolita de ĝia rilato kun la naturo. Ĉi tiu sistemo ne povas eksterlasi sin el la kondiĉoj kaj limoj truditaj de la planedo. Kiel sciate, la superregantaj klasoj efektivigas veran ofensivon por atingi salton en la renteco laŭ stabila maniero kaj, kvankam dum iuj periodoj ĝi sukcesas rekuperi la profit-takson, neniam atingas la celon konservi stabil-maniere la rentecon de la kapitalo. Ĉiu paŝo tiucele plibonigas la situacion de la kapitalista klaso, sed nur ŝanĝe de iu nova kontraŭdiro. La kapitalismo estas sistemo kiu dronas en siaj propraj kontraŭdiroj; sed, kiel asertis Lenino, neniu krizo estas sensolva por la superregantaj klasoj, dum ĉi tiuj konservus sian kontrolon sur la ĉefaj produktad-rimedoj kaj sur la aparato de la ŝtato. Dependante de siaj fortoj, la kapitalo ĉiam trovas, pli malpli frue, manierojn rekomenci sian akumuladon, eĉ se pere de novaj militoj, kreskanta malegaleco, pli grandaj damaĝoj al la natur-medio aŭ aliaj katastrofoj. Ne eblas imagi la scenon de la “fina disfalo de la kapitalismo” sub la pezo de ĝiaj propraj kontraŭdiroj; nur la konscia konstruado de ekologi-socialista alternativo fare de plejparto el la popolo povas defaligi ĝin kaj entrepreni ian eliron el la krizo je civilizacio en kiu dronas la planedo.

La granda problemo de la kapitalismo estas tio ke la senĉesa akumulado kolizias kun la limigitaj rimedoj kiujn oferas nia Tero. La kreskanta “ekologia spuro” de la plej disvolvigitaj landoj atentigas pri la fino de la konstanta kreskado. La premo, je tutmonda skalo, sur la ekszistantaj rimedoj pretersuperas, jam nun, tion kion la Tero povas elteni, kaj tial ni devas ne tiel pensi pri makroampleksaj mezuroj, kiaj **IKP** (Interna Kruda Produktaĵo) aŭ **PKP** (Landa Kruda Produktaĵo) kiel en la origino de la generado de necesaĵoj: la natur-rimedoj. Ĝis nun oni debatis ĉu la konstanta kreskado povus esti distribuita diversmaniere. Sed, nuntempe, la tipo de priatentitaj necesoj kaj la formo kiel ili estas kovritaj postulas ian kvanton da naturrimedoj kiuj pretersuperas la kapablon de la planedo.

Alimaniere dirite: ne la makroampleksaj mezuroj diras al ni la grandon de la distribuebla torto, sed la natur-rimedoj el kiuj tiu torto eliras. Iu ekologia spuro pli granda ol la bio-kapablo de la planedo diras al ni ke la torto por la estontaj generacioj estos pli malgranda. Kaj diras al ni ankaŭ ke ne eblas la konstanta akumulado, kvankam la plej riĉaj kaj potencaj landoj povus atingi tion. Kaj se iuj landoj plutenas ekonomian kreskadon tio okazas preze de la bio-kapablo de aliaj teritorioj aŭ de estontaj generacioj.

Se la torto ne povas kreski, ĉu la homaro kapablos kundividi ĝin kun la ceteraj specioj kun kiuj ni kunhavas la planedon? Kaj ĉefe, ĉu kapablos la homaro kundividi ĝin egalece inter ĉiuj popoloj de la Tero? Eble jes, sed ŝajnas ke ne povas fari tion iu ekonomia sistemo kies ĉefa emo estas la atingo de kiel eble plej alta privata renteco en iu kadro de ĝenerala konkurado kaj kiu ne kapablas meti ordon nek raciecon en la kovrado de la sociaj necesoj.



La granda problemo de la kapitalismo estas tio ke la senĉesa akumulado kolizias kun la limigitaj rimedoj kiujn oferas nia Tero.

La granda plialtiĝo de la prezo de la bazaj nutraĵoj, speciale grava en la unua duonjaro de 2008, rekte minacas la vivon de centoj da milionoj de homaj estaĵoj. Unue plialtiĝis la prezo de la metaloj kaj tiuj de la sektoro de la energio. Poste la prezo la nutraĵojn altiĝis grandmezure. En la daŭro de unu jaro inter 2007 kaj 2008, la prezoj de la rizo kaj la tritiko duobliĝis kaj tiu de la maizo plialtiĝis trionon. Subite, la 27an de marto 2008, la prezo de la rizo, kiu estas la baza nutraĵo de duono el la monda loĝantaro plialtiĝis 31 procento. Preter la klimat-ŝanĝado aŭ la importado el Ĉinio kaj Hindujo, la struktura krizo de la sistemo kaj la novliberalismo havis alian esprimon en la tiel nomata "krizo de la nutraĵoj". Laŭ iuj registaroj kaj por multaj transnaciaj kompanioj, la problemo pri la energio povus esti solvita pere de la produktado de agro-karburaĵoj kaj tiucele estis drenitaj ampleksaj mon-rimedoj destine al tiu sektoro de la produktado demetante ilin el ties destino kiel nutraĵoj. Sed tio eksplikas nur parton el la plialtiĝo de la prezoj. La alia parto estas generata de la spekulado pri la agrokulturaj produktaĵoj, samkiel ke la agrokultura politiko trudita de la internaciaj organizaĵoj. Rilate al la spekulado, jam post la eksplodo, en la jaro 2001, de la bobelo de la teknologiaj entreprenoj, sed ĉefe ekde la krizo de la alte-riskaj hipotekoj, kiu eksplodis en Usono dum la somero de la jaro 2007, la kapitalo-investistoj retiriĝis iom-post-iome el la bursa merkato kaj investadis en la sektoro de la agrokulturaj produktaĵoj kaj de la karburaĵoj, kiel verŝajnaj spacoj por la atingo de grandaj profitoj. Evidentas ke la landoj de la periferio de la sistemo tre estas sendefendaj antaŭ la krizo de la nutraĵoj, ĉar la politiko trudita de la **Internacia Mon-Fonduso** kaj la **Tutmonda Banko** ekde la krizo de la ŝuldo senigis ilin de la nepra protekto. Tiu politiko disponis: malpliigon de la areoj destinitaj al la kultivado de nutraĵoj, specialiĝon en unu aŭ du produktaĵoj por la eksportado, nuligon de la sistemoj de stabilizado de prezoj, forlason de la memsufiĉeco pri cerealoj, malpliigon de la rezervo de cerealoj, malfortigon de la ekonomioj per ia granda dependeco de la evoluo de la tutmondaj merkatoj, fortan malpliigon de la sociaj budĝetoj, malaperigon de la subvencioj al bazaj produktaĵoj, malfermon de la merkatoj kaj al la maljusta konkurado de la lokaj malgrandaj produktantoj kontraŭ transnaciaj societoj…

Aliflanke, kvankam la limoj truditaj de la natur-rimedoj al la konstanta akumulado estas realaĵo kiu efikos sur la evoluo de la kapitalista sistemo mem, oni devas prikonsideri la fakton ke la malabundeco estas, siavice, fonto de ŝancoj; tio kio ne abundas fariĝas tre rentebla varo. Tiele, estonte diversaj natur-rimedoj estos objekto de privatigo celante igi profitdonaj iujn spacojn. Ni prikonsideru, ekzemple, la kazon de la akvo, kiu estos unu el la grandaj problemoj de la 21a jarcento kaj kiu jam estas objekto de forta premo por ties privatigo kaj problemo en kelkaj lokoj.

La novliberalismo, celante rehavi la profito-takson pelis la kontraŭdirojn de la kapitalismo kaj ne kapablis konstrui periodon de stabila akumulado kaj renteco, sed dume akre atakis la sociajn konkeraĵojn de antaŭaj epokoj en kio povas esti konsiderata iu fuĝo antaŭen. Krome ĝi pliakrigis la neracian logikon de la kapitalismo en ties rilato kun la biosfero akcelante la procezon de degradigo de la natur-medio. Tiu sistemo metis la homaron en tutmondan krizon kiu endanĝerigas la plu-ekzistadon de la homaro mem.




La graveco de la nuna krizo metas tagorden, unuarange, le neceson organizi la rezistadon fronte al la kontraŭsociaj disponoj kiujn pretigas la financfakuloj. Oni devas preni ĉiujn eblajn unuigajn iniciatojn por remobilizi la socion kiel eble plej. Sed la rezistado ne sufiĉas, krome estas necese labori por la konstruado de iu kontraŭkapitalista referaĵo portanta alternativan kaj koheran projekton de socio, kapablan alporti al la bataloj celojn kaj postulojn samtempe radikalajn kaj realigeblajn.

Do, por tiuj kiuj volas alfronti la socian problemaron oni prezentas duobla tasko:



La krizo ne devas esti pagata de la laboristoj, sed de la kapitalistoj. Oni devas savi la popolojn, ne la bankojn.

Unuflanke, prepari rezistbatalojn, kiel eble plej ampleksajn kaj unuecajn. Kaj aliflanke, konstrui kontraŭkapitalisman referaĵon klare difinitan kaj kun totala politika sendependeco rilate al la sociliberalaj registaroj kaj la politikaj fortoj kiuj apogas ilin.

Sekve oni proponas iujn urĝajn disponojn kiuj devus konstitui la bazon de progresista kaj kontraŭkapitalista alternativo al la nuntempa krizo. Disponoj kiunj oni povus trudi nur danke al iu unueca socia movado kiuj tute ŝanĝus la nunan fortointerrilaton. Disponoj kiuj estu rezulto de reala koincido en la bataloj kaj rezistado okazantaj: kontraŭ la fermo de entreprenoj, kontraŭ la privatigo de la instruado kaj la sanecservo, kontraŭ Bolonio…



La ŝtatoj devus efike batali kontraŭ la fiskaj fraŭdoj kaj eksterleĝaligi la fiskajn paradizojn.

Eblas aliaj disponoj antaŭ la krizo, favore al la socia plimulto. Kun la krizo evidentiĝis ke la novliberalaj politikoj konstituas kolosan fiaskon. Du aferoj estas denove esencaj kaj devas esti konsiderataj, la distribuado de la riĉaĵoj kaj la afero de la posedaĵo.


Defendi la laboristojn. La startpunkto pri la socia urĝeco: defendado de la laborpostenoj kontraŭ la maldungo, kreado de publika laboro, plialtigo de la salajroj, bremsado de la privatigoj. La krizo ne devas esti pagata de la laboristoj, sed la kapitalistoj. Oni devas savi la popolojn, ne la bankojn. Tiu estas la plej baza kaj esenca celo: defendi la laborkondiĉojn kaj la vivkondiĉojn de milionoj da laboristoj kiuj estas damaĝitaj de la krizo.

Uzado de la publika mono. La publika mono devas esti uzata por krei indajn laborpostenojn destine al la senlaboruloj kaj por promocii altkvalitajn publikajn servojn destine al la loĝantaro, kiu nun bezonas ilin pli ol ĉiam antaŭe. Tiucele estas necese decide rifuzi la **Pakton pri Stabileco kaj Kreskiĝo** trudita de Bruselo.

Origino de la rimedoj. Unue, klarigi ke ekzistas rimedoj, kiel evidentigas la realigitaj savo-planoj por la bankoj. Estas afero de politika volo kontroli la uzadon de la disponebla rimedoj. Krome, la ŝtatoj devus promocii laŭ kunordigata maniero iun reformon de la impostaj sistemoj celante ties progresivecon (pli altaj impostoj al pli altaj fortunoj), efike batali kontraŭ la fiskaj fraŭdoj kaj eksterleĝigi la fiskajn paradizojn, kio ebligus disponi je sufiĉe da publikaj rimedoj.

Publika kaj regulita financa sistemo. Aliflanke, la senkondiĉaj mon-helpoj al la privata financsektoro devus esti anstataŭitaj de politika decido favore al iu publika financ-sistemo serve de la sociaj necesoj nun ne priatentitaj, kiu ebligus krome financi la ekologian rekonvertigon de la ekonomio.

Kontraŭ la financaj senreguligoj, la fiskaj paradizoj, la nepagado de la ŝuldoj far la bankoj… Oni devas postuli ankaŭ la kontrolon de la kapitaloj, la ĉesigon de la banka kaj komerca sekreto, la naciigo de la bankoj sen kompensoj kaj kreado de bankoj je ŝtata nivelo. Tiuj disponoj devus esti enkadrigitaj en ĝenerala politiko kiu metu en diskutadon la aferon de la banka privata proprieto kaj ke celu la kompletan naciigon de de la tuta banka, financa kaj kredita sistemo. Sen tiu kontrolo de la financ-sistemo kaj la ekonomio, la ŝtatoj ne plene povus efektivigi la rolon por kiu ili estis kreitaj. Ja, la ŝtatoj kun tiuj "veraj" povoj devus, siavice, esti demokratie kontrolataj de la civitanoj, la loĝantaro.



Antaŭ la bankroto de la banka sistemo aŭ la disfalo de grandaj entreprenoj, se necese por savi la laborpostenojn, devus la ŝtato interveni en la privata proprieto de la grandaj entreprenoj, oni devas ne dubi nek heziti iri tiudirekten defendante la naciigon sub la kontrolo de la laboristoj.

Sektoroj kun malfacilaĵoj. Antaŭ la bankroto de la banka sistemo aŭ la disfalo de grandaj entreprenoj, se necese por savi la laborpostenojn, devus la ŝtato interveni en la privata proprieto de la grandaj entreprenoj, oni devas ne dubi nek heziti iri tiudirekten defendante la naciigon sub la kontrolo de la laboristoj.

Meti en diskutadon la aferon de la proprieto. Ne temas nur pri nova distribuo de la riĉaĵoj sed ankaŭ pri iu ŝanĝo en la rilatoj de la propraĵo. Oni devas anstataŭigi la privatan posedon de la kapitalo kaj de la grandaj entreprenoj tra la publika kaj socia alpropriigo pere de la kontrolo de la ekonomia demarŝado fare de la laboristoj.

Entrepreni novan reglamenton de la labor-merkatoj, kiu renversigu la dinamikon de la prez-reduktado de la maldungoj kaj garantiu stabilecon kaj kvaliton de la labor-kontraktoj, devas esti alia zorgo de la ŝtataj regantaroj.

La krizo estas ankaŭ ekologia. Oni devas rekonverti la modelojn de produktado kaj konsumado por batali kontraŭ la klimata varmiĝo. Tiu celo postulas ian malsaman organizadon de la politiko pri transportado, pri la energio, la batalo kontraŭ la polucio kaj la degradigo de la natur-medio en la urboj kaj en la kamparo. Ankaŭ en tiu tereno devos interveni la publika povo, sub la popola, civitana kontrolo, por orientigi la ekonomian planadon respektante la naturajn limojn de la klimato kaj la medio.

Ekzistas bonaj argumentoj kaj forta apog-punkto por defendi la realigeblecon de la supre menciitaj disponoj: la miloj de miliardoj da dolaroj kaj eŭroj transdonitaj al la bankoj kaj financ-agentejoj nur en la daŭro de malmultaj tagoj, aŭ eĉ horoj, dum la kasoj restas malplenaj por la salajruloj, la senlaboruloj, la popoloj. Oni devas renversi la tendencon prenitan antaŭ 25 jaroj en la distribuo de la riĉaĵoj, dediĉi tiujn riĉaĵojn al la labor-dungo, al la salajroj, al la socia sekureco, al la publikaj servoj kaj ne al la financa spekulado. Tial, multaj aferoj, temoj kaj depostuloj povas pasi el la propagando al la mobilizado, de la ĝeneralaj eksplikoj al konkretaj proponoj, al batalo-celoj.

Tiutipaj disponoj permesus inversigi la nunan salajr-alĝustigon, rifuzante tiele iun ekonomian logikon kiu, kiel la eksplodo de ĉi tiu krizo memorigas al ni, estas laŭdifine aŭtisma rilate al la sociaj necesoj. Krome nun estas evidenta, eĉ por ties plej konvinkitaj defendantoj, la nerealigeblecon de la novliberala formulo de la demarŝado de la kapitalista ekonomio. Kaj, siavice, la novliberalismo ne estis pli ol unu respondo antaŭ la elĉerpiĝo de la Kejnsa formulo, kiu kolapsis per la krizo de la 70aj jaroj. Ambaŭ elementoj: la fakto ke la krizo eksplicite evidentigas la indiferenton de la kapitalista logiko rilate al la sociaj necesoj, kaj samtempe la fakto ke la krizo devigas tiun logikon serĉi alternativan formon de demarŝado, aktualigas la neceson de iu kontraŭkapitalista projekto.

# Urĝas trovi kaj enkonduki alternativon al ĉi tiu senracia ekonomia sistemo:



Joseph Eugene Stiglitz

# Tio, kion mi lernis pri la tutmonda ekonomia krizo ekde la Internacia MonFonduso



La aŭtoro estas profesoro de Ekonomika Scienco en la Universitato de Stanford kaj akademiano de *Brookings Institution*. De al 1997 al 2000 li estis la ĉefa ekonomikisto kaj vicprezidanto de la **Tutmonda Banko**. Li rolis ankaŭ kiel prezidanto de la Konsilio de Ekonomikaj asesoroj de 1993 al 1997. Ekde 1999 li estas profesoro de *Columbia Business School*. En la jaro 2001 li ricevis la Nobel-Premion pri Ekonomiko. La artikolo estis publikigita la 17an de aprilo de la jaro 2000, do, kiam ankoraŭ oni estis generante la nunan krizon, kiun li trafe prognozis.

La kunsidoj de la **Internacia MonFonduso**, kie ajn ili okazus, daŭre kunvenigos milojn da manifestaciantoj kiuj plendos kontraŭ la politikon de la **Tutmonda Organizaĵo pri Komerco**. Ili asertos ke la **Internacia MonFonduso** estas aroganta, ke ĝi reale ne aŭskultas la disvolviĝantajn landojn kiujn supozeble ĝi helpas. Ili diros ke la **Internacia MonFonduso** agadas sekrete kaj evitas la demokratian raporton pri siaj agoj. Ili diros ankaŭ ke la ekonomikaj "*solvoj*" de la **Internacia MonFonduso** ofte malbonigas la situacion: ili transformas la falojn de la ekonomio en recesioj kaj la recesiojn en depresioj.

Kaj ili pravas. Mi estis la ĉefa ekonomikisto de la **Tutmonda Banko** ekde la jaro 1996 ĝis novembro de la jaro 2000, dum la plej grava tutmonda ekonomia krizo. Mi povis vidi kiamaniere la **Internacia MonFonduso** plenakorde kun la Usona Ministrejo pri Financoj (*United States Department of the Treasury*), respondis al tiu krizo. Kaj mi restis terurita.

La tutmonda ekonomia krizo komenciĝis en Tajlando la 2an de julio de 1997. La OrientAziaj landoj estis ĝuintaj tri mirigajn jardekojn: la enspezoj estis pligrandiĝintaj, la sano estis pliboniĝinta, kaj la malriĉeco tre multe estis malpliiĝinta. Ne nur la alfabetigado fariĝis universala, sed ankaŭ okazis tio ke en internaciaj ekzamenoj pri scienco kaj matematiko multaj el tiuj landoj prezentadis pli bonajn rezultojn ol Usono. Iuj el ili ne havis eĉ unusolan jaron de recesio dum tri jardekoj.

Sed la semoj de la katastrofo jam estis plantitaj. Komence de la jardeko de la 90aj, la landoj de Orienta Azio estis liberaligintе siajn financajn kaj kapitalajn merkatojn. Ne pro tio ke al ili estis necese altiri pliajn kapitalojn (ilia ŝpar-takso estis proksimume 30 procento aŭ pli) sed pro internaciaj premoj, inter ili iuj el la Usona Ministrejo pri Financoj. Tiuj ŝanĝoj provokis iun kurta-tempam kapitalo-inundon, t.e. la tipo je kapitalo kiu serĉas la plej altan rentecon kaj reforiri post unu tago, unu semajno aŭ unu monato, tre malsama ol la longa-tempa kapitalo investita en produktad-branĉoj kiel la fabrikoj. En Tajlando, tiu kapitalo kontribuis krei iun neelteneblan ekspansion de la proprieto de konstruaĵoj, domoj, apartamentoj… Kaj, kiel ĉiuj (eĉ la usonanoj) lernis per dolora sperto, ciuj bobelo de konstruaĵ-proprieto eksplodas pli malpli frue, ofte kun katastrofaj sekvoj.

Tiel rapide kiel ĝi eniris, la kapitalo poste eliris. Kiam ĉiuj intencas elpreni sian monon samtempe, ekestas iu ekonomia problemo. Iu ekonomia problemo tre grava. La antaŭa ensemblo de financaj krizoj estis okazintaj en LatinAmeriko el la jardeko de la 1980. kiam la publikaj deficitoj trovalorigitaj kaj la ne-rigoraj mon-politikoj kondukis al galopanta inflacio. Tie, la **Internacia MonFonduso** estis parave trudinta la fiskan aŭsteron (ekvilibraj budĝetoj) kaj pli rigorajn primonaj disponojn, postulante ke la registaroj aplikadu tiujn politikojn kiel nepran kondiĉon por ricevi monhelpon. Do, en la jaro 1997 la **Internacia MonFonduso** altrudis samajn disponojn al Tajlando. La aŭstero, esprimis la lideroj de la **MonFonduso**, restaŭros la konfidon pri la tajlanda ekonomio. Kiam la krizo etendiĝis al aliaj landoj de Orienta Azio, kaj ĝuste kiam pli kaj pli evidentiĝis la fiasko de tiu politiko, la **Internacia MonFonduso** eĉ ne palpebrumis receptante saman kuracilon al ĉiu lando kun problemoj.

Mi pensas ke ĉio ĉi estis eraro. Unue, male ol la latinamerikaj landoj, tiuj de Orienta Azio jam disponis je budĝetaj plusoj. En Tajlando, la registaro agadis kun tiel grandaj plusoj ke, reale, ĝi estis senigante la ekonomion de la necesaj investoj en edukado kaj substrukturoj, ambaŭ esencaj por la ekonomia kreskiĝo. Kaj tiuj OrientAziaj landoj jam havis ankaŭ rigorajn primonajn politikojn: la inflacio estis malalta, kaj daŭre estis malsupreniĝanta. (En Suda Koreujo, ekzemple, la inflacio sin tenis en iu tre komforta 4 procento) La problemo ne estis iu malprudenta registaro, kiel en LatinAmeriko; la problemo troviĝis en iu malprudenta privata sektoro; ĉiuj tiuj bankieroj kaj pruntedonistoj, ekzemple, tiuj kiuj alkuris al la bobelo de la konstruad-produktado.

En tiuj cirkonstancoj mi timis ke la disponoj pri aŭstereco ne revivigus la ekonomiojn de OrientAzio sed male pelus ilin en recesion aŭ eĉ en ĝeneralan depresion. La altaj interezo-taksoj povus neniigi la alte enŝulditajn entreprenojn, okazigante pliajn bankrotojn kaj nesolventojn. La reduktado de la registara elspezado okazigus nur plian kuntiriĝon de la ekonomio.

Tial mi pledis por iu ŝanĝo je politiko. Mi parolis kun Stanley Fischer, iu elstara eksprofesoro de ekomiko en la Instituto pri Teknologio de Massachusetts kaj eksĉef-ekonomikisto de la **Tutmonda Banko**, kiu fariĝis administra subdirektoro de la **Internacia MonFonduso**. Mi kunvenis kun ekono-

mikistaj kolegoj de la **Tutmonda Banko** kiuj povus kontakti aŭ influi ene de tiu institucio, insistante al ili ke ili faru ĉion eblan por ke la ĝia burokrataro reagu.

Konvinki la personojn de la **Internacia MonFonduso** pri analizo rezultis facile; ŝanĝi la mensojn en tiu institucio estis tute ne eble. Kiam mi interparolis kun gravaj funkciuloj de la **Internacia Mon-Fonduso** eksplikante, ekzemple, kiel la altaj interezo-taksoj povus pligrandigi la bankrotojn, kio igus pli malfacile restaŭri la konfidon en la ekonomioj de la landoj de Orienta Azio, komence ili ne konsentis kun tiu opinio. Poste, ne povante argumenti kontraŭe, ili alprenis alian respondon: Mi volus kompreni la premon kiu venas de la konsilio de ekzekutivaj direktoroj de la **MonFonduso**, la organismo kreita de la financ-ministroj de la disvolvigitaj industriaj landoj kiuj aprobas ĉiujn pruntedonojn de la **Fonduso**. La signifo de tio kion ili diris estis klara. La konsilio emis esti eĉ pli rigora dum miaj interparolantoj fakte reprezentadis iun moderan influon. Miaj amikoj, kiuj estis ekzekutivaj direktoroj, esprimis ke kiuj estis suferante premojn estis ili. La afero estis freneziga, ne nur pro tio ke la inercio de la **MonFonduso** estis nevenkebla, sed pro tio ke, ĉar ĉio okazadis post-kulise, ne eblis scii kiu estis la vera obstaklo por atingi la ŝanĝon. Ĉu estis tiuj personoj kiuj urĝadis la ekzekutivajn direktorojn, aŭ estis ĉi tiuj kiuj premadis tiujn personojn? Verdire, ankoraŭ nun-tempe mi ne konas la respondon.

Kompreneble, en la **Fonduso** ĉiuj promesis al mi ke ili estos flekseblaj: se siaj disponoj reale re-zultus tro rigoraj, devigante la ekonomiojn de orienta Azio eniri en pli profundan recesion ol necese, tiukaze ili reversigos tiujn disponojn. Aŭskulti tion okazigis al mi ektremon. Iu el la unuaj lecionoj kiujn la ekonomikistoj instruas al ties universitataj studentoj estas la graveco de la inter-tempoj: iu ŝanĝo en la primona politiko (levante aŭ mallevante la interezo-takson) efikas nur post 12 al 18 monatoj. Kiam mi estis laborante en la Blanka Domo kiel Prezidanto de la Konsilio de Ekonomi-kaj Asesoroj, ni koncentris nian tutan energion por prognozo kie troviĝos la ekonomio estonte, tiele ni povus scii kiujn disponojn rekomendi hodiaŭ. Ludi ignori kion okazos estonte estas la kulmino de la frenezo. Kaj, tamen, ĝuste tion estis kion la funkciuloj de la **Internacia MonFonduso** pretis fari.

Mi ne tiel devus senti surprizon. Al la **MonFonduso** plaĉas okupiĝi de sia aferoj sen eksteruloj farante tro da demandoj. Teorie, la **Fonduso** apogas la demokratiajn instituciojn en la landoj kun kiu ĝi interrilatas. Sed fakte ĝi subfosas la demokratian procezon per la altrudo de disponoj. Oficiale, kompreneble, la **Internacia MonFonduso** "altrudas" nenion. Ĝi nur "negocas" la kondiĉojn por ricevi el ĝi monhelpon. Sed la tuta negocad-povo troviĝas en un flanko, tiu de la **Fonduso**; kaj ĉi tiu nur tre malofte koncedas sufiĉe da tempo por atingi ampleksan kunsenton aŭ eĉ por longdaŭraj konsultoj kun la Parlamentoj aŭ la civila socio.

Foje la **MonFonduso** ĉesas simuli kompletan travideblecon kaj negocas sekretajn paktojn. Al la negocantoj de la institucio ofte mankas sufiĉe da sperto en tiu lando. Plej eble okazas ke ili havas pli grandan konon pri la kvinstelaj hoteloj ol pri la kamparaj vilaĝoj. Ili laboras intense, absorbitaj en siaj kalkuloj ĝis altaj horoj de la nokto. Sed ilia tasko estas neebla. En la daŭro de kelkaj tagoj, aŭ kiel multe pluraj semajnoj, ili devas disvolvi koheran programon kiu respegulu la necesojn de la lando. Ne estas necese diri ke remaĉi numerojn tre malofte provizas komprenon pri la necesa strategio de disvolvigo por la tuta landa ekonomio. Eĉ pli malbone, la remaĉado de numeroj ne ĉiam estas bona. La matematikaj modeloj uzitas de la **MonFonduso** estas difektaj aŭ malaktualaj. Iuj kritikoj farataj al la institucio diras ke ĉi tiu konsideras la ekonomikon kvazaŭ ĝi estus iu muldilo por ellabori krakenojn, kaj tiuj kritikoj estas pravaj. Estas konate ke iuj labor-skipoj por unu lando preparis malnetaĵojn de informoj antaŭ la vizitado al la lando. Mi sciis ankaŭ pri iu malagrabla incidento okaz-inta kiam la membroj de iu skipo kopiis ampleksajn paragrafojn de informo koncerna al iu lando kaj komplete transigis ilin al alia. Tio estus povinta resti neperceptita se la funkcio "serĉi kaj anstataŭigi" de ilia komputila teksto-programo ne estus misfunkciante lasanta la nomon de la unua lando kelk-foje en la informo. Mirinde! Ne estus juste diri ke al la ekonomikistoj de la **Internacia MonFonduso** ne interesas la civitanoj de la malevoluintaj landoj. Sed la plej maljunaj homoj kiuj konstituas la membroj de la **Fonduso**, kaj plejparto el ili estas maljuna homoj, agadas kvazaŭ ili portus sur siaj ŝultroj tion, kion Rudyard Kipling priskribis kiel la ŝarĝo de la blankulo.

La spertuloj de la **MonFonduso** pensas ke ili estas pli brilaj, pli edukitaj kaj malpli politike kondiĉ-itaj ol la ekonomikistoj de la landoj kiujn ili vizitas. Fakte, la ekonomikaj lideroj de tiuj landoj estas sufiĉe kapablaj, ofte pli brilaj aŭ pli bone edukitaj ol la funkciuloj de la **MonFonduso**, kiuj, mult-okaze, estas studentoj de tria nivelo en la plej alte kvalifikitaj universitatoj. (Kredu min: mi instruis en la Universitato de Oxford, en la Instituto pri Teknologio de Massachusetts, en la Universitato de Stanford, en la Universitato de Yale kaj en la Universitato de Princeton, kaj preskaŭ neniam la **Internacia MonFonduso** sukcesis varbi la plej bonajn studentojn). En la lasta somero mi diktis seminarion en Ĉinio pri la politiko de konkurado en telekomunikado. Almenaŭ tri ĉinaj ekomikistoj ĉeestantaj la aŭditorion faris demandojn tiel kompleksajn kiel estus povintaj fari la plej bonaj mensoj de Okcidento.

Laŭ la pasado de la tempo, kreskis mia frustracio. (Oni povis pensi ke ĉar la **Tutmonda Banko** estis kontribuanta per miloj de milionoj da dolaroj por la savo-planoj, ĝia voĉo astus aŭskultata. Sed ĝi

estis ignorita tute same ol la lando kun problemoj). La **Internacia MonFonduso** insistis ke ĉio, kion ĝi petis al la landoj de Orienta Azio estis ke ili ekvilibrigu ĝiajn budĝetojn dum la recesio. Ĉu ĉio? Ĉu la Klinton-administracio ne devis batali en la Kongreso por eviti reformon de la budĝeta ekvilibro de Usono? Kaj, ĉu ne estis la baza argumento de tiu administracio tio ke, antaŭ la recesio, iom da deficita elspezo povus esti necesa? Tio estas kion mi kaj plejparto el la ekonomikistoj estis instruante al niaj studentoj dum 60 jaroj. Vere mi diras al vi: se iu studento estus doninte, en ekzameno, la respondon kiun donis la **Internacia MonFonduso** al la demando *"kiu devas esti la fiska teniĝo de Tajlando por alfronti iun ekonomian recesion?"*, li estus malsukcesinte la ekzamenon kun nul-kvalifiko.

Kiam la krizo etendiĝis al Indonezio, mia maltrankvilo estis eĉ pli granda. Nova investigado fare de la **Tutmonda Banko** montris ke la recesio en lando tiel etnisme dividita povus okazigi ĉiutipajn sociajn kaj politikajn perturbojn. Tial, fine de la jaro 1997, en kunsido de financ-ministroj kaj bank-direktoroj okazinta en Kuala Lumpuro, mi faris iun deklaracion kiun mi estis zorge preparinta kaj estis reviziita de la **Tutmonda Banko**, per kiu mi sugestis ke iu mona kaj fiska programo tro kuntiriĝinta povus konduki al politika kaj socia perturbo en Indonezio. Pluafoje, la **Internacia Mon-Fonduso** plu tenis sin en sia poziciiĝo. La administrativa direktoro de la **Fonduso**, Michel Camdessus, ripetis tie tion kion li jam estis dirinte publike: ke Orienta Azio nur devus kunpremi la dentojn tiel kiel estis farinte Meksiko. Li daŭrigis sian intervenon asertante ke spite al la kurta-tempa sufero, Meksiko eliris pli forta el tiu sperto.

Sed ĉi tiu estis absurda analogio. Meksiko ne rekuperiĝis pro tio ke la **Mon-Fonduso** devigis ĝin fortigi ĝian feblan financ-sistemon, kiu daŭre estis malforta kelkajn jarojn post la krizo. Ĝi rekuperiĝis dank' al ega ondo da eksportado al Usono, kio okazis dank' al la usona ekonomia ekspansio kaj al la "Nord-Amerika Liberkomerca Interkonsento" *(North American Free Trade Agreemen)*. Kontraste al tio, la ĉefa komerca kliento de Indonezio estis Japanio, kiu tiam estis, kaj daŭre estas nun, en ekonomia stagno. Krome, Indonezio estis politike kaj socie multe pli eksplodebla ol Meksiko, kun granda tradicio de etnisma malakordo. Reapero de tia malakordo provokus la amasan fuĝon de kapitaloj (ebligita de la manko de rigoro kiun la **Mon-Fonduso** stimulis, en la limigo de la mona fluo**).**

Sed neniu el tiuj argumentoj utilis. La **Fonduso** urĝis la reduktadon en la elspezoj de la registaro. Sekve, la subvencioj por plenumi la bazajn necesojn kiel tiuj de nutraĵoj kaj karburaĵoj estis forigitaj ĝuste kiam la politiko de restriktado igis ilin pli necesaj ol ĉiam antaŭe.

En januaro de la jaro 1988 la situacio tiel malboniĝis ke la vicprezidanto de la **Tutmonda Banko** por Orienta Azio, Jean Michel Severino, prononcis la timindajn vortojn "r" (recesio) kaj "d" (depresio) priskribante la katastrofan ekonomion en Azio. Lawrence Summers, tiama subsekretario de Financoj de Usono, atakis Severinon dirante ke ĉi tiu prezentis la aferon tiamaniere ke ŝajnis ke la situacio estis pli malbona ol ĝi reale estis. Sed, laŭ kia alia maniero oni povus priskribi tion, kio estis okazanta? La produktado en iuj el tiuj landoj kun problemoj falis 16 procenton aŭ pli. Duono el la negocoj en Indonezio estis implicite en bankroto aŭ preskaŭ kaj, rezulte de tio, la lando eĉ ne povis profiti la eblecojn eksportadi kiujn donis al ĝi la malpli alta ŝanĝo-tipo. En landoj en kiuj, esence, mankis retoj de socia sekureco, la senlaboreco kreskis dekoble kaj la realaj salajroj falis surteren. La **Internacia MonFonduso** ne nur ne sukcesis restaŭri la konfidon en la ekonomio de Orienta Azio, sed komencis subfosi la socian teksaĵon de la regiono. Kaj tiam, dum la printempo kaj la somero de 1998, la krizo etendiĝis preter Orienta Azio alveninte al la plej esplod-kapabla el ĉiuj: Rusio.

La katastrofo en Rusio kunhavis bazajn karakteraĵojn kun tiu de OrientAzio, estante simila la rolo kiun ludis la disponoj de la **Internacia MonFonduso** kaj la usona FinancMinistrejo por instigi ilin. Tamen, en Rusujo, la instigo komencis tre antaŭtempe. Sekve de la falo de la Berlina murego, aperis du skoloj kun specifaj pensoj rilate al la transiro al merkat-ekonomio en tiu lando. Unu el tiuj skoloj, al kiu apartenis mi, estis konstituita de miksaĵo de spertuloj pri la regiono, gajnintoj de la Nobel-premio kiel Kenneth Arrow kaj aliaj.

Ĉi tiu grupo emfazis la gravecon de la institucia substrukturo de la merkat-ekonomio, ekde la laŭleĝaj strukturoj kiuj igas deviga la plenumadon de la kontraktoj ĝis la laŭregulaj strukturoj kiuj igas funkcii la financ-sistemo. Arrow kaj mi estis apartenintaj al iu grupo de la Landa Akademio de Sciencoj kiu, antaŭ dek jarojn, estis pridiskutinta kun la ĉinoj ilian strategion por la transirado. Ni emfazis la gravecon promocii la konkuradon, pli ol limiĝi al la simpla privatigo de la entreprenoj de ŝtata proprieto, kaj ni apogis iun pli laŭgradan transiron al merkat-ekonomio (kvankam ni konsentis en tio ke por batali kontraŭ la inflacio eventuale povus esti necesaj fortaj disponoj).

La dua grupo estis plejparte konstituita de makroekonomikistoj, kies fido en la merkato ne kontemplis la nuancojn de ĝiaj bazoj, tio estas, la kondiĉoj kiujn bezonas la merkato por ĝia reala funkciado. Ĉi tiuj ekonomikistoj karakteriĝis pro ilia malgranda kono de la historio aŭ la specifaĵoj de la rusa ekonomio kaj ne sentis la neceson de tiu kono. La granda forto, kaj baza malforto, de la ekonomikaj doktrinoj sur kiuj ili sin apogis konkretiĝas en tio ke la doktrinoj estas, aŭ oni supozas ke devas esti, universalaj. La institucioj, la historio, aŭ eĉ la distribuado de la enspezoj, ne gravas

por tiuj doktrinoj. Bonaj ekonomikistoj estas tiuj, kiuj konas la universalajn veraĵojn kaj povas vidi preter la ensemblo da faktoj kaj detaloj kiuj mallumigas tiujn veraĵojn.
Kaj la universala vero estas ke la ŝok-terapio funcias por landoj en transiro al la merkat-ekonomio. Vero kiu ampleksiĝas kun ĉi tiu ideo: ju pli forta estas la kuracilo (kaj pli dolora la reago), des pli rapida estos la rekuperiĝo. Tiutipaj estis la argumentoj. Malfeliĉe por Rusio, la dua skolo gajnis la diskutadon en la usona FinancMinistrejo kaj en la **Internacia MonFonduso**. Aŭ pli ĝuste, ambaŭ institucioj kondutis kvazaŭ estus ekzistinta neniu debato kaj plu iris blinde tra la dua vojo. Tiuj, kiuj sin oponis al tiutipa agado ne estis poste konsultitaj dum longa tempo. En la Konsilio de pri-Ekonomiaj Asesoroj, ekzemple, estis iu brila ekonomikisto, Peter Orszag, kiu estis servinta kiel intima konsilanto de la rusa registaro kaj estis laborinta kun multaj el la junaj ekonomikistoj kiuj poste akiris influon en tiu lando. Li estis ĝuste la hom-tipo kies kompetento kaj sperto estis necesaj al la Financ-Ministrejo kaj al la **MonFonduso**. Tamen, eble pro tio ke li konis multe pri la afero, preskaŭ neniam estis konsultita.
Ĉiuj ni scias kion okazis poste. En la balotado de la jaro 1993 la rusaj voĉdonantoj aplikis severan punon al la reformistoj, el kiu, ili ankoraŭ ne tute rekuperiĝis. Strove Talbott, kiu tiam okupiĝis pri la ne-ekonomiaj aspektoj de la politiko en Rusujo, agnoskis ke ĉi tiu lando estis eksperimentita iun "*troon da ŝoko kaj malmulte da terapio*". Kaj tiu tuta ŝoko ne estis kondukinta Rusion al iu ajn vera merkat-ekonomio. La rapida privatigo urĝita al Moskvo far la **Internacia MonFonduso** kaj la usona FinancMinistrejo permesis ke iu eta grupo da oligarkoj gajnu la kontrolon de la ŝtataj rimedoj. La **MonFonduso** kaj la FinancMinistrejo estis modifintaj la ekonomiajn stimulojn en Rusujo, kio estis bone, sed laŭ erara maniero. Ne atentinte sufiĉe pri la institucia substrukturo kiu permesus la floradon de iu merkat-ekonomio, kaj plifaciliginte la fluado de kapitaloj ene kaj ekster Rusio, la **Mon-Fonduso** kaj la FinancMinistrejo starigis la bazojn por la disrabado de la oligarkoj. Dum al la registaro mankis mono por pagi al la pensiuloj, la oligarkoj sendadis al bank-kontoj en Cipro kaj Svisio la monon akiritan per la predado kaj la vendado de altvaloraj landaj rimedoj de la lando.
Usono implikiĝis en tiu abomenindaj okazintaĵoj. Meze de la jaro 1998, Summers, en la antaŭtago de lia nomumo kiel sukcedanto de Robert Rubin kiel Ministro pri Financoj, reale igis publikan spektaklon lia ĉeesto apud Anatoly Chubais, la ĉefa arkitekto de la privatigoj en Rusio. Per tiaspecaj faroj Usono ŝajne enviciĝis kun la samaj fortoj kiuj malriĉigadis la rusan popolon. Ne estas strange ke en tiu lando la kontraŭusonanismo rapide disvastiĝis.
Komence, spite al la altrangigo de Talbott, la veraj kredantoj ene de la Financ-Ministrejo kaj la **Mon-Fonduso** daŭre insistadis en tio ke la problemo ne estis tro da terapio sed malmulte da ŝoko. Sed, meze de la jardeko de la 90aj, la rusa ekonomio daŭre dronadis. La produktado falis duonon. Kompare al la soveta epoko, kiam nur 2 procento el la loĝantaro vivadis malriĉe, la "*reformo*" vidis kiel la indikiloj de malriĉeco plialtiĝis preskaŭ 50 procento, kun pli ol duono el la geinfanoj de Rusujo misvivante sub la limo de malriĉeco.
Nur lastatempe la **Internacia MonFonduso** kaj la usona FinancMinistrejo rekonis ke la terapio estis neatentita, kvankam nun ili insistas ke ili ĉiam diris tion. Hodiaŭ Rusio daŭre troviĝas en stato de senespero. La altaj prezoj de la nafto kaj la longatempe rezistita deprecado de la rublo helpis iome reboniĝi. Sed la vivnivelo daŭre restas multe malsupre ol ĝi estis komence de la transira procezo. La lando konas enorman malegalecon kaj plejparto el la rusoj, afliktitaj pro la sperto, perdis la konfidon en la libera merkato. Iu signifa malleviĝo de la prezo de la nafto sendube ruinigus la modestan progreson kiun oni atingis.
Orienta Azio troviĝas en pli bona situacio, kvankam ankaŭ tie oni devas plu batali. Proksimume 40 procento el la pruntedonoj de Tajlando ankoraŭ ne estis rekuperitaj; Indonezio plu restas enkotigita en la recesio. La senlaboreco estas ankoraŭ multe pli granda ol ĝi estis antaŭ la komenciĝo de la krizo, eĉ en landoj de Orienta Azio kiuj pli bone disvolviĝis, kia estas la kazo de Koreujo. La partianoj de la **MonFonduso** sugestas ke la fino de la recesio atestas pri la efiko de la disponoj de tiu agentejo. Absurde. Ĉiu recesio fine ĉesas. Ĉio farita de la **Fonduso** kondukis al la plej profundaj, longaj kaj severaj recesioj en Orienta Azio. Reale, Tajlando kiu plej strikte plenumis la disponojn de la **MonFonduso**, rezultis pli damaĝita ol Malajzio kaj SudKoreŭjo, kiuj sekvis vojojn pli sendependajn.
Ofte oni demandis al mi kial sagacaj, eĉ brilaj personoj, povis ellabori tiajn malbonajn ekonomikajn disponojn. Iu kialo estas tio ke prudentaj personoj ne praktikis pravan ekonomikan politikon. Foje kaj foje mi restis konsternita vidante kiome malaktualaj kaj ekster la realo estis la modeloj de Vasingtono uzitaj de la ekonomikistoj. Ekzemple, makroekonomiaj problemoj kiaj la bankroto kaj la timo al nesolventeco troviĝis en la centro de la krizo de Orienta Azio. Sed la makroekonomikaj mo-deloj uzitaj por analizi ĉi tiujn krizojn ne estis tipe enradikigitaj en mikrofundamentoj, tiamaniere ke tiuj modeloj ne prikonsideris la bankrotojn.
Sed la malbona ekonomio estis nur simptomo de la baza problemo: la sekretemo. La sagacaj perso-noj estas pli inklinaj konduti stultece kiam ili izoliĝas el la kritiko kaj la konsilo kiuj venas de ekste-re. Io kion mi lernis estante en la registaro, estas tio ke la malfermo estas pli esenca en tiuj terenoj

kie la lerteco ŝajnas esti pli grava. Se la **Internacia MonFonduso** kaj la Financ-registaro estus pretaj ricevi alies alportaĵojn, ilia nescio estiĝus evidenta tre antaŭe. Kritikistoj de dekstrularo, kiaj Martin Feldstein kaj George Shultz, respektive, prezidanto de la Konsilio de priEkonomiaj Asesoroj kaj Ŝtat-Ministro de Reagan, unuiĝis al Jeff Sachs, Paul Krugman kaj mi por kondamni tiujn disponojn. Sed, kun la **MonFonduso** insistante pri tio ke sia politiko troviĝis preter kritikoj, kaj sen iu ajn institucia strukturo kiu devigu ĝin atenti pri ili, niaj kritikoj restis senutilaj. Iuj pli timidaj kritikantoj, eĉ internaj, ĉefe tiuj sub rekta demokratia respondeco, estis silentigitaj. La usona Financ-Ministrejo tiel estas aroganta rilate al siaj ekonomiaj analizoj kaj disponoj, ke ofte strikte, tro strikte, kontrolas eĉ tion kion la prezidento vidas.
Malferma diskutado pri la afero estus vekinta profundajn demandojn pri kiuj ankoraŭ oni malmulte atentas en la usona presaro: Kiomgrade la Financ-Ministrejo kaj la **Internacia MonFonduso** defendas disponojn kiuj reale kontribuis al la alta tutmonda ekonomia volatileco? (La usona Financ-Ministro impulsis la ekonomian liberaligadon en Koreujo en 1993 eĉ kontraŭ la opono de la Konsilio de priEkonomiaj Asesoroj. Tiu Ministrejo gajnis la internan batalon en la Blanka Domo, sed Koreujo, kaj la mondo, pagis altan koston). Ĉu iuj el la akraj kritikoj de la **MonFonduso** en Orienta Azio estis faritaj kun la intenco distri la atenton pri la propra kulpeco de la agentejo? Kaj pli grave, Ĉu Usono kaj la **Internacia MonFonduso** impulsis tiujn disponojn tial ke ni, aŭ ili, pensis ke tio helpus Orientan Azion aŭ ĉar ni pensis ke tio favorus la financajn interesojn de Usono kaj de la disvolvigita industria mondo? Kaj, se ni pensis ke nia ekonomika doktrino helpus Orientan Azion, kie estas la pruvo? Kiel partopreninto en ĉi tiu diskutado, mi klopodis vidi la pruvon. Estis neniu pruvo.
Ekde la fino de la malvarma milito estis metita ian enorman povon en la manojn de personoj kies tasko estas alporti la evangelion de la merkato al la plej malproksimaj anguloj en la terglobo. Ĉi tiuj ekonomikistoj, burokratoj kaj funkciuloj agadas nome de Usono kaj la ceteraj disvolvitaj industriaj landoj, kaj tamen ili parolas iun ligvaĵon kiun malmultaj ordinaraj civitanoj komprenas kaj kiun tre malmultaj el tiuj kiuj desegnas la politikon sin degnas traduki. La ekonomika politiko estas hodiaŭ la plej grava parto de interagado de Usono kun la cetero de la mondo. Kaj tamen, la kulturo de la internacia ekonomika politiko ekzistanta en la plej potenca demokratio de la mondo ne estas demokratia.
Ĉi tio estos kion intencos diri la manifestaciantoj kiuj krios de ekstere en la areoj de la **Internacia MonFonduso**. Kompreneble, la stratoj ne estas la plej taŭga loko por pridiskuti ĉi tiujn tre kompleksajn temojn. Iuj el la plendantoj ne pli interesiĝas pri la malferma diskutado ol la funkciuloj de la M**on-Fonduso**. Ne ĉio dirata de la plendantoj estos ĝusta. Sed se la personoj al kiuj ni konfidas la demarŝadon de la tutmonda ekonomio, en la **Internacia MonFonduso** kaj la usona Financ-Ministrejo, ne komencas dialogi kaj serioze prikonsideras la kritikojn kiujn oni faras al ili, la situacio plu restos malbone, tre malbone. Mi jam vidis kio okazas.

**Joseph Eugene Stiglitz** (naskiĝis la 9an de februaro 1943 en Gary, Indianao, Usono). Li estas usona ekonomikisto. Li ricevis Nobel-premion pri ekonomio en 2001 pro ellaboro de la ĝenerala koncepto de la asimetriaj merkataj informoj kaj pro bazigo de la informatika ekonomiko (kun George A. Akerloffalkaj Michael A. Spence).
Li analizis en multaj terenoj de la ekonomiko. Lia plej fama esploro estas pri la ***screening***, iu tekniko uzita de unu ekonomika agento por eltiri la privatan informon de alia. Ĉi tiu grava kontribuo al la teorio de la asimetria merkata informado pridiskutas la tradician ekonomikan teorion kiu asertas ke la merkatoj ĉiam estas efikaj esceptante iujn limigitajn kaj malgravajn misfunkciadojn. La studoj de Stiglitz kaj aliaj revokas tiun teorion: nur sub tre specialaj cirkonstancoj estas efikaj la merkatoj. Stiglitz kaj Green-wald montras ke kiam la merkatoj estas ne-kompletaj kaj/aŭ la informado estas malperfekta (kio okazas ofte en ĉiuj ekonomioj), eĉ en iu merkato kun konkurado, preskaŭ ĉiam estas skemoj de registara interveno kiuj povas provoki rezultojn por ĉies profito. Kvankam ĉi tiuj konkludoj kaj la ĝeneraliĝo de la misfunkcioj de la merkato tute ne garantias ke la ŝtato amplekse intervenu en ĉiu ajn ekonomio, klarigas ke la "plej bona" rango de rekomendindaj registaraj intervenoj estas multe pli granda ol rekonas la tradicia skolo. Por Stiglitz, ne ekzistas la t. n. *"nevidebla mano de la merkato".*
Nuntempe la vera debato intencas trovi la ĝustan bilancon inter la merkato kaj la registaro. Ambaŭ estas necesaj; povas kompletigi unu la alian. Tia bilanco estus malsama laŭ la epoko kaj la loko.
La teorio elaborita de Stiglitz eksplikas kial la merkatoj sen baroj, ofte, ne nur ne atingas la realigadon de la socia justeco, sed krome eĉ ne produktas efikajn rezultojn. Kaŭze de ies interesoj ankoraŭ ne ekzistis ia intelekta defio por refuti la teorion formulita de Adam Smith pri la ne-videbla mano de la merkato. Tiu supozita ento gvidas nek la ulojn nek la entreprenojn –kiuj celas sian propran intereson- al la ekonomia efiko.

Frédéric LORDON

# Financaj krizoj, kaj nenia instruo tirata

La aŭtoro de ĉi tiu artikolo estas ekonomikisto, direktoro de reserĉado en CNRS (Franca Centro de Scienc-Esploro). Li verkis, en la franca lingvo: La politiko de la kapitalo, 2002; Kaj la virto savos la mondon, 2003; Ĝis kiam? Por meti finon al la financaj krizoj kaj kiamaniere eviti ilin, oktobro 2008; Konfliktoj kaj povoj en la institucioj de la kapital-ismo, 2008.
La teksto estis esperantigita de Vilhemo Lutermano kaj publikigita de **Le Monde diplomatique**, el kies ret-paĝo ni prenis ĝin.



Aliloke oni estus juĝinta la decidon „popolisma”. Sed estas ĝuste en Londono, bastiono de la City kaj financa pulmo de Eŭropo, kie la registaro de S-ro Gordon Brown decidis ŝtatigi grandan bankon en malfacilaĵo, la Northern Rock. Certe, temus nur pri „provizora transigo de proprieto al la publika sektoro”. Estas tamen ĝuste en la patrujo de s-ro Margaret Thatcher kie la ŝtato intervenas. Ĝiaj taskoj : forviŝi la ŝuldojn, post esti jam garantiinta la deponojn sur publikaj fondusoj, do engaĝiĝo de 55 miliardoj da sterlingaj pundoj (72 miliardoj da eŭroj) ; poste forpeli la malbonajn pagantojn - tiuj kiuj senpripense enŝuldiĝis. Post la purigado, la banko devos reveni al la privata sektoro, laŭ malnova principo : ŝtatigo de perdoj kaj privatigo de profitoj. Germanio helpis la IKB Deutsche Industriebank. En Usono, Citygroup kaj Merrill Lynch devis alvoki la helpon de suverenaj fondusoj de Azio kaj de Proksim-Oriento. Tiuj financaj skuoj ne estas senprecedencaj. Ili estas antaŭvideblaj kaj okazas en movado de malreguligado kiu, en Francio, komencis antaŭ ĝuste dudek-kvin jaroj.

EN LA MOMENTO en kiu novaĵoj ĝenerale konsiderataj bonaj estas tuj perceptataj kiel malbonaj, la graveco de la krizo estas pruvita. La usona Federacia Rezervo (Fed) malaltigas plurfoje siajn kvotojn ? Tio estas neniam sufiĉa. Ĝi anoncas, la 12-an de decembro 2007, interkonsente kun la aliaj grandaj centraj bankoj, nekredeblan larĝigon de siaj proceduroj de refinancado [1] ? Tio estas, ĉar la situacio estas pli malbona ol oni imagis. La 17-an de januaro, ĝia prezidanto, s-ro Ben Bernanke, pledas - fakto senprecedenca - por kreskigo de la buĝeta relanĉo ? Tio estas do ĉar la Fed, elĉerpinte siajn ag-eblecojn, petas la helpon de la ŝtato.

Kaj, kvazaŭ temus nur pri la unua akto de komedio iom peze organizita, jen s-ro George W. Bush anoncas jam sekvamatene pakaĵon da relanĉ-disponoj preskaŭ precize alĝustigita al la „proponoj” de la centra bankisto - se tiuj du komencas kunordigi tian skeĉon, tio estas ĉar la situacio estas serioza... Tia paneiĝo de la klasikaj receptoj de la ekonomia politiko estas la plej sensacia signo, kaj la plej zorgiga, de la profundeco de la konfuzego de la financo, kiu estas jam nur bloko de maltrankvilo kaj jam ne respondas, aŭ malkohere, al la gvidaĵoj de la monpolitiko.

La ĉiutaga raporto de la borsaj movadoj, kiuj alie restas nekompreneblaj aŭ dissolvitaj en la ĥaoso de la novaĵoj konstante kraĉataj de la agentejoj de financa informado, alprenas sencon nur se oni metas ilin en mezlongan tempospacon, kiu donas al la nuna krizo ĝian apartan profilon, ĉefe ĝian daŭron. La amikoj de la sistemo, kiuj urĝe asertas la sendanĝerecon de evento konsiderata neglektinda kaj anoncas la revenon al la ordo jam en somero, estos certe elrevigotaj : iliaj skribaĵoj restas... kaj la krizo ankaŭ.

Ĝi havas bonajn kialojn. Ĉar, por imagi ke la epizodo foriĝas kun la facileco de ajna merkat-anomalio, oni devus komplete forgesi ĝian kaŭzon : la deliran rekrutadon de kohortoj da familioj en la plej pezan formon de ŝuldo, la hipotekan prunton. Per returniĝo kiu havas ĉiujn ecojn de imanenta justeco, la klaŭzo de reset [2], kiu unue efikis mirakle por rekruti amase la klientojn kaj puŝi la prezojn de nemoveblaĵoj al pintoj - kaj kun ili la spekulaj profitoj pri la derivaĵoj -, fariĝis nun la malbeno de la financo. Kaj ĝi, kiu tiom emas vivi en la tujeco, troviĝas devigata kompromisi kun nepagitaĵo de enŝuldiĝintaj familioj je kiuj oni ne seniĝas kiel oni likvidas danĝeran kontostaton. La pinto de la resets, do de tiuj kvoto-altigoj kiuj ĵetas la familiojn en nepagipovecon, devus esti atingota en marto-aprilo 2008.

Supozante - favora hipotezo - ke la rekrutadoj de kredit-kandidatoj ĉesis komence de 2007, oni devas do atendi la komencon de 2009 por esti sorbinta la amason da potencialaj bankrotuloj, kies sorto havas strikte nenion interesan por la financo, se iliaj vulgaraj ruiniĝoj ne estus ankaŭ la kaŭzo de la kolapso de la spekulaj produktoj derivitaj de iliaj nemoveblaĵ-kreditoj - la malriĉuloj tute ne scias esti je la alteco de la kreivo de la riĉuloj. Jen do kiel la financo, kiu ŝatas nenion tiom kiel la disponeblon de la fluaĵoj, remalkovras la inertecon de la stokoj : tiuj homoj, kiujn ĝi traktis kvazaŭ hipotekan kanon-karnon, estas nun nur ĝenaĵoj.

Dum tiu tempo, la ruinigo etendiĝas. Ĝi tuŝas kategorion de agantoj pri kiu neniu aŭdis paroli ĝis nun : la monolines, tiuj specialiĝintaj institucioj kiuj asekuras la posedantojn de bilaroj de obligacioj (ĝenerale fondusoj aŭ bankoj). Dum ili estis unue pace okupataj kovri la simplegajn riskojn de urbaj obligacioj en Usono [3], ili ricevis la febron kiel ĉiuj, kaj ili estis logike tentataj asekuri tiom pli allogajn produktojn, kies eksplodanta amplekso garantiis sukan spezon kaj kiujn ĉiuj plezure konsideris kiel same malmulte riskaj kiel la plej bonajn obligaciojn : la derivaĵojn de subprime, kompreneble !
Kiu miras pri la sekvo ? La du plej gravaj monolines, MBIA kaj Ambac, estas en kvazaŭ-bankroto ; bankoj kaj fondusoj estas invititaj al ilia urĝa rekapitaligo - nu, tiuj kiuj tion povas. La afero ne estas nur anekdota, ĉar la difektiĝo de la borsaj kvotoj de monolines havas kiel reguligan sekvon la devigon de simila reviziado de la kvotado de ĉiuj titoloj kiujn ili asekuris... kaj kies valoro tia kia enskribita en la bilanco de iliaj klientoj - la bankoj asekuris tiel siajn kolosajn volumenojn de derivitaj produktoj - estas sekve reviziota al malsupro.
Laŭ tiu kalkulo, la eliro el la krizo estas des malpli sur la tagordo ĉar la vigleco de la financa kolapso intertempe komencis disvastigi siajn plej venenajn efikojn. La difektiĝo de la bankaj bilancoj, sekve al la perdoj pri la derivaĵoj de subprime, la persistaj tensioj en la interbanka disponeblo, pro la ekstrema malcerteco kiu igas ĉiujn rigardi sin reciproke kiel eblajn pestulojn, kondukas fatale al ŝrumpado de la kredito, kiu suferigos la produktan ekonomion, kiom ajn distanca ĝi estas de la spekulaj ĵonglaĵoj. Per rezistemo al konfeso, simila al tiu de la organaj intelektuloj de la liberalismo, la financaj institucioj bezonis pli ol ses monatojn antaŭ ol aliĝi al la ideo de venonta malrapidiĝo de la kresko kaj de ebla malkresko.
Nu, la fakto, ke la ideo de malkresko instaliĝas en la spiritoj, ŝanĝas multon, aparte en la etendiĝo de la financa kampo destinita al malstabiligo. La pli fortaj skuoj de la akci-merkatoj, komence de 2008, atestas tion. Ne estas tiel ke ili okazis de ok monatoj en olimpia maniero. Sed la kurzaj malaltiĝoj estis unue limigitaj al la bankaj valoroj - estas vere unuavice... Poste senteble pli forte, ekde septembro, en la periodoj en kiuj la sekiĝo de la monmerkato kaj la maleblo tie akiri sumojn devigis multajn instituciojn urĝe vendi parton de siaj akcioj por havigi al si urĝe disponeblan monon. En la momento, en kiu la perspektivo de malrapidiĝo preciziĝas, estiĝas kun ĝi ĝenerala demandado pri la aktiveco kaj la profiteblo de ĉiuj sektoroj.
Tiu probabla eniro de la akcimerkatoj en malaltiĝan ciklon promesas kelkajn krudajn flank-efikojn. Aparte en la sektoro same diskreta kiel sentema de la private equity, tiu formo de akcia kapitalismo kie la entreprenoj juĝataj promesplenaj estas komplete aĉetataj, elprenataj el la Borso, restrukturataj per la hakilo, kun la destino, post du aŭ tri jaroj, esti grase revendataj, plej ofte per reenkonduko en la Borson. [4] Sed, se tiu montriĝas malvigla, oni forgesu la distrumpetatajn reenkondukojn kun stelbrilaj kurzoj. Do, la „malbukado” de multaj operacioj de private equityanonciĝas aparte delikata, ĉu ĉar la plusvaloroj ne alvenas, ĉu ĉar necesas prokrasti la „eliron” al la akirontoj kaj porti la ŝuldon multe pli longan tempon ol planite. Ĉar tiuj operacioj estis financitaj de eksterordinaraj kreditsumoj, donitaj kelkfoje en kondiĉoj same riskaj kiel la subprime... kaj la bankoj vidas veni la momenton en kiu bonaj tranĉoj de iliaj nepagitaj kambioj de private equity siavice falos en la kategorion de „malbonaj kreditoj” - kun ĉiaj malplivaloriĝoj kiuj sekvos.
Rekta malaltiĝo de la valoro de siaj akcioj, malrapidiĝo de iliaj generaj aktivecoj [5] kaj de fuzioj-akiroj, minaco por la kreditoj de private equity (kaj ankaŭ por multaj aliaj : kreditoj por konsumado, kreditkartoj...), reduktiĝo de la profito de trading en la malaltiĝaj merkatoj : ĉio, en la ekonomia malrapidiĝo, kunefikas por ronĝi la financan situacion de la bankoj kaj malaltigi ilian emon pruntedoni. En la mire bela mondo de la financo, la krizo nutras la krizon...
Ĉio ĉi ne falis el la ĉielo. Kontraŭ ĉiuj tiuj kiuj, kiel s-ro Daniel Bouton, prezidanto de la Société Générale, pensas kvitiĝi kun tiuj eventoj per la tezo de la „malagrabla vojakcidento”, disponebla por esti remaĉata sur ĉiuj niveloj, de la malhonesta trader - „teroristo”, laŭ la vorto de s-ro Bouton - ĝis la „manko de bonŝanco” pri la subprime, necesas memorigi kiom tiuj eventoj estas la pure logikaj esprimiĝoj de la merkat-financo.
Kiu povus miri ke la agantoj de la financoj postkuras ĉiajn okazojn de glutado ; ke se necese ili inventas ilin per „ennovigoj” kiuj kredigas al ili dum certa tempo ke ili liberiĝis el la risko ; ke ili pafas sin sur ĉia altiĝa viglaĵo kaj transformas ilin tuj en vezikon ; ke apenaŭ kapablaj superrigardi sian individuan riskon ili sentas sin neniel koncernataj de la ĝenerala risko ? Kiu povus miri ke tio regule finiĝas en katastrofo, kaj ĉefe kiu povus miri pri tio, dum tio estis la celo mem de la financa malreguligo, nome forigi ĉian

baron al la agado de la investistoj kaj rekonduki sen la plej eta restrikto al la plej maniiga formo de profito kaj al la plej forta konsterno-povo : la financa rentabilitato ?

La Société Ĝénérale imitaĉas Goldman Sachs

SINJORO BOUTON estas en aparte malbona situacio por pledi pri „eksternorma akcidento kaj tute bedaŭrinda” [6], li kiu prezidas la Société Générale en kiu oni povus vidi perfektan resumon de dudek-kvin jaroj da iom-post-ioma glitadoj al la deliro. Ĉar tiu banko, kun la tradicio de detal-banko de certa klasikeco kiu instigas modere al epopea raporto, kun siaj agentejoj, siaj giĉetoj kaj siaj mezaj kadroj, iom malforta en la afer-banko, estis malfrue mordita de la tarentulo de tutmondiĝo, revo de rafiniteco kaj de trembrilaj ekranoj, imitaĉas la prestiĝan Goldman Sachs, lernas la anglan, instalas siajn boys en Londono kaj fine spiras la grandan aeron de la kapital-merkatoj - ion alian ol renovigi la krediton de la kaldronisto en franca urbeto. Pro tio, kiam s-ro Bouton defendas sin en Le Figaro ke „la modelo de la Société Générale estas absolute ne atingita nek kontestita” [7], necesas kompreni precize la malon : la modelo, kiu estas cetere ne nur tiu de la Société Générale, sed ja la lia aparte, ĵus ricevis belan baton, kaj sub la floslinio. La fascino por la merkatoj, kiu multon enspezigis al li, pretiĝas multe kosti al li. Tiel, iom pli videbla ol la aliaj, kiel ĉiam la malfrue venintoj. la Société Générale bonege ilustras tiun nekredeblan distordiĝon de la banka universo direkte al la merkatoj, kiu estis la magneteca efiko de la malreguligado.

Ĉiuj neadoj de la mondo ne malhelpos ke la nuna krizo aperos tia kia ĝi estas : sperto en vera grandeco, la demonstrado de la esence propra malbonfaro de la merkatoj, kaj de merkataj agantoj, ekster ĉia kontrolo. Sed tiu sperto ne estas la unua de tiu speco, kaj ŝajnas ke oni neniam tiras ian instruon de ĝi.

Ĉu la Interret-bankroto de 2000 [8] ne ludis al ni jam la bombastajn scenojn de la krudeco kaj fraŭdo, de la solena alvoko al travideblo, al regulado kaj al la reintegrado de la eksterbilancaĵoj ? „Neniam plu tion”, ĵuris ĉiufoje la financo, kiam ĝi ekiris por nova rondiro. Sed ĝiaj ebriaj ĵuroj kaj la plej aflikta ideo ke ĝi fabele kaj sole riĉigas sin dum la altiĝo, poste endanĝerigas la tutan ekonomion dum eksplodo de ĝiaj malkapabloj, kaj por fini devigas la publikajn potencojn savi al ĝi la vetaĵon tie kie oni lasus fali ian ajn ordinaran bankrotulon, furioze emigas frakasi la budon, ŝajne la sola solvo por ke tio estu vere la „lasta fojo”.

Iom pli analiza bilanco de la „plenumadoj” de la malreguligita financo, kie la kaŭzitaj malutiloj estas videble tiom pli grandaj ol la faritaj servoj, devus almenaŭ konvinki pri la urĝeco rompi kelkajn radarojn de ĝi. Kontraste al kion oni diras, ne mankas ideoj pri tio. La Tobin-imposto estis unu, antaŭtempe forgesita. En sia propra registro, la SLAM[Shareholder Limited Authorized Margin (SLAM), aŭ permesita limigita akcia marĝeno. Vd „Fine dispono kontraŭ la ekscesoj de la financo, la SLAM !”, Le Monde diplomatique en Esperanto, februaro 2007.]] kiel projekto limigi la permesatan akcian rentabilitaton kaj tiel forigi la instigojn senfine intensigi la ekspluatadon de salajruloj, estas kroma. La skemo de dupartigita monpolitiko, por financi je diversaj interezo-kvotoj la produktan ekonomion kaj la spekulan ekonomion, estas tria. [9] Laŭ la modelo de la Glass-Steagall Act en Usono post la kolapso de la 1930-aj jaroj [10], kial ne pensi pri starigo de hermetika disigo inter komercaj bankoj kaj merkatbankoj ? La inspiro-komuneco kun la antaŭa dispono estas sufiĉe evidenta, nur ke la principo de la hermetika vando havas kiel kroman econ mildigi senteble la transigon de la financaj detruoj al la reala ekonomio, tra la kanalo de la kredito.

Viaj salajroj malaltiĝas ? Enŝuldiĝu !

TIU KIU ŜATUS iri ankoraŭ iom pli profunden povus rimarki ke, se montriĝas ke la franca ekonomio suferos malpli ol aliaj la krizon de la subprime, kiel oni kelkfoje aŭdas, tio estas ĉefe ĉar ĝi iris malpli antaŭen ol aliaj en la ĝeneraligita malreguligado... al kiu puŝas nin tamen kun fervoro la „reformistoj”, liberaluloj kaj socialistoj kune ! Plej rimarkindas ilia konstanteco de la nun kvardek-kvin jara ardo per kiu ili lanĉis la „grandan transformiĝon” - kaj kiu ne ĉesis montri siajn malutilojn. Oni kontraŭdiros ke ĝi ne malutilas al ĉiuj. Certe. Sed, persista strangaĵo eĉ je dudek-kvin-jara distanco, ĝi malutilas senkonteste ĉiujn tiujn, kiujn la Socialista Partio estas supozata defendi. Ĉar, terura verdikto de la aritmetiko : 2008 - 25 = 1983, do estis „ili” je la povo. Por esti preciza, oni devus kalkuli iom pli larĝe : 1983-1986 - kaj oni miras pri la malmulta tempo bezonata por ŝanĝi la vizaĝon de la franca socio. 1983 : la turniĝo de la ekonomia politiko, sed ĉefe la granda ideologia malriglado (vidu la artikolon de François Denord [p. 18]). 1984, ŝarĝita jaro : unue la ordono de la socialista ĉefministro Laurent Fabius al la publikaj entreprenoj havi kiel celon jam nur la profiton, tiel proklamante la vanecon de ilia statuso de ŝtatigitaj kaj preparante fakte la privatigojn ; poste la eŭropa pintkunveno de Fontainebleau, antaŭĉambro de la Unueca Akto kaj de la „Granda Merkato”, do de la „libera kaj sendifekta konkurenco”. 1986 : la financa malreguligado. Tio multas por tiom malmultaj jaroj.

Certe la franca socio de tiam ne ĉesis manifesti fifaman ribelemon al la plena plenumado de la brila destino tiam fabrikita por ĝi. Je ĝia senkulpigo oni devas rekoni ke la priparolata destino havas la ĝenaĵon vidigi en regulaj intervaloj ke ĝi havas ĉiujn ecojn de plago, „demonstraĵoj" al kiuj la financaj krizoj alportas senkontestan helpon. Tiurilate, la nuna krizo renkontas cetere ĝeneralan konjunkturon de la plej maloportunaj manieroj kaj vidigas sub nova lumo la koherecon, sed en la malutileco, de la „kompleta modelo" kiun oni volus ke ni adaptu ĝin.
Ĉar ĝi faras konstantan premon, kaj senĉese kreskantan, sur la prezoj, do sur la kostoj, kaj fine sur la salajro-koston, la konkurenco starigas efektive reĝimon de „prezo-salajroj" en kiu ĉia diskuto pri la aĉetpovo estas tuj resendata al la sola demando de la prezoj - kiam la salajrulo postulas, oni respondas al la konsumanto... Sed la malaltiĝo de la prezoj kiun oni servas al tiu estas la sama kiu malaltigas la nominalan salajron de la unua ! La salajruloj ĵetitaj surstraten per plano de delokado ne havas alian rimedon ol fari siajn aĉetojn en la hard discount, kiu estas la plej sovaĝa ekstremaĵo de la konkurenca ĉeno, kaj aktivigas precize ĉiujn meĥanismojn kiuj ĵus kaŭzis ilian malbonŝancon. La salajruloj, defendante sin, tiel „pravigas" la sinsekvon kiu mistraktas ilin, kaj kontribuas, manke de ĉia alia solvo, al ĝia daŭrigo.[Vd Serge Halimi, „Wal-Mart, entrepreno de la 21-a jarcento", Le Monde diplomatique en Esperanto, januaro 2006.]] El tiu rimarkinde perversa cirklo rezultas reĝimo de konstanta malalta premo de la aĉetpovo, kiu en la sekvo malvigligas la konsumadon kaj la ĝeneralan postulon.
Sed la liberala modelo flatas sin alporti mem la solvojn al siaj propraj problemoj. Ĉar la rimedo kontraŭ la esence propra konsumo-manko de la konkurenca „prezo-salajro"-reĝimo trudiĝas kiel evidentaĵo: enŝuldiĝo ! Se la aĉetpovo de la mastrumaĵoj stagnas aŭ malkreskas, sed kiam la kapitalo malgraŭ ĉio postulas internajn vendojn, kio estas pli logika ol per kredito etendi la elspezo-povon de la salajruloj trans ilia enspezo ? Oni ne miru ke en Usono kaj Britio, kiuj, sur tiu deklivo, „avancas" je kelkaj korpolongoj, la enŝuldiĝo-kvoto de la mastrumaĵoj proporcie al ilia disponebla enspezo estas respektive je 120 % kaj 140 %...
La prezidanto Nicolas Sarkozy flatas sin ke ne estas tiel en Francio. Sed ĉio kion li faras kondukas tien, aŭ pli ĝuste kondukas pli rapide tien, ĉar tiu kvoto, de 68 % en 2006, laŭvorte eksplodas ekde dek jaroj... dato de instaliĝo en reĝimo de „neta tutmondigo", kiu trovas ĉi tie unu de siaj plej karakterizaj simptomoj. Jen kial la brita kaj usona ekonomioj estas suferontaj pli ol la aliaj : la kredito por konsumado estas tie nepra valvo, kaj tiu pretiĝas al brutala fermiĝo. Kaj jen kial la franca ekonomio estas baldaŭ sekvonta ilin, danke aparte al la meritoplenaj klopodoj de la komisiono Attali, kiu, sendube movata de scienca spirito, planas fari kelkajn etapojn en la konkurenca malreguligado por esti tute certa ke la samaj kaŭzoj sekvigos la samajn efikojn [11]...
Estas tamen en la amasa financa partopreno de la salajrularo ke la liberala kunteniĝo atingas ne supozitajn gradojn de rafiniteco. Simetria deklivo de la fremdigo per ŝuldo, ĉi-foje estas la ŝparaĵo la rimedo. La bankroto de la financ-institucioj ne ĝuste sukcesas larmigi nin... ĝis la momento en kiu oni demandas sin pri la origino de la fondusoj perditaj de ili. Nu, estas ja, parte, per la ŝparaĵo de la salajruloj ke tiuj institucioj ludas kaj perdas. Ankaŭ ĉi tie, la franca kazo daŭre estas relative escepta, ĉar la plej multaj salajruloj havas apenaŭ la rimedojn por iri transe de sia ŝparlibro kaj nur la plej bonstataj aliras la merkat-investojn - per kiuj cetere la spekulaj akcidentoj, kiuj punas ĉefe la duajn, havas la neatenditajn ecojn redukti la malegalecojn. Bonŝance ankaŭ tie la ekzemplon montras la britaj-usonaj ekonomioj, kiuj havis la interesan ideon ĵeti tra la fenestro la sistemojn de solidara pensio por kapti eksterordinarajn amasojn da salajrula ŝparaĵo puŝita sur la merkaton tra la pensio-fondusoj. Aparta ĉarmo de la „financa universaleco": estas ĉiuj salajruloj kiuj suferas kiam la merkatoj plonĝas. S-ro Sarkozy ankoraŭ ne estas ĉe la pensi-fondusoj - almenaŭ laŭ la ago... -, sed la ideo de la „stok-opcioj por ĉiuj" estas ja el la sama metalo. Trovi anstataŭaĵon por la rekta salajro - kies altigo, oni nun bone komprenis, jam ne estas sur la tagordo - estas jam per si mem fraŭda manovro, sed realigi ĝin elmetante la salajrulojn rekte al la malstabilecoj de la financo, kaj provante igi ilin solidaraj kun tio kio, en la plej multaj kazoj, submetas ilin, tio estas multo, eĉ iomete tro.
Kaptitaj en la maŝo de la konkurenco, kiu malaltigas la prezojn nur per malaltigo de la salajroj, en la servuto de enŝuldiĝo fariĝinta same necesa por vivi kiel la enspezo por vivi, la salajruloj havas, por kroni ĉion, la ŝancon esti turmentataj je siaj kostoj, ĉar la ŝparaĵo kiun uzas la akcia financo, tiu kiu postulas senfinan profiton, tiu ŝparaĵo estas ja la ilia ! Kaj la perverseco limas ĉe estetiko kiam, unuflanke, ĉiuj akcidentoj de la financo estas destinitaj fali sur ili, ĉar estas ili kiuj pagos la kresko-perdojn, kaj kiam - belega finalo -, fariĝas malpermesate tuŝi kion ajn de la financaj strukturoj kun la kialo - bone pravigita,

jen la plej fia! - ke tio signifus atenci iliajn pensiojn. En tiu perfekta kaptilo, ataki la financan rentabilitaton, ĉu tio ne signifus ataki la pension de la maljunuloj ?

Ni estu justaj : ne estas nur azenoj aŭ sciplenaj simioj flanke de la liberalismo, kiuj ripetas en maŝo la kred-artikolojn de la merkat-kantiko. Kiel ofte, la plej efikaj de ĝiaj subtenoj ne estas nepre la plej videblaj. Tiuj lasas al la iom naiva entuziasmo de la deĵorantaj ekonomikistoj la zorgon realigi la transfiguriĝon al „naturscienco de la merkatoj" opiniata temanta nur pri „proponoj" kaj „postuloj", kaj do supozata pura de ĉia ideologio aŭ de ĉia politiko, de procezo de transformado de la kapitalismo kiu estas nur ideologio kaj politiko ! Tiu klarvida - kaj aganta - cinikismo, kiu faras intense politikon tie kie la ekonomikismo obstinas en neado kaj ripetas ke la merkatoj estas afero nur de la neŭtrala „mastrumado de la aferoj", siavice perfekte komprenis ke estis politika ekonomio de la financigo. Riskigi la salajrulojn en la financon estas ĝia strategio, kaj ĝi estas terura. Kiel pli bone sanktigi la kapital-merkatojn ol igi la salajrulojn solidaraj kun ties „bonfaroj" ? Rekonstrui iliajn interesojn tra la financo, ĉu tio ne signifas rekonstrui la salajrularon kiel objektivan subtenanton de la financigo ?

Kompreneble, tiu „solidareco" estas tiu de la ĉevalo de la alaŭdo en la samnoma pasteĉo : kelkaj eroj da financa partopreno kontraŭ servuto nun akirita por eterne. [12] Kaj krome, la akcia servuto devenas de abstraktaj, malproksimaj meĥanismoj, kaj kiuj scias forgesigi sin, dum la paneroj pezas je konkreta pezo kiu povas sufiĉi por kredigi ke „tuŝi la financon" signifas „tuŝi la interesojn de la salajruloj"...

Estas kompreneble ke iuj, kiel S-ro Denis Kessler, kiun oni metus prefere en la kategorion de la cinikuloj ol en tiun de la mirstultuloj, revas tutlaŭte ke la kaptilo, ankoraŭ nekompleta en Francio, ĉar ankoraŭ mankas la pensi-fondusoj, ĝia plej perversa parto, estu kiom eble plej rapide finfarota. Estas malpli bone komprenebla ke la socialista kandidatino ĉe la prezidant-elektoj de 2007, sendube helpata de la tre honora bilanco de la maldekstro rilate financigon, povis proponi pri tio etendi la akciularon de salajruloj kaj la kapitaligitan pension surbaze de la Rezervo-fonduso por pensioj. [13] Kaj ne videblas ke de tiam okazis la plej eta konsciiĝo pri tio en la Socialista Partio. Estas vere ke ni „festas" ilian dudek-kvin-jariĝon de bela kontinueco...

## NOTOJ

[1] Per kiuj ĝi provizas la privatajn bankojn je disponebla mono.

[2] Kie alloga avantaĝa interezokvoto estas donita dum la du unuaj jaroj, antaŭ altigo al „plena kvoto" dum la dudek-ok sekvantaj...

[3] Kie la lokaj kolektivaĵoj havas la eblecon financi sin elmetante titolojn sur la merkatoj.

[4] Vd „Comment la finance a tué Moulinex [Kiel la financo mortigis Moulinex]", *Le Monde diplomatique*, marto 2004.

[5] Eldonoj de titoloj (akcioj, obligacioj...) por iliaj klientoj.

[6] „Message à nos clients [Mesaĝo al niaj klientoj]", reklamo de la Société Générale aperinta en *Les Echos*, Parizo, 4-a de februaro 2008.

[7] *Le Figaro*, Parizo, 25-a de januaro 2008.

[8] En Parizo, la indico CAC 40 pasis de 6.922 poentoj la 4-an de septembro 2000 al 2.403 poentoj la 12-an de marto 2003, do falo de 65 % en du jaroj kaj duono. La 6-an de februaro 2008, la indico CAC 40 situis ĉirkaŭ 4.800 poentoj.

[9] Vd http://www.monde-diplomatique.fr/2007/09/LORDON/15165 en la franca.

[10] Abolita de s-ro William Clinton en 1998...

[11] La komisiono por la liberigo de la franca kresko, prezidata de s-ro Jacques Attali, instalita de la prezidanto de la respubliko la 30-an de aŭgusto 2007, rekomendas malreguligi la protektatajn profesiojn kaj favorigi la individuan aŭ kolektivan ŝparo-pension.

[12] Vd Antoine Rémond, „L'épargne salariale ou comment flexibiliser les salaires ?", *Le Monde diplomatique*, junio 2006.

[13] Starigita de la ĉefministro Lionel Jospin en 1999, la Rezervo-Fonduso por Pensioj [Fonds de réserve pour les retraites (FRR)] funkcias fakte kiel pensi-fonduso.

Klarigo de kelkaj „fivortoj"

**Subprime**: speco de nemoveblaĵ-kreditoj donataj al depruntantoj kun pagipovo tre duba, eĉ nekonata de la banksistemo.

**Titoligo**: transformado de bankkreditoj al kreditaj titoloj negoceblaj en la merkatoj.

**Derivaĵoj de subprime**: produktoj starigitaj per titoligo de nemoveblaĵ-kreditoj de la speco subprime.

**Reset**: instrumento de la banka merkatado por allogi la kandidatojn por depruntο je tre avantaĝaj interezo-kvotoj dum la du unuaj jaroj... antaŭ la reniveligo por la tuta restodaŭro de la prunto.


**Interbanka mondisponeblo** kapablo de la bankoj prunti al si reciproke monon.

**Kuntiriĝo de kredito** maloftiĝo de la propono de bankkreditoj sekve al financa ŝoko.

**Refinancado**: operacio per kiu la privataj bankoj provizas sin je disponebla mono ĉe centra banko.

**Monolines**: specialigita institucio kiu asekuras la posedantojn de obligacioj (ĝenerale de fondusoj aŭ de bankoj).

**Private equity** operacio de integra repreno - kaj forigo el la Borso - de entrepreno, aĉetita helpe de kapitaloj esence pruntitaj, draste restrukturata kaj revendata post tri aŭ kvar jaroj.



Noam Chomsky

# Demokratio kaj merkatoj en la Nova Tutmonda Ordo: Ĝenerala ekonomia krizo

**Avram Noam CHOMSKY** [*A*V*ra*m NOŬM ĈOMski], en esperanto **Noamo Ĉomskio** (naskiĝinta la 7an de decembro, 1928) estas usona lingvisto, filozofo, politika aktivulo, aŭtoro, kaj prelegisto. Li estas Institucia Profesoro emerita kaj profesoro emerita pri lingvoscienco ĉe la Masaĉuseca Instituto de Teknologio. Chomsky estas bone konata en la akademia kaj scienca komunumo kiel la patro de la moderna lingvoscienco. Ekde la 1960aj jaroj, li konatiĝas pli vaste kiel politika malsamkredanto, anarĥiisto, kaj liberecana socialista intelektulo.
Ekde sia kontraŭo al la Vjetnama Milito, Chomsky establis sin kiel elstaran kritikanton de usona politiko, kaj internacia kaj enlanda. Li estas mempriskribita adepto de liberecisma socialismo, kiun li konsideras, "la ĝusta kaj natura plivastigo de klasika liberalismo en la epoko de progresinta industria socio."

La ĉefaj faktoroj kondukintaj al la nuna tutmonda ekonomia krizo estas sufiĉe bone kompreneblaj. Iu el tiuj faktoroj estas la ĝeneraligo aŭ tutmondiĝo de la produktado, kiu prezentis al la entreprenistoj la stimulan perspectivon igi retroiri la venkojn en homaj rajtoj konkeritaj de la okcidentaj laboristoj "*kiuj devas forlasi siajn "**luksajn vivstilojn**" kaj tiajn "**merkat-rigidecojn**" kiel labora sekureco kaj aliaj anakronismaj stultaĵoj"*. Iuj ekonomikistoj emfazas ke la labora fluo estas malfacile taksebla, sed tiu-ĉi estas eta parto de la problemo. La minaco sufiĉas por ke la laboristoj akceptu pli malaltajn salajrojn, pli longajn labor-tagojn, malpli da sekureco kaj aliajn tiutipajn "nefleks-eblaĵojn". La fino de la Malvarma Milito kiu reportis plejparton el la Orienta Eŭropo al ĝia tradidia rolo de servuto, metas novajn armilojn en la manojn de la mastroj, laŭ informas la presaro de la entreprenistoj kun senbrida ĝojo. **General Motors** kaj **Volkswagen** povas deloki la produktadon al iu Tria Mondo restarigita en Oriento, kie ili povas trovi laboristojn laŭ frakcia kosto de la "dorlotitaj okcidentaj laboristoj", krome ricevante la profiton de altaj protektismaj tarifoj kaj aliaj sinekuroj kiujn la "liberaj merkatoj reale ekzistantaj" provizas por la riĉuloj. Usono kaj Britio gvidas la procezon de dispremi la malriĉulojn kaj la laboristaron, sed aliaj estos trenitaj, dank' al la tutmonda integriĝo.
Kaj dum la meza familia enspezo daŭre malaltiĝas, eĉ sub la kondiĉoj de malrapida rekuperado, la revuo *Fortune* malice festas la "brilajn" beneficojn de la *Fortune 500* spit' al la stagnita kreskiĝo de la vendado. La realo de la "magra kaj malbona epoko" estas ke la lando troviĝas inundita en kapitalo –sed en la konvenaj manoj–. Revenis la malegaleco al la niveloj kiujn ĝi havis antaŭ la Dua MondMilito, kvankam LatinAmeriko havas la plej malbonan historion en la mondo, dank' al nia bonkora protekto. Kiel la TutMonda Banko –inter aliaj– rekonas, iu relativa egaleco kaj elspezoj por la sano estas signifaj faktoroj por la ekonomia kreskiĝo (eĉ ne menciante la viv-kvaliton). Sed tiu institucio daŭre agadas por pligrandigi la malegalecon kaj subfosi la socian elspezon, favore al la "permanentaj interesoj".
Dua faktoro en la nuna katastrofo de la ŝtata kapitalismo kiu lasis trionon el la tutmonda loĝantaro preskaŭ sen vivrimedoj, estas la granda eksplodo de la financa kapitalo ne regulita ekde kiam la sistemo *Bretton Woods* estis detruita antaŭ dudek jarojn, kun eble biliono da dolaroj ĉiutage fluante. Ankaŭ ĝia konstituo ŝanĝiĝis radikale. Antaŭ tio ke la sistemo estis detruita de Richard Nixon, ĉirkaŭ 90% el la kapitalo en internaciaj interŝanĝoj estis por la investado kaj la komerco, la 10% por spekulado. Ĉirkaŭ la jaro 1990 tiuj procentoj estis renversitaj. Iu informo de la **Konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj pri Komerco kaj Disvolvado** estimas ke la 95% el la kapitalo estas nun uzata por financ-spekulado. En la jaro 1978, kiam la efiko estis jam perceptebla, la Nobel-premiito pri Ekonomio, James Tobin, sugestis en la diskurso de sia prezidanteco de la **Asocio de Usonaj Ekonomikistoj** ke oni devus konstitui impostojn por malakceligi la spekulajn fluojn, kiuj kondukus la mondon al iu ekonomio de magra kreskiĝo, malaltaj salajroj kaj altaj kapital-profitoj. Nuntempe, tiu-ĉi punkto estas amplekse rekonata; iu studo estrita de Paŭl Volcker, antaŭa estro de la Federacia Rezervo, atribuas al la pliigo de la spekulado proksimume duonon el la baza malakcelado en la ekonomia kreskiĝo ekde la komenco de la 70aj jaroj.
Ĝenerale, la mondo estas nun pelata al ekonomia modelo laŭ la tipo de la Tria Mondo, fare de laŭintenca politiko de ŝtato kaj la korporacioj, kun sektoroj de ega riĉeco, grandamasa mizero kaj granda superflua loĝantaro, senigita je ĉiu rajto ĉar ĝi kontribuas nenion al la generado de profito, la sola homa valoro.
La superflua loĝantaro devas esti tenata nescia, sed ĝi ankaŭ devas esti kontrolata. Tiu-ĉi problemo estas alfrontata rekt-maniere en la dominioj de la Tria Mondo kiuj estis dumlonge submetitaj al la kontrolo de Okcidento, kaj, pro tio, ili pli klare respegulas la valorojn de la sistemo: la preferataj kontrol-meĥanismoj grandskale inkludas teroron, mortig-eskadronojn, la "socia purigado" kaj aliaj metodoj de garantiita efiko. Ĉitie, la preferata metodo estis enfermi la superfluan loĝantaron en urbaj getoj kiuj pli kaj pli similas al koncentrejoj. Se tio ne sufiĉas, oni sendas ilin al prizonoj, kiuj estas la ekvivalento en pli riĉaj socioj al la mortig-eskadronoj kiuj ni trejnas kaj apogas en niaj dominioj. Sub la entuziasmaj reaganistoj de la ŝtata povo, la nombro da enkarcerigitoj en Usono triobliĝis, tre preterpasante niajn ĉefajn konkurantojn en tiu afero: Sud-


Afriko, Rusio… kaj se okazas ke nun Rusio denove estas je nia nivelo, tio okazas pro tio ke tiu lando komencis alpreni la usonajn valorojn.
La "milito de la drogoj" kiu estas grandmezure fraŭda, utilis kiel ĉefa meĥanismo por enprizonigi la nedezir-itan loĝantaron. Iu nova kriminala leĝaro devus plifaciligi la procezon, kun ties juĝprocedoj multe pli severaj. Estas bone ricevataj ankaŭ la novaj kaj enormaj elspezoj por prizonoj kiel kroma kejnesa ekonomia stimulo. "La entreprenoj enspezas", skribas la *Wall Strreet Journal*, rekonante iun novan manieron melki la publikon en ĉi tiu "konservativa" epoko. Inter la beneficantoj troviĝas la industrio de la konstruado, leĝaj konsultejoj, la floranta kaj profitdona komplekso de privataj karceroj, "la plej elstaraj nomoj de la financoj", kiaj Goldman Sachs, Prudential kaj aliaj, konkurante por konstrui privatajn malliberejojn liberaj je impostoj; kaj, ĉefe "la sektoro de la defendo" (*Westinghouse* ktp), "priflarante novan negocan terenon" en la kontrolo de alta teknologio kaj kontrol-sistemoj laŭ la tipo kiun *Big Brother* estus admirinda.
Ne estas surprizo ke la programo de Gingrich faras alvokon al la etendiĝo de ĉi tiu milito kontraŭ la mal-riĉuloj. La milito estas speciale adresita kontraŭ la afrik-usonanoj; la intima rilato inter raso kaj soci-klaso simple igas la proceduron pli naturan. La nigr-rasaj homoj estas konsiderataj kiel kriminala loĝantaro, konklu-das la krimologo William Chambliss, aŭtoro de multaj studoj, inkludante la rektan observadon fare de stu-dentoj kaj profesoroj en iu projekto kun la polico de Washington. Ĉi tio ne estas tute ĝusta; supozeble la krim-uloj ĝuas konstituciajn rajtojn, sed kiel montras la studojn de Chambliss kaj aliaj, ĉi tio ne estas reala por tiuj kolektivoj elektitaj kiel celpunkto, kiuj estas traktataj kvazaŭ loĝantaro sub militista okupado.
La nigruloj konstituas celon speciale bonelektita ĉar ili estas sendefendaj. Kaj la generado de timo kaj malamo estas, kompreneble, iu normala modelo de kontrolo de la loĝantaro, ĉu nigruloj, judoj, sam-seksemuloj aŭ si-mile. Ĉi tiuj estas la bazaj argumentoj, ŝajne, por la kresko de tio kion Chambliss nomas "la industrio de la kontrolo de la krimo". Ne estas tio ke la krimo ne estas reala minaco por la sekureco kaj la supervivado; ĝi ja estas tia, kaj tiel estis dum longa tempo. Sed oni ne alfrontas la kaŭzojn; male, la krimo estas ekspluatado diversmaniere kiel metodo de kontrolo de la loĝantaro.
Ĝenerale, estas la plej vundeblaj sektoroj, kiuj estas suferante la krimajn atakojn. La geinfanoj estas alia natura celo. La afero estis pritraktita de kelkaj gravaj studoj, unu el ili estas iu enketo de 1993 de la **Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Urĝa Helpo al Infanoj (UNICEF),** realigita de la usona ekonomistino Silvia Ann Hewlett, titolita *la neglektado pri la geinfanoj en la riĉaj socioj*. Studinte la lastajn dek-kvin jarojn, Hewlett perceptas grandan diferencon inter la angl-usonaj socioj kaj ties de la kontinenta Eŭropo kaj Japanio. La mo-delo angl-usona, skribas Hewlett, estas "katastrofa" por la geinfanoj kaj familioj; la eŭrop-japana modelo, male, konsiderinde plibonigis ilian situacion. Same kiel aliaj, Hewlett atribuas la "fiaskon" angl-usonan al la ideologia prefero pri la "liberaj merkatoj". Sed ĉi tio estas nur duon-vero, kiel mi menciis. Ĉiu ajn nomo kiun oni volus asigni al la superreganta ideologio, estas maljuste malpurigi la bonan nomon de "konservativeco", aplikante ĝin al ĉi tiu formo de reakcia, perforta kaj eksterleĝa ŝtatismo, kun ties malapreco pri la demokratio kaj la homaj rajtoj, kaj ankaŭ al la merkatoj.
Flankenlasante la kaŭzojn, ne estas dubo pri la efiko de tio kion Hewlett nomas "la kontraŭinfana spirito reg-anta en ĉi tiuj teritorioj", ĉefe en Usono kaj Britio. La "angl-usona modelo plen-neglekta" privatigis grand-skale la servojn de okupiĝo pri la geinfanoj, lasante ilin for de la kontakto kun la plejmulto de la loĝantaro. La rezulto estas katastrofa por geinfanoj kaj familioj, dum en la "eŭropa modelo, kiu estas multe pli zorgema", la socia politiko plifortigis la apogsistemojn por ili.
Iu altnivela komisiono de la ŝtataj Eduk-Konsilantaroj kaj de la ***American Medical Association*** substrekis ke "neniam antaŭe iu generacio de geinfanoj estis malpli sana, malpli zorgita aŭ malpli preparita por la vivo ol siaj gepatroj en la sama aĝo"; sed tio estas nur en la angl-usonaj socioj, kie "iu kontraŭinfana kaj kontraŭ-familia spirito superregis dum dek-kvin jarojn sub la aspekto de "konservativismo" kaj de la familiaj valoroj, iu doktrina venko kiun ĉiu ajn diktatoro admirus.
Iomgrade, la katastrofo estas la simpla rezulto de la malkreskiĝantaj salajroj. Por grandparto el la loĝantaro, ambaŭ gepatroj devas kromlabori dum ekstra tempo nur por provizi la neceson. Kaj la forigo de la "rigidecoj de la merkato signifas ke oni devas labori ekstrajn horojn por pli malaltaj salajroj –se ne, la sekvoj estas neantaŭvideblaj-. La tempo dum kiu la gepatroj kontaktas kun la gefiloj radikale malpliiĝis. Tre ege ampleks-iĝis la uzado de la televido fare de la geinfanoj, geinfanoj enfermitaj, infana alkoholismo kaj drogado, krimo, perforto de kaj kontraŭ geinfanoj, kaj aliaj evidentaj efikoj kontraŭ la sano, la edukado kaj la kapablo partopreni en demokratia socio –aŭ, almenaŭ, la supervivado–.
Ankaŭ ĉi tiuj ne estas leĝoj de la naturo sed sociaj politikoj konscie elpensitaj kun iu konkreta celo: pliriĉigi la *Fortune 500* (la 500 plej riĉaj menciitaj de la revuo **Fortune-H.D.**), ĝuste tion okazantan dum Gingrich kaj similaj senpune predik-difinas kiel "familiaj valoroj", kun la helpo de tiuj kiujn la laborista presaro de la 19a jarcento nomadis "la aĉetita sacerdoteco".
Iuj sekvoj de la milito kontraŭ la geinfanoj kaj la familioj, se ili ricevas grandan atenton, iamaniere estas ins-trua. Lastsemajne, gravaj revuoj tre atentis pri novaj libroj zorg-temante pri malkreskantaj inteligentec-

koeficientoj kaj lerneja efiko. La *New York Times Book Review* dediĉis artikolon nekutime longan al tiu-ĉi kliŝ-temo, verkita de ĝia redaktoro pri sciencoj, Macolm Browne, kiu komencas ĝin per per la averto ke registaroj kaj socioj kiuj ignoras la kliŝojn pritemataj de tiuj libroj "faros tion sub sia propra risko". Estas neniu mencio de la studo de la **UNICEF**, kaj mi ankaŭ ne vidis iun ajn recenzon aliloke –aŭ fakte, de iu ajn studo pritemanta la militon kontraŭ la geinfanoj kaj la familioj en la angl-usonaj socioj–.
Do, kiu estas la demando kiun ni ignoras sub nia propra risko? Okazas ke ĝi estas sufiĉe limigita: eble la inteligentec-koeficiento estas parte heredita, kaj pli malfeliĉe, ligita al la raso, kun nigruloj kiuj naskas kiel kuniklej kaj misigas la genetikan rezervon. Eble la nigr-rasaj patrinoj ne vartas siajn geinfanojn pro tio ke ili disvolviĝis en la varma sed ege neprognozebla de Afriko, sugestas iu el la aŭtoroj de la menciitaj libroj. Ĉi tio estas vera scienco, kiun ni ignoras por nia propra danĝero. Sed ni povas, fakte ni devas ignori la sociajn politikojn por la malriĉuloj kaj la ŝtata protekto por la riĉuloj –bazitaj sur la libera merkato–, kaj la fakto, ekzemple, ke en la urbo kie aperas tiuj materialoj –kiu estas la plej riĉa el la tuta mondo– 40% el la geinfanoj vivadas sub la linio de malriĉeco, senigitaj je la espero eskapi el la mizero. Ĉu tio povus havi ian rilaton kun la stato de la geinfanoj kaj ties atingaĵoj? Ni povas tuj ignori tiajn demandojn –iu natura decido de la riĉuloj kaj potenculoj, sin adresantaj iuj al aliaj kaj celante pravigi la klasmiliton kiuj ili gvidas kaj ties efikoj sur la homoj–. Ne indas pridiskuti la sciencan meriton de tiuj kontribuaĵoj, kion, cetere, mi kaj ankaŭ aliaj, jam faris en aliaj skribaĵoj.
Ĉi tiuj estas iuj el la plej malbelaj formoj de kontrolo de la loĝantaro. En ties plej benigna varianto, la popolaĉo devas esti devojigita al ne problema agado fare de la grandaj institucioj de propagando, organizitaj kaj gviditaj de la entreprenista komunumo, duon-usona, kiu dediĉas enorman kapitalon kaj energion por konverti la personojn en konsumantojn kaj obeantajn ilojn de produktado (se ili ĝuas la bonŝancon trovi laborlokon) -izolitaj iuj de la aliaj, nekonsciaj pri tio kio povus esti iu inda homa vivo. Ĉi tio estas grava. La normalaj homaj sentoj devas esti dispremitaj. Ili ne konformiĝas al ideologio alĝustigita al la neceso de la privilegiuloj kaj la povo, kiu festas la privatan profiton kiel la suprema homa valoro kaj neas la rajtojn de la personoj preter tio kion ĉi-tiu povas savi en la labor-merkato –escepte la riĉulojn, kiuj devas ricevi egan protekton far la ŝtato.
Kune kun la demokratio, ankaŭ la merkatoj estas atakataj. Eĉ flankenlasante la amasan ŝtatan intervenon en Usono kaj en la internacia ekonomio, la kreskanta ekonomia koncentriĝo kaj la kontrolado de la merkato oferas multajn meĥanismojn por eviti kaj subfosi la disciplinon de merkato, iu longa historio kiun ni ne povas pritrakti nun. Sed ni menciu unu solan aspekton, preskaŭ 40% de la "tutmonda komerco" ne estas, reale, komerco; ĝi konsistas el internaj operacioj de la korporacioj, demarŝitaj central-maniere fare de iu mano alte videbla, kun ĉiutipaj meĥanismoj por subfosi la merkatojn favore al la profito kaj la povo. La sistemo preskaŭ-merkantilista de la transnacia korporacia kapitalismo plenas je formoj de konspirado de la superregantoj, pri kiuj avertis Adam Smith, senforgese de la tradicia uzado kaj dependo de la ŝtata povo kaj la publikaj subvencioj. Iu studo de la jaro 1992 de la **Organizaĵo pri Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo** (**OECD**) konkludas ke la "oligo-politika konkurado kaj strategia interagado inter entreprenoj kaj regantaroj, pli ol la nevidebla mano de la fortoj de la merkato, kondiĉas nuntempe la konkurajn avantaĝojn kaj la internacian labor-dividon en la industrioj de alta teknologio", tiaj kiaj la agro-kulturo, farmakologio, servoj kaj aliaj gravaj terenoj de la ekonomio ĝenerale. Plejparto el la tutmonda loĝantaro, kiu troviĝas submetita al la disciplino de la merkato kaj ties propagando, devas ne havi alirecon al tiutipaj studoj; kaj malofte konas ilin.
Mi timas ke ĉi tio apenaŭ tuŝas la surfacon de la afero. Estas facile kompreni la staton de senespero, angoro, ĉagreno kaj timo kiuj regas en la mondo, for de la riĉegaj kaj privilegiitaj sektoroj kaj de la "la aĉetita sacerdoteco" kiuj kantas laŭdojn al nia prodigemo, iu notinda karakteraĵo de nia "nuntempa kulturo", se oni povas formuli senhonte tiun frazon.
Antaŭ 170 jaroj, tre zorgo-plena pri la destino de la demokratia eksperimento, Thomas Jefferson faris utilan distingon inter "aristokratoj" kaj "demokratoj". La "aristokratoj" estis tiuj kiuj pli multe malkonfidas pri la personoj kaj volas senigi ilin el ĉiuj povoj por meti ilin en la manojn de la altaj soci-klasoj. La demokratoj, male, "identiĝis kun la personoj, konfidas je ili, laŭdas ilin, kaj konsideras ilin kiel la honestan kaj firman gardanton de la publika intereso", se ne ĉiam "la plej saĝaj". La aristokratoj de tiu epoko estis la protagonistoj de la naskiĝanta kapitalista ŝtato, kiun Jefferson konsternita konsideris agnoskante la kontraŭdiron inter demokratio kaj kapitalismo, kiu estas multe pli evidenta nuntempe, kiam privataj tiranioj senkontrole akiras ekster-ordinaran povon sur ĉiuj aspektoj de la vivo.
Kiel ĉiam pasintece, oni povas elekti esti demokrato laŭ la senco de Jefferson, aŭ aristokrato. La dua vojo oferas riĉajn premiojn, laŭ la loko de la riĉeco, privilegio kaj povo, kaj la natura celo serĉata. La alia vojo estas plena je batalado, ofte malvenko, sed ankaŭ premioj kiuj ne povas esti komprenataj de tiuj cedantaj al tio kion la laborista presaro denoncis antaŭ 150 jarojn kiel "la Nova Spirito de la Epoko": "Gajnu riĉecon, forgesante ĉion escepte vian propraĵon".
La hodiaŭa mondo malproksimas de tiu de la epoko de Thomas Jefferson aŭ de la laboristoj de la mezo de la 19a jarcento. Sed, la alternativoj kiujn ĝi oferas, esence ne ŝanĝiĝis.

JOSÉ COMBLIN, KREINTO DE LA TEOLOGIO DE LIBERIGO:

# LA ROM-KATOLIKA EKLEZIO ELEKTIS LA RIĈULOJN

Teksto publikigita en la revuo ***El Periodista***, numero 200, de la 30a de decembro 2010



Josefo Comblin naskiĝis en Bruselo en 1923. Hodiaŭ, estante 87-jara, li alvenis al Ĉilio, same kiel li faris en 1972, kiam forpelita el Brazilo, kie li loĝis, tiu-ĉi belga pastro, unu el la kreintoj de la Teologio de Liberigo, estis devigita foriri kaj serĉi rifuĝejon en la lando de la Popola Unuiĝo.
Li estas katolika pastro de antaŭ 60 jarojn, kaj venis al Ameriko tial ke li estis elreviĝinta pri la eŭropa eklezio, "kun fasado ankoraŭ impona sed kie mankis la evangelio", kaj trovis lian okazon kiam la papo Pio la 12a petis pastrojn "por batali kontraŭ la komunismo de Latin-Ameriko". Post lia restado en Ĉilio, li revenis al Brazilo. Li verkis libron denoncante la usonan doktrinon de la landa sekureco kio altiris al li novan forigon. Li revenis al Brazilo kie li loĝas ekde la jaro 1980. La sekva intervjuo estis farita al li fine de la jaro 2010.

D: Vi bone konas Ĉilion kaj la animojn de la ĉilianoj. Ĉu ni estas bone? Ĉu vi vidas nin feliĉaj aŭ senprizorgaj?

R: "Feliĉaj. Eble pro tio ke mi estis kun feliĉaj personoj, ŝajnas ne ekzisti priokupiĝo. Ili ne parolis multe pri la dujarcentiĝo, mi ne scias ĉu eble ne estis granda festado, sed la ĉilianoj estas la angloj de Latin-Ameriko. Ili ne estas tre riĉ-temperamentaj".

D: En la 60aj kaj 70aj jaroj, kun la tuta ekspansio de la teologio de Liberigo, ĉu vi imagis al vi ĉi tiun mondon?

R: "Tiam estis ega intereso pri la ekonomio. Ankaŭ ne oni pensadis ke la estonteco estus kulto al tiu pri-ekonomia intereso. Neniu povis imagi tian evoluon."

D: Kio restas el la teologio de Liberigo?

R: "La teologoj de Liberigo aĝas pli ol 80 jarojn kaj ne aperis nova generacio. La subpremo estis tre forta, terura kaj la diktaturo de la Papo ĉi tie en Latin-Ameriko estas totala kaj ĉiuaspekta. Ĉi tie oni povas kritiki Dion, sed ne la Papon. La Papo estas pli dia ol Dio. Ĉio ajn veninta el Eŭropo estas radikale aplikata ĉi tie, aliflanke, la papo Johano Paŭlo la 2a, elektis tutan serion da disciplinitaj, submetitaj, obeemaj episkopoj, tiamaniere ke rezultas malfacile trovi en Latin-Ameriko iun episkopon kun ia personeco, ili estis elektitaj ĝuste pro tio ke ili ne havis personecon. Jen la rezulto: submetitaj.
La Teologio de Liberigo ne estis favore vidata kaj la Papo estis la granda malamiko kaj kontraŭulo. Nek en la seminarioj nek en la fakultatoj pri teologio oni povas paroli pri tio. Do, aperis nova generacio kiu konsideras ke tio estas pasinteca afero, ke tio jam mortis, finiĝis. Ne plu estas interesa. Por la nova generacio de episkopoj kaj pastroj, tio jam ne plu ekzistas".

D: Kiel vi vidas la situacion de la kristanaj komunumoj de bazo, ĉu ili daŭre havas forton hodiaŭ?

R: "Estas same, kie estas iu maljuna pastro, ili daŭras. La junuloj ne interesiĝas nek komprenas. La komunumoj pluekzistas kie ankoraŭ restas pastroj kiuj travivis tion, kiuj kreis tion".

D: Kio okazos al ĉi tiu Eklezio, kiu estas ĝia ĉefa intereso hodiaŭ kaj kiu estas la ebleco de ĉi tio konsiderante ke ne kapablis transformi tiun institucion?

R: "En la popola mondo, en Centr-Ameriko 50% el la loĝantaro apartenas al la protestanta Evangelia Eklezio. En aliaj landoj, estas 30%. La Rom-Katolika Eklezio forlasis la popolajn sociklasojn, escepte la maljunuloj, iuj restaĵoj de pasinta epoko kiel Mariano Puga, en la novaj generacioj ne eblas trovi tiajn personecojn. Estas neniu intereso, krom iuj diskursoj aŭ belaj vortoj. En la praktiko, ne. Hodiaŭ la katolikaj universitatoj kaj lernejoj estas por la burĝaro. La estonteco de Latin-Ameriko estas fariĝi protestant-evangelia kontinento, escepte la alta klaso. La ***Opus Dei*** kaj la Legianoj de Kristo, kaj ĉiuj tiaj ekzistantaj asocioj de ekstrema dekstraro senĉese kreskas en tiu socia sektoro".

D: Kiu estas via opinio pri ĉi tiuj asocioj kiujn vi menciis?

R: "Ĉi tiuj ĝuas la konfidon de la roma kurio kaj krome ili reprezentas la plenan liberecon donita al personecoj kiuj estas kiel la grandaj Rockefeller, la konkerantoj, kiel Escrivá de Balaguer kiu estis kapitalisto, la homo kiu venkos, kiu estos riĉa, potenca kaj kiu kapablas krei personojn tute submetitajn, soldatojn kun soldata menso, ĉi ĉiuj estas homoj psikologie deformitaj, kiel estas la estontaj diktatoroj, Maciel de la Legianoj de Kristo, pri kiu oni malkovris ke li havis paralelan vivon, li estis homo kiu kapa-

blis krei fortunon je 50 mil milionoj da dolaroj. Lia ĉantaĝo, lia vorto kaj liaj postuloj alvenis al la milionuloj. Hodiaŭ, ĉiuj kiuj laboris kun li asertas ke ili sciis nenion pri lia paralela vivo… Do, ĉu ili sciis nenion pri tio ke li havis familion, tri filojn, ke praktikis pederastion kun infanoj de siaj lernejoj, ke havis multajn amantinojn…? Ĉu liaj kunlaborantoj dum 40 jaroj ne sciis ion pri tio? Supozeble ankaŭ ili estas kunkulpaj kaj havas, ankaŭ ili, paralelan vivon.

D: Kiel ili konservas la povon kaj la sekretismon?

R: "Tie, kie estas unu aŭ du episkopoj de la ***Opus Dei***, ili timigas ĉiujn ceterajn. La aliaj restas silentaj kaj nur unu parolas, tio konstituas iun tipan problemon de socia psikologio de la diktaturoj".

D: Ĉu la transiro de Johano Paŭlo la 2a al Benedikto la 16a altiris vian atenton aŭ ĉio restas senŝanĝa?

R: "Estas la samo".

D: Sed ĉu vi ne supozis ke ĉio estus pli malbone?

R: "Okazas ke ambaŭ estis elektitaj far la samaj personoj. Estis la ***Opus Dei*** kiu elektis la antaŭan kaj la nunan papon, praktikante ĉantaĝon, timigante la kardinalojn. La sekvonta Papo estos same ĉar la ***Opus Dei*** havas tre fortan povon. Ĉio daŭras preskaŭ senŝanĝa. La nuna papo interesiĝas pli pri la doktrino kaj, ja, li ne havas la simpation kaj la karismon de Johano Paŭlo la 2a, kio estis io eksterordinara, sed ĝenerale estas la neado de la 2a Vatikana Koncilio".

D: Kie estas Dio kiu permesis ĉio ĉi?

R: "Dio, kie li estas? Li estas en la homoj, en la malriĉaj kvartaloj, en la prizono, sed de Romo li malaperis antaŭ multe da tempo. Estas tie iuj episkopoj eksterordinaraj, bonaj, afablaj… sed oni ne povas prezenti tie iun problemon, tie ne, la papo decidas kaj ne estas diskutebla, eĉ ne ***top secret***".

D: Preter la forta subpremo de ĉi tiu vatikana diktaturo kiun vi mencias, kiu estas via memkritiko kiel kreinto de la Teologio de Liberigo, kiu ne povis generi heredaĵon, disvolviĝon, kio okazis?

R: "Estas klare ke oni esperis kun iluzio ke la 2a Vatikana Koncilio estus praktikata kaj ne okazis tiele. Estis granda konfido pri tio, tre estis necesa la ŝanĝo, sed esperi ĝin estis subtaksi la superregantajn fortojn de la Rom-katolika Eklezio. Nun estas pli kaj pli klare ke la problemo estas la Papo, t.e. la Papa rolo aŭ funkcio, iu senbrida diktaturo kun multaj formoj de dolĉeco kaj mildeco, sed senbrida. Kiel latinamerikanoj, ni ne kritikis la tradician submetiĝon al la Papo nek atentigis pri tio ke la ĉefa problemo de la Rom-Katolika Eklezio estas la papo, kaj foje Paŭlo la 6a konsciis pri tio, sed li sentis timon pri la sekvoj kaj same Johano Paŭlo la 2a. La Papo ne povas koni la realaĵojn de ĉiu lando: kaj tre gravas la konsilanto. La mem-kritiko estas tro esti konfidintaj je la 2a Vatikana Koncilio."

D: Kaj kion vi devus esti farintaj, ĉu oportune rompi la Eklezion?

R: "Tiumomente, en Europo, la krítiko centriĝas en la Papon sed en Latina-Ameriko, ne eblas diri tion en la ĉilia Eklezio, neniu komprenus kion signifas tio. Iuj jezuitoj scius, iuj aliaj religiuloj, iuj maljunaj pastroj… sed ili dirus nenion, kvankam ili povas malkovri kaj pripensi tion, sed ankoraŭ ne. Estas malfacile prognozi tion kio okazos. Mi pensas ke estos granda ŝoko kiam oni konstatos ke la kontinento transformiĝos en protestantan.
Estas iu psikologia rezisto, timo alfrontiĝi kun io, do oni forevitas ĝin. Ĉi tiu estas la ĉefa defio kaj estas pro tio ke oni devus agnoski ke ili elektis la riĉulojn, decidis resti kun la alta klaso, kun la burĝaro kaj tio estas evidenta sed ili volas ne tion vidi. En Ĉilio tio estas pli ol evidenta, estas eksterordinara la disvolviĝo kiun havas en la katolikaj universitatoj la lernejoj de la ***Opus Dei*** kaj la Legianoj.
Miaflanke, mi konsideras ke la estonteco de la kristanismo estas en Ĉinio, Koreujo, Filipino, Indonezio. Oni kalkulas ke nur en Ĉinio estas 130 milionoj da kristanoj, martirigitaj ĉar ili fakte estas persekutataj. En Brazilo no estas tiu kvanto, estus malfacile trovi 30 milionojn. Preskaŭ ĉiuj estas protestantaj evangelianoj".

D: Si al vi eblus diri ion al centoj da junaj pastroj, se vi povus paroli rekte kun ili kaj malfermi iliajn okulojn al ĉi tiu situacio, kion vi dirus al ili?

R: "Mi dirus al ili: iru loĝi en la urb-kvartalojn por koni la realon, ĉar se vi ne konas tion restas nur vortoj. Nia aliancano estas la realaĵo; tiu kiu ne vidas la realon ne vidas tion kio estas la homaro. Li restas kun vortoj kaj diskursoj, sed povas krei nenion. Estas neniu recepto, sed se vi irus tien pro tio ke vi havas kapon kaj koron, vi malkovrus tion kion oni devus fari".

D: Kaj kion vi opinias pri la kanonizado de Johano Paŭlo la 2a, kiel li faris kun monsinjoro Escrivá de Balaguer?

R: "La papec-periodo de Johano Paŭlo la 2a estis katastrofa. Ĉiuj kiuj faris sian eklezian karieron kun li povis esti kardinaloj spit' al ties persona mezvaloro. Ili meritis nenion sed li promociis ilin, kompreneble ke nun ili volas kanonizi lin! Post tio ke estis kanonizita Escrivá de Balaguer, ĉiuj scias ke oni povas esti sanktulo eĉ havante neniun ajn virton".

# JOSE COMBLIN, Pioniro de la Teologio de Liberigo.

## Intervjuo de CARLOS PERESA kaj EVARISTO VILLAR, en la revuo *Exodo*



D: Kiam ni asertas ke «alia mondo eblas», kion ni volas diri?

R: Mi respondus tion kion diris iu indiĝena gvatemala virino: «tiu alia mondo jam ekzistas, sed kaŝita meze de la malriĉuloj.» En la komunikiloj oni temas ĉiam pri la malriĉuloj negativ-maniere, kiel tiuj kiuj ne havas posedaĵojn, kiuj ne havas kulturon, kiuj ne povas manĝi… Vidate de ekstere, la mondo de la malriĉuloj estas plena je negativeco. Tamen, vidate de interne, la mondo de la malriĉuloj havas vitalecon, ili batalas por supervivadi, inventas neformalajn laboraĵojn kaj konstruas iun malsaman civilizacion de solidareco, de personoj kiuj sin rekonas kiel egalaj, kun propraj esprimo-formoj. Inkludante la arton kaj la poezion. Mi konis barakojn konstruitajn super la maro en Salvatoro, kie loĝas multaj miloj da personoj sub tre nestabilaj kondiĉoj, eĉ kun la danĝero fali en akvon. Sed la personoj vivadas tie kun ĝojo, kun konscienco, kun malfermo kaj kun pacienco kiuj estas la renverso de la mondo de la riĉuloj.
Oni realigas tion kion diras Jesuo; la Regno de Dio estas tie kaŝita meze de la malriĉuloj, sed estas necesaj iuj figuroj profet-tipaj por reakiri la esperon, la konfidon. Estas kiel la gisto, kiu estas necesa por fermentigi la mason. Kie ne estas profetoj restas kiel frustracio, sed ekde la momento kiam aperas iu inspirita persono leviĝas iu nova sperto. Kaj tiam estas multaj lokoj kie troviĝas tiu popolo, kiu estas tiu alternativa mondo.

D. De tiu alia mondo de la malriĉuloj, ĉu eblas alfronti la nunan novliberalan mondon?

R. Ĉiuj imperioj restis detruitaj pro internaj bataloj aŭ pro tio ke alia pli forta imperio preterpasis ilin, kiel povus esti baldaŭ la kazo de Ĉinio. Ne estos la teologio kiu detruos la imperiojn; ĉi tiuj detruas sin mem aŭ inter ili…, sed ni ne scias kiam. Do, la alia mondo ne naskiĝas pro tio ke fiaskos la nuna mondo, sed pro la enkonduko de nova mondo de plej malsupre. Ĉio bona, ekzistanta en la moderna demokratio, reale naskiĝis en la mezepokaj urboj. En ili estis la malriĉaj kamparanoj, kiuj estis fuĝintaj el la kamparo kaj formis proprajn komunumojn, sukcesinte krei novajn formojn je kulturo, ĝis kiam la moderna kapitalismo detruis ĉiun sendependencon kaj aŭtonomion de la urboj.

D. Kiun rolon estas ludante la RomKatolika Eklezio en ĉi tiu situacio?

R. La «alia mondo» de Porto Alegre estas aperante, sed la RomKatolika Eklezio iras alidirekten. La opcio favore al la malriĉuloj estas forgesita kaj oni praktikadas ian burĝan religion, tre kompromisitan kun burĝaj movadoj, kiel la ***Opus Dei***, la Legianoj de Kristo aŭ Komunio kaj Liberado. La nuna Eklezio situiĝas for de la Dia regno kaj dediĉiĝas kultivadi la religiajn sentojn de la superreganta klaso, de la privilegiuloj de la sistemo. Mi konis alian Eklezion en la epoko de Helder Cámara aŭ Leonidas Proaño, kiuj situiĝis ene de la mondo de la malriĉuloj kaj donadis al ĉi tiuj esperon... Sed la Eklezio de Romo havas kiel solan zorgon konservi sian povon kaj la evoluo de la episkoparo dum la lasta jardekoj estas plorinda.
Iam mi legis en iu libro de Freire instruo-plenan anekdoton pri la konfes-prenanto de Pio la 12a, kiu estis profesoro pri Historio en la Gregoria Universitato kaj kiu, kiel konfes-prenanto de la Papo, povis koni ĉiujn ĉi ties mensogojn per kiu li trompadis sin mem, kaj tiam skrib-deklaris en sia testamento «ke la RomKatolika Eklezio estas kvazaŭ mezepoka kastelo, ĉirkaŭita de akvo; la kastelo havas ponton, sed oni levis ĝin kaj oni fermis la pordon, oni forĵetis la ŝlosilon, oni enfermis enen kaj jam ne eblas ŝanĝi».

D. Ĵus finiĝis la Unua Tutmonda Forumo de Teologio de Liberigo. Kiel vi taksas ĉi tiun formon de teologio en la nuna situacio?

R. Antaŭ 30 aŭ 40 jarojn, kiam aperis la Teologio de Liberigo, la ideo estis veki ĉiujn fortojn de la kristana popolo por eniri en la revolucian movadon ekzistantan en tiu epoko. De tiam okazis granda transformiĝo:

Unue, la esperita revolucio evidentiĝis neebla kaj la sistemo fariĝis multe pli forta ol estis tiam. La nuna imperio estis komenciĝanta antaŭ kvardek jaroj, sed nuntempe la grandaj korporacioj, la mult-nacioj, okupas ĉion. La hispana Telefon-firmao troviĝas en tuta SudAmeriko, la Banko de Santander estas aĉetante la plej bonajn bankojn en Ĉilio, ĉi tie en Brazilo aŭ en Meksiko... Do, Hispanio estas rekonkerante LatinAmerikon, kiel parto de la kapitalista sistemo ĝenerale.

Due, la popolo amase elmigris el la kamparo al la urboj, ka en la suburboj pli malfacilas krei sociajn kaj komunitarajn interrilatojn; la personoj troviĝas pli disaj tie. Do oni devas repensadi konsiderante tiujn defiojn. Kaj esti meze de ĉi tiu popolo marĝ-enita, kiu batalas ĝuste por krei ian kulturon de supervivado. Oni devas repensi tion kaj imagi kiu estas la rolo kiun povas ludi la kristanoj tie. Sed la Katolika Eklezio tute forestas en la suburboj kaj delasis tiun spacon al la evangelianoj. En Rio-de-Ĵanejro la gejunuloj alvenintaj el la kamparo havas du alternativojn: aŭ ili fariĝas evangelianoj aŭ eniras en la drog-trafikadon.

La kardinalo de Rio, Eugenio Salas, batalis kon-traŭ la bazaj komunumoj, kontraŭ ĉiu popola evangeliado, kaj la rezulto estis granda malgrand-iĝo de la nombro da katolikoj. Por multaj brazila episkopoj, ĉiu baza komunumo estis komunista, ĉio estis marksismo, kaj la teologio de liberigo nura marksismo. En Brazilo estas nuntempe al-menaŭ 2.000 profesoroj de Teologio, sed oni ne multe aŭdas ilian voĉon. La teologio estas paraliz-ita, senkonscia pri la mondo en kiu ĝi vivas, kaj tio okazas ĉefe pro la kontrolo de la ortodokseco, kiun oni faras en la Fakultatoj de Teologio. Tial, mankas nova generacio de teologiistoj de liberigo startante de la nuna situacio, kiu estas tre mal-simila al ties de antaŭ 30 jaroj.

D. Vi diras ke la junuloj ne prenis la torĉon de la teologio de liberigo, sed 35.000 gejunuloj tend-umas en la 5a Tutmonda Socia Forumo.

R. Jes, jes, sed oni ne vidas multe da teologio en tio; temas pri laikaj movadoj, movadoj de pro-fesiuloj, de gestudentoj, sed vere..., oni ne aŭdas multajn teologiajn voĉojn en tio. Ekzemple, en la "Sen-Terula" Movado ne estas multe da teologio. Oni invitas min por kursoj kaj prelegoj tiutipaj, sed mi estas tre maljuna; oni ne vidas multe la ju-najn teologiistojn interesitaj partopreni en tiuj mo-vadoj. En la Tutmonda Socia Forumo partoprenas iuj episkopoj, kiel Don Demetrio, de Porto-Alegre, aŭ Samuel Ruiz, de Chiapas..., sed plejparto el la episkopoj ne nur ne ĉeestas, sed krome ili inspiras en la pastraron la ĝeneralan ideon ke tiuj aferoj estas danĝeraj, ne tre ortodoksaj; al la Papo ne plaĉas tiuj aferoj.

Estas ankaŭ iu movado de kontestado-diskutado, sed la kristana voĉo estas multe pli malforta ol an-taŭ 30 aŭ 40 jaroj. La komunumoj de bazo tre mal-grandiĝis je graveco kaj socia ĉeesto, ĉar ili ne ĝuis la apogon de la episkopoj kaj la pastroj. Oni intencis rekuperi, enkonduki enen de la tradician parokejan sistemon... kaj leviĝis malmultaj pro-fetaj voĉoj por fortikigi la komunumojn de bazo.

D. Kion vi opinias pri la ĵusa emeritiĝo de Ca-saldáliga?

R. Estos tre granda manko. Ankoraŭ ekzistas epis-kopoj profetoj, kiuj parolas klare. Estas Tomás Balduino aŭ Demetrio..., sed li estas la unua. Ca-saldáliga estas la voĉo, kiu ankoraŭ parolas since-re, spontane kaj tute libere. Li estas imitinda ne nur de la katolikoj sed de la tuta socio, kaj lia prestiĝo kaj influo estas tre granda. Romo punadis lin dum lia tuta episkopa vivo, oni senĉese kontro-lis lin kaj li havis sennombrajn konfliktojn. Li kapablis rezisti ĉar en tiu epoko li ĝuis la apogon de Kardinalo Arns. La kurio de Romo ne kuraĝis simple demeti lin tial ke la reago estus enorma. Sed nuntempe jam ne plu estas tiele. La episkopa asembleo radikale ŝanĝiĝis, tute romiĝis. Se li de-vus komenci nun, li ne trovus apogon, sed li jam estas maljuna kaj, pro tio oni lin respektas; sed se li estus komencanta tio ne eblus.

D. Lula estas figuro pri kiu ekde Hispanio oni vidas kun intereso. Kiel vi taksas lin ekde Brazilo?

R. Lula gravas, sed li ne estas la registaro. La reg-istaro estas la Partio de la Laboristoj, kio estas nura nomo, ĉar ja ĝi ne estas partio de la labor-istoj. Plejparto, 70% el la anoj de la partio estas publikaj funkciuloj, do, ĉiuj pagataj de la ŝtato. Ili ne estas laboristoj, ne estas kampuloj kaj la estraro de la partio prenis antaŭ 10 jaroj tre klaran op-cion: «ni volas la povon kun ajna kondiĉo». Ĉiu ajn estu la kondiĉo, ni volas la povon. Kaj kiel di-ris konfidence la Prezidento: «Se oni devas iri de-kstren, la partio iros dekstren». Kaj tiam, fakte ili pretiĝis por ĝui la apogon aŭ, almenaŭ, la toleron de la grandaj Bankoj, de la tutmondaj korporacioj, kaj tiele la balot-kampanjo estis daŭra mesaĝo de paco, trankvilo kaj dialogo sen iu ajn konflicto; t. e. neniu konflikto kun iu forto. Nek kun la Bankoj, nek kun la MonFonduso, nek kun la terposedantoj, nek kun la multnaciaj korporacioj... Nenia kon-flikto! Kaj, fakte, ĉiuj ĉi fortoj feliĉas.

La Bankoj neniam gajnis tiom kiom nuntempe. Do la multnaciaj korporacioj povas aĉeti ĉi tie ĉion kion ili volas kaj disvastiĝi tre multe, ĉar la partio jam prenis tiun decidon, kvankam ne komunikis tion al la partia membraro. Do la partianoj restis kun la penso ke ili volis la socialismon, alian socion kaj simile. Sed la gvidantaro de la partio jam pretigis sian programon antaŭ 10 jaroj. Multaj lideroj forlasis la partion; ili ne plu eltenis, ĉar ili vidas la orientiĝon kiun prenas la afero. Rilate al Lula, li estas la popola figuro kiu permesas al ili havi ian popolan konsenton, li estas ilia plej efika propagando, la plej bona propagando de la sistemo, sed ne estas li kiu regas, ne estas li kiu ellaboras la politikon. Krome, li akceptas tiun rolon, ĉar li estas laŭtradicie intertraktanto. Komence, kiel sindikatisto, li lernis intertrakti, fari interakordoj kun la entreprenistoj. Kaj li ĝuste tion faras. En la industrio de la aŭtomobilo li havis ian kapablon intertrakti, sed antaŭ la tutmondaj korporacioj, la MonFonduso aŭ la Bankoj..., kiun kapablon li havas? Tie la intertraktado ĉiam finas per kapitulaco.

D. Ĉu ne estas pozitivaj aspektoj en la politiko de Lula?

R. Estas pozitivaj aspektoj. Unu el ili, la batalo kontraŭ la korupto. Ŝajnas ke kun lia registaro estas malpli da korupto, kvankam lia serĉo de aliancoj kun aliaj partioj eble ne multe permesos tion. La plej bona en la Partio de la Laboristoj estas ĝia laboro en la municipoj, kie ili havis urbestrojn; tie ili povis esti pli kreivaj, ĉar tio ne multe interesas al la multnacioj kaj al la grandaj povoj.
Sed je la nivelo de la centra registaro de Brazilo, eĉ Frei Betto, lia kamarado de antaŭ multaj jaroj, forlasis lin ĉar jam ne plu povas akcepti lian novliberalan ekonomian orientiĝon. Li subtenis la esperon ke la aferoj povus ŝanĝiĝi, sed li ne kapablis elteni plu. Jam de antaŭ unu jaro li volis forlasi la registaron, sed oni tre insistis al li, kaj, fine, li decidis ke li jam ne plu povis elteni.

D. Kaj la programo kontraŭ la malsato?

R. La orientiĝo de tiu programo tre estis debatita. Doni manĝaĵon al la malsatantoj estas la solvo de la tradicia burĝaro; oni donas almozon, manĝaĵon, sed oni solvas neniun problemon. Altgrade, tio trankviligas ilin, demetas stimulojn; kaj multaj kontentiĝas. Tamen, ekde la regantaro oni impulsas neniun programon por mobilizi la popolajn fortojn. Ĉiu kontakto kun la laboristoj estas por diri al ili: «Paciencu, paciencu. La transformado ne fariĝas dum unu jaro, oni faras ĝin lante», t. e. fakte ili malmobilizas. La rezulto estas ke ekzistas neniu antagonismo inter la popola mondo kaj la korporacioj, inter la industrio kaj la bankoj.
Kio okazas? Okazas nenio: pri la temo de edukado, nenio; pri la saneco, nenio. Ĉar la ĉefaĵo estas pagi la ŝuldojn. Kaj la interezoj restas altegaj, tiamaniere ke la Bankoj neniam gajnis tiom da mono kiom nuntempe, neniam. Kaj la ŝuldo de la pasinta jaro kreskis 100.000 milionoj da realoj. Tial jam estas popolaj sektoroj, kiuj komencas plendi kontraŭ Lula, kiel oni povis aŭdi en la manifestacioj de la Tutmonda Socia Forumo. En multaj popolaj kunsidoj Lula komencas esti kritikita, ĉar post du jaroj komenciĝas senpacienco.

D. Kaj pri la Prezidento de Venezuelo, Hugo Chávez, kion vi opinias?

R. Mi ne estis en Venezuelo lasttempe, sed li estas figuro tre diskutita. Li estas tre karisma, tre senorda, sed li estas la unua kiu faris ion en Venezuelo favore al la malriĉuloj, al la kamparanoj, kaj pro tio ili apogas lin kaj estis tiom da manifestacioj. La nafto estis kontrolita de sindikatoj tute venditaj al la internaciaj entreprenoj kaj li estis la unua reganto de Venezuelo kiu rekuperis la nafton.
Ĝis kiam li intervenis, fortuno de miloj de milionoj da dolaroj eskapis el la lando kaj li, fakte, rekuperis ĝin, kaj la nafto helpas plibonigi la situacion de la malriĉuloj. Ĉiukaze, Chávez havas tiun meriton, estis li la unua kiu faris ion por alfrontiĝi kun la burĝaro, kun la bankoj, kun la informiloj.
Ĉio kontraŭis lin. Kaj ankaŭ la Eklezio estis kontraŭ li en la unua vico, liderante la kampanjojn kontraŭ Hugo Chávez. Sed, spit' al ĉio ĉi, la popolo apogis lin, kio estas altsignifa. Nun oni ne scias ĉu li kapablos reale transformi la strukturojn, sed la signoj estas pozitivaj.

D. En la Tutmonda Socia Forumo oni klamas kontraŭ la okupado de Irako far Usono. Kiel vi tak-sas la novan doktrinon de preventa milito?

R. La milito de Irako estis la unua aplikado de la nova usona doktrino. Ĝis 2002, oficiale, Usono ne estis anstataŭinte la doktrinon de Truman kiel geopolitika strategio. La «doktrino Truman», difinita en 1947, metis kiel celon de la usona politiko la re-teno de la komunismo kaj pravigis la militon de Koreujo kaj sennombrajn militajn intervenojn en ĉiuj kontinentoj, sed kun la dissolviĝo de Sovetunio la komunismo ĉesis esti grava minaco. En septembro de 2002 la prezidento Bush anoncis «novan geopolitikan doktrinon», kiu prezentas la neceson de «preventaj militoj» kontraŭ ĉiu ajn

ebla minaco al la usona lidereco. Ne temas pri respondo al agreso, sed malebligi ĝin. Usono ne tolerus la formadon de iu ajn potenco, kiu povus minaci sian plejsuperecon. Estis la oficiala proklamo de la usona imperiismo por ke estu nenia dubo.

D. Kaj vi pensas ke tia imperiismo povas esti pravigita nuntempe?


R. Samkiel ĉiuj imperioj, Usono submaskas siajn intencojn kaj sin pravigas antaŭ la mondo per la promeso esti la gardisto de la mondpaco. En LatinAmeriko la konkero de la tero de la indiĝenoj ĉiam estis pravigita per la «pacigado»: la konkero mem estis faro de pacigo laŭ la imperiala ideologio de la konkerantoj.
Usono iris al Irako cele porti la pacon, kvankam ĝi ne estu akceptata de plejparto el ĝiaj loĝantoj. Sed la mesaĝo estis adresita al ĉiuj arabaj kaj muzulmanaj landoj ĝenerale. Okupinte Afganion kaj Irakon, Usono posedas reton da militistaj bazoj de kie ĝi kontrolas tutan MezOrienton kaj Centr-Azion. Kompreneble, la popoloj de la regiono ne facile akceptos ĉi tiun situacion de dependeco, kaj Usono devos sin dediĉi al konstanta subpremado en sia tuta imperio, kio evidentigos la kontraŭdiron inter imperiismo kaj demokratio.
Alia opono venos ankaŭ el la propra usona popolo. Sed la usonaj regantoj kaj la grandaj financaj grupoj, kiuj premas ilin, iras al ilia intereso. Ili jam estis konkerintaj la grandajn naftajn rezervojn de Afriko en Angolo, Gabono, Nigerio, Gvineo, kaj nun ili superregas tutan MezOrienton kaj Centr-Azion, t. e. la iamajn aziajn respublikojn de Sovetunio. Tiele, la granda venkito de la Iraka milito estas Eŭropo, ĉar ĝi dependos el Usono por la naftoprovizado. Iuj eŭropaj regantoj –tute ne Aznar- estis konsciaj pri tiu realo kaj pro tio ili intencis eviti la militon. Ili ne sukcesis en tio kaj la konkludo estas ke Eŭropo ĉesis esti ebla minaco por la ekonomia superregado far Usono.

D. Revene al la olda teologio de liberigo, kiu estas via centra mesaĝo en la lasta libro «La Vojo»?

R. La celo de la libro estas klare apartigi tion, kio estas kristana el tio kio estas religia. «kristano» estas la mesaĝo de JesuKristo, kiu ne estas religia, ne kreas iun novan religion, ne kreas ian religian agadon, sed male, tute detruas la religion de sia popolo. Ja, la personoj bezonas religion, publike esprimi religian senton, sed tio ankoraŭ ne estas la kristanismo. La Eklezio trapasadis laŭlonge de la historio tra kelkaj fazoj: ĝi reenkondukis la Antikvan Testamenton kreante la sacerdotojn kaj reinterpretante la Eŭkaristion kiel ofero; poste ĝi asimilis ankaŭ grandparton el la romia sistemo, la publika religio serve de la ŝtato kaj praviganta ĉi tiun; ĝi enkondukis ankaŭ grandparton el la religio de la germanaj popoloj, el kiu ŝanĝis tre malmulte. La programo de la Papo Gregorio rekomendis al la misiistoj, kiujn li sendadis al Anglujo, sekvan taskon: «Vi iros al la sanktejoj de la paganoj, forigos la idolojn kiujn ili kultas kaj anstataŭigos ilin per figuroj de la sanktuloj». Kaj fakte ili daŭrigis ilian tradician religion kun kristana tegaĵo.
Dum jarcentoj, ekde la alta Mezepoko, oni plenumis tiun aranĝon, kiu, kompreble, faciligis la konkeradon de la eŭropaj ŝtatoj. La episkoparo fermas la okulojn kaj por ili sufiĉas ke la personoj ĉeestu la meson, estu baptataj kaj ricevu la eksteran signon de la Eklezio; sed la praktikata religio, estas tiu de la sanktuloj, iu nova esprimo de iliaj tradiciaj spiritoj, kaj ne la mesaĝo de Jesuo. Tio ne estas kristanismo.

D. Tiukaze, laŭ vi, kiu estas nuntempe tiu vojo de Jesuo?

R. La vojo de Jesuo povas esti esprimata per tri elementoj:
a) La espero, t. e. la espero ke ne nur alia mondo eblas, sed ke ĝi komenciĝas nun. Temas pri movado de ega penado, kiu pasas tra la kruco, tra la enormaj bataloj kiuj povas okazi, sed kie ni havas la konvinkon ke ni estas konstruantaj novan mondon. Ĉi tiu estas la temo de la espero.
b) La elemento de la fido, ĉar ni ricevis la Dian Spiriton, kiu donas al ni forton por labori en la espero. Pro tio la fido estas konfido pri ni mem, ĉar tio kion la malriĉuloj pli bezonas estas la konfido pri si mem, la sento ke ili kapablas konstrui la regnon ĉi tie kaj nun; ja tio estas la revelacio de Jesuo: «La Sankta Spirito venos kaj faros pere de vi pli grandajn farojn ol tiuj kiujn faris mi». Tio estas, la spirito igos vin liberaj, kapablaj agadi, krei kaj renovigi la vivon.
c) La amo, la kunvokiĝo por formi iun fratecon inter la homaj estaĵoj. Tiu estas la fundamenta alvokiĝo de la kristana mesaĝo, kiel diras Sankta Paŭlo: «La fido kaj la espero pasos, ĉio cetera pasos, la sola afero kiu plurestos estas la amo». Do, post la morto, la sola afero kiu plu daŭros estas la amo. La amo, kio estas io konkreta: sin meti serve de alia, de aliaj, ĉefe de tiuj kiuj spertas neceson. Tiel do, «tie, kie ekzistas amo, tie ĉeestas la Dia Regno».




# LA EKSPLODO DE LA MALORDO

## La metropolo kiel scenejo de la tutmonda krizo

**Aŭtoro:** **Ramón Fernández Durán**
**Eldonejo:** **Fundamentos**
**Jaro:** **1993**
**Paĝoj:** **444**
**Prezo:** **17,90 €**


La nuntempa produktad-modelo, kiu sin altrudas kaj respondas al la interesoj de la tiel nomataj landoj de la Centro, generas, en ties disvastiĝado tra la tuta planedo, iun laŭŝajnan ordon kiu pli kaj pli provokas pli grandan ekonomian, socian kaj naturmedian malordon.
Ĉi tiu malordo estas jam plene perceptebla en la teritorioj de la Sudaj kaj Orientaj Periferioj, kie, multkaze, rompiĝas la ŝtataj strukturoj de superregado kaj tre altgrade plikreskiĝas la socia malregadebleco. Sed la "Norda" fortreso, kiu sin defendas ĉiurimede antaŭ la amasa lavango de mizeruloj de la Periferio, ne restos sendamaĝa. La ekonomia kreskado de la okdekaj jaroj disrompis siajn sociajn strukturojn, pliakrigante ĝis neimagebla grado la malegalecon je rento kaj socia marĝeniĝo.
Tiu ĝenerala malordo ĉefe manifestiĝas en la metropoloj, tiel en tius de la Centro kiel en tius de la Periferio, eĉ se ĝi havas malsamajn karakteraĵojn en ambaŭ kazoj. Kaj en tiuj metropoloj la malordo intensiĝos laŭmezure ke la modelo pli kaj pli kolizios kun la diversaj limoj kiujn ĝi atingos dum la sekvaj jardekoj.
Nepras, do, intenci bremsi la katastrofon. Kaj por tio estas necese, laŭ la aŭtoro, intenci transformi la neregadeblecon al antagonismo, kontraŭmetante propran projekton al la projekto de la Povo, de la Sistemo. Sed sciante ke finiĝis la optimismo pri la pozitiva evoluo de la historio, kaj la fido en la industria proletaro kiel sola subjekto de ebla tranformado, dotita de iu historia celo plenumenda. Nur ekde profunda pesimismo pri la estonteco, ekde la akcepto de la multeco de la eblaj subjektoj de rezistado kaj transformado, kaj ekde ia fronta opozicio al la teorio de la kapitalisata moderniĝo kiu permesus aŭtonoman socian rekonstruadon, eblos ellabori novan antagonisman projekton kiu ebligos la modifon de la konscienco, unika formo entrepreni la ŝanĝadon de la realaĵo kiu ĉirkaŭas nin.
Menciindas ke ĉi tiu libro estis eldonita jam en la jaro 1993, do pli ol unu jardeko antaŭ la komenciĝo de la ekonomia krizo kiun ni travivas nun. Tamen, la aŭtoro klare identigis kaj ĝust-taksis la elementojn, aŭ multajn el ili, kiuj rezultis decidaj komponaĵoj de la krizo. Do, por tiuj kiuj volis lerni tiam la realan staton de la socio en kiu ili vivis, la alveninta krizo tute ne estis surprizo.
En kio rilatas al la energi-fontoj la libro estas speciale pesimisma konsiderante la nepran estontan elĉerpiĝon de la krud-materialoj. En la epoko, kiam la libro estis verkita, la tekniko ne estis sufiĉe disvolvigita por prikonseri, kiel oni faras nun, la alternativon de la hidrogeno ellaborata surbaze de suna energio.



**Ramón Fdez. Durán**, Sperta fakulo pri eŭropaj temoj kaj de la tutmonda kapitalismo, hidrokarbidoj, urb-planismo, ekologio, inter aliaj movadoj, kaj aŭtoro de multenombraj libroj kaj artikoloj, estas Civila Inĝeniero, membro de Ekologiistoj aktivistoj, profesoro kunlaboranto de la Universitato Karolo la 3a, sociala aktivisto de antaŭ pli ol tri jardekoj. Lia verkaro pritraktas la problemaron de la ekonomio, ekologio, elĉerpiĝo de krud-materialoj…

# LA GRANDA FINANCA KRIZO

## Kialoj kaj sekvoj




**Aŭtoroj:** John Bellamy kaj Fred Magdoff
**Eldonejo hispana traduko:** Fondo de Cultura Económica
**Jaro:** 2009
**Paĝoj:** 228
**Prezo:** 15 €

La teksto de la libro estas konstituita de serio da artikoloj kiujn la aŭtoroj verkis por la revuo Monthly Review ekde meze de 2006 ĝis la fino de 2008, t. e. dum la jaroj kiam okazas la eksplodo kaj ekspansio de la krizo. Monthly Review estas monata revuo lidera de Maldekstro en Usono ekde 1949.


La libro konsistas el du partoj: kialoj kaj sekvoj de la krizo. La analizo de la kialoj komenciĝas per ĉapitro dediĉita al "La bobelo de la enŝuldiĝo". Ĝi eksplikas kiel la usona kapitalismo intencis solvi la kontraŭdiron kiun enhavas la stagnado de la salajroj fronte al la neceso garantii la konsumon de amasoj kiel nutraĵon por la ekonomia kreskado kaj la investado. Tiun kontraŭdiron oni povis provizore moderigi per la enŝuldiĝo de la familioj. Plejparto el tiu ŝuldo rilatis al la loĝejo. La malaltaj interesoj post la krizo de la jaro 2000 tentis la laboristajn familiojn pli kaj pli hipotekiĝi, kio permesis financi la elspezojn. La amasa plikreskiĝo de la ŝuldo de la familioj estis, do, la plej grava faktoro de la usona ekonomio por provizore eviti la merkata depresio.

La dua ĉapitro, "La eksplodo de la ŝuldo kaj la spekulado", intencas ligi kun la principoj rilate al la ĝenerala tendenco de la matura kapitalismo al la "stagniĝo". Stagniĝo, laŭ la aŭtoroj, ne signifas ke ne ekzistas kreskado, sed ke la ekonomio funkcias sube de sia eblo, kun produktiga kapablo nelabora kaj kun granda senlaboreco kaj sublaboreco. Tiamaniere la kapitalismo de la landoj de la Centro perdas parton el ĝia komenca vigleco kiam finiĝas la periodo de konkurado. La stagniĝo enportas malakceliĝo de la produktiga investado, kiu venas akompanata de la kreskado de "rezidua" agado, kiel la produktado de armiloj. Ekde tiu vidpunkto la aŭtoroj ekzamenas la historian malpliiĝon de la produktiga investado kaj la plikreskado de le ekonomia spekulado en Usono. El tio ili konkludas ke konsiderinda parto el la ŝuldo ne estis investita por la produktado sed por nutri la spekuladon kiu ne utilas por stimuli la produktadon. Kaj tio ne garantias stabilan funkciadon de la sistemo.

En la 3a kaj 4a ĉapitroj la aŭtoroj esploras la fenomenon de la amasa kreskado de la financa kaj spekulanta kapitalo dum la lastaj 30 jaroj kaj konkludas ke tio konstituas novan fazon, kiun oni povas nomi kiel de la "financa monopolista kapitalo".

La dua parto, kiu pretendas priskribi la sekvojn de la krizo, reale dediĉiĝas al la analizado de la fazoj de formado de la bobelo kiu okazigis la krizon. La aŭtoroj de la libro faras la analizadon de la krizo startante de teorio nomata "tezo de la stagniĝo" interpretante la krizon kiel manko de solventeco, ne kiel problemo de pagkapablo.


Eble la parto de la libro dediĉita al la proponoj estas la plej febla. Ĝiaj alternativoj konsistas el nuraj ĝeneralaj pripensoj pri la neceso de la politika ekonomio kaj la batalo por la socialismo.


John Bellamy


Fred Magdoff

La aŭtoroj de ĉi tiu libro estas usonaj universitataj profesoroj, marksistoj kaj verkistoj de multenombraj artikoloj, eseoj kaj libroj pri ekonomio, sociologio, ekologio, politiko…

Grandparto el ilia verkaro estas dediĉata, precize, al la studo de la nuntempa ekonomia krizo kaj la kaŭzoj kiuj provokis ĝin.




# LA REVENO DE LA EKONOMIO DE LA DEPRESIO KAJ LA NUNA KRIZO

**Aŭtoro:** **Paŭl Robin Krugman** ***(NobelPremio pri Ekonomiko en 2008)***

**Eldonejo:** **Crítica**

**Jaro:** **2009**

**Paĝoj:** **204**

**Prezo:** **19,50 €**



**Paul Robin Krugman,** naskiĝis en 1953. Li estas usona ekomikisto kaj ĵurnalisto proksima al la novkejnsa teorio. Nun li estas profesoro de Ekonomio kaj Internaciaj Aferoj en la Universitato de Princeton. En 2004 li ricevis la Premion "Princo de Asturio" de Sociaj Sciencoj kaj en 2008 la NobelPremion pri Ekonomiko.

Krugman estis tre kritika kun la ekonomia politiko la administracio de G. W. Bush. Li ankaŭ estas aŭtoro de gravaj verkoj: 200 artikoloj kaj 21 libroj. Li sciis kompreni kiom multe la ekonomio estas politika, t. e. la interesoj kaj fortoj kiuj moviĝas kaŝfone.

«Dum la lastaj jaroj –diras la aŭtoro- la ekonomioj de sep landoj kiuj koncentras kvaronparton el la tutmonda produktado spertis ekonomian recesion kiu tre similas al la granda depresio de la tridekaj jaroj. Same kiel tiam, la krizo aperis subite meze de serena ĉielo, dum plejparto el la spertuloj daŭre prognocadis senĉesan prosperon, eĉ kiam la recesio akcentiĝis. Same kiel tiam, la konvenciaj ekonomikaj solvoj evidentiĝis senefikaj, eĉ damaĝaj… La fakto mem ke io simila povus okazi nuntempe devus timigi ĉiujn, kiujn estas konsciaj pri la historio». Paul Krugman, profesoro de la ***Massachusetts Institute of Technology*** per tiu ĉi verko oferas al ni profundan analizon de la krizo kiu komenciĝis en Japanio somere de la jaro 1997, etendiĝis poste al Rusio kaj LatinAmeriko kaj restas ankaŭ kiel latenta minaco, por ekspliki al ni tion, kio okazis, detekti la faritajn erarojn kaj montri ke, same kiel en la tridekaj jaroj, la plej granda minaco, kiun ni devos alfronti estas la eraraj ideoj kaj la eksvalidaj doktrinoj kiuj plenigas nian menson.

La libro estas klara kaj facile komprenebla, destinita al ĉiuj kiuj deziras koni la evoluon de la tutmonda ekonomio dum la lasta jardeko kaj kompreni la kompleksajn sekvojn de la tutmondiĝo. Tio, kio estis malproksima fenomeno, nun la ekonomia kaj financa krizo tutmondiĝas kaj ĝia origino troviĝas en la ekonomia koro de la planedo: Usono. Tio, kion ni pensis ke ne povus okazi, okazis. La epoko de prospero malaperis kaj nun la dubo estas ĉu ni troviĝas antaŭ recesio aŭ antaŭ (ĉu granda?) depresio.

La libro, efektive, estas analiza traktato. Ne tiel okupiĝas pri tio kio okazis kiel pro kio ĝi okazis; tio, kio gravas kompreni estas kiel povis okazi ĉi tiu katastrofo, kiel ni povos rekuperiĝi kaj kiel ni povos eviti ke ĝi ripetiĝu. Ankaŭ oni devas danki al Krugman la lingvo-stilon uzita en la libro, kiu permesas ĝian legadon al ĉiu ajn persono.


Komencas sian libron Krugman analizante tion kio okazis en la latinamerikaj krizoj okazintaj ekde la fino de la okdekaj jaroj, en la krizo de Japanio (kiu daŭras ekde la komenciĝo de la naŭdekaj jaroj) kaj en la azia bankroto en 1997.

Lecionoj el kiuj oni devus lerni, tiel la manieron eviti unu krizon, kiel ĉu la agadon kiun oni faris (aŭ oni ne faris) estis ĝustaj por ĝin solvi. Sed tio estis okazanta en la periferio kaj la ekonomia centro sin sentis imuna kaj sin taksis eksterdanĝera rilate al tiutipaj pertutboj (bankrotoj, prezo de la terenoj kaj intereza procento…). Verdire, oni estis generante multe pli grandan malĝustaĵon en la kerno de la sistemo. Krugman analizas la originon de la problemo.

Estas necesaj financaj reformoj. Plej urĝas rekuperi la krediton kaj la konfidon por reimpulsi la aĉetemon. Tiujn kaj aliajn solvojn, kiel ŝanĝojn en la funkciado de la Tutmonda MonFonduso, rekomendas la aŭtoro.

# LA MALĜUSTIĜO DE LA MONDO

## Kiam niaj civilizacioj kadukas




**Aŭtoro:** **Amin Maalouf**
**Tradukis al la hispana:** **María Teresa Gallego Urrutia**
**Eldonejo:** **Alianza Editorial**
**Jaro:** **2009**
**Paĝoj:** **312**
**Prezo:** **20 €**



**Amin Maalouf,** naskiĝis en Libano, en 1949. Li studis ekonomion, politikon kaj sociologion. Li laboris en la ĵurnalo ***An Nahar*** kiel responsulo de la internacia sekcio, kaj kiel tia li vojaĝis al landoj kiel Etiopio, Somalio, Bangladeŝo kaj Vjetnamio. En 1975, kiam eksplodis la milito de Libano, li ekziliĝis al Francio kie li laboris kiel ĉefredaktoro de la revuo ***Jeune Afrique***. Nuntempe li dediĉiĝas nur al la literatura kreado. Li kultivas la rakontado, eseo kaj la opero. Inter la premioj kiujn li ricevis, distingindas la ***Maison de Presse***, pro lia novelo ***Samarkando***, la ***Goncourt***, pro ***La roko de Tanios kaj Princo de Asturio al Beletro 2010***.

La libro ne estas plendediĉita al la ekonomia krizo kaj problemaro, kvankam ĝi sufiĉe pritraktas ankaŭ tiun temon. Sed la verko estas trarigardo al plej ampleksa problemaro de la homaro. Tiuj, kiuj atendis por la jarmil-ŝanĝo mondskalan naturan katastrofon povis trakviliĝi konstatinte ke la vivo pludaŭris same. Dek jarojn poste, ni povas fari bilancon kaj konstati ke la homo tre lertas por generi ĥaoson per si mem. La planedo eniris en periodon de malkonfido inter kulturoj, trairas terurajn ekonomiajn perturbojn, suferas mankon de intelekta lidereco kiu metu finon al situacioj de ekskludado kaj, kiel rezulto de amaso de nekompetenteco kaj nerespondeco, ĝi atingis erodo-punkton kaj eluzon de la naturmedio kiu povus este nerenversigebla. La kompaso de la homaro ŝajnas senmagneta, ĝi montras neniun rumbon. La 21a jarcento komenciĝis kun rimarkindaj simptomoj de suferado de seriozaj malĝustiĝoj. Intelekta malĝustaĵo, konkretita en priidentecaj certigoj kiuj malfaciligas ĉiun harmonian kunekzistadon kaj ĉiun veran debaton. Ekonomia kaj financa malĝustiĝo, kiu trenas la tutan planedon al iu zono de perturboj kun neantaŭvideblaj sekvoj kaj kiu estas per si mem simptomo de perturbo de nia sistemo de valoroj. Klimata malĝustiĝo, rezulte de amaso da eraroj.

La aŭtoro analizas historiajn eventojn sed li ne startas de antaŭlongaj inicoj de la konfliktoj. Male, Maalouf komencas sian raportadon proksimume meze de la pasinta jarcento. Li sin demandas ĉu la homaro atingis la pinton de sia morala nekompetenteco, kaj li intencas kompreni kaj ekspliki kiel oni alvenis al tiu situacio kaj kiel oni povus eliri el ĝi. Laŭ li, la malĝustiĝo de la mondo ne tiel rilatas al la «kolizio de civilizacioj» kiel al la samtempa kadukiĝo de niaj sociaj modeloj. La civilizacioj pri kiuj li ĉefe atentas estas la okcidenta kaj la araba-muzulmana. Al Okcidento, Maalouf akuzas esti malmulte fidela al siaj propraj valoroj. Al la muzulmana mondo, li kritikas esti enfermita en sia historia malsukceso. La kritikoj al Okcidento, do, ne estas pri altrudo de ties valoroj, sed ĝuste male, pro tio ke ne faras tion. Valoroj kiel la libereco aŭ la egaleco havas universalan karakteron kaj ne povas esti submetitaj al kulturaj interpretoj aŭ especifaĵoj. En la rilatoj inter Okcidento kaj aliaj kulturoj, tiuj valoroj ne estis uzitaj; uzis ilin la elitoj de tiuj landoj kontraŭ la okcidenta superreganto. Tamen la konduto de Okcidento ne permesas senkulpigi ĝin.

Spite al la ŝajna pesimismo de sia rezonado, la aŭtoro ne alvenas al totala malespero. Laŭ li, la ĥaosa periodo kiun ni travivas povus alkonduki nin ellabori pli maturan vidon de niaj identecoj, de niaj religiaj kredoj, de niaj diferencoj kaj de la destino de la planedo kiun ĉiuj ni kunhavas.

# Estas la Revolucio!

*Verkis:* **Faustino Castaño**



En monato Majo, kiam jam estis preta la cetera materialo de ĉi tiu revuo, komenciĝis en Hispanio kolosa popola mobilizo kies kulminon oni ne antaŭvidas en la momento efektivigi la eldonon de ĉi 86a numero de **HELECO**. La ĉefa temo de tiu ĉi gazeto estas la tutmonda ekonomia krizo kiu tre damaĝe efikas kontraŭ nia lando, kontraŭ ĉiuj landoj kaj popoloj. Unu el la lastaj artikoloj de nia studo titoliĝas **KION FARI?** kaj sugestas ke estas necese organizi la rezistadon kaj mobilizi la socion fronte al la kontraŭsociaj disponoj de la financfakuloj. Tiu artikolo finiĝas deklarante ke urĝas trovi kaj enkonduki alternativon al ĉi tiu senracia ekonomia sistemo: la kapitalismo.

Nu, ŝajnas kvazaŭ la nuntempa mobilizado de multaj miloj da gehispanoj, ĉefe junaj, estus respondo al la supre menciitaj pripensoj. Kaj ŝajnas ke la afero estis sufiĉe spontana, ne organizita. La amasa popola plendo havis, ja, inicintojn, sed ne organizintojn. Ĉiuj revolucioj alportas ian neatenditan elementon kiu surprizas la defendantojn de la sistemo kaj malpermesas al ĉi tiuj reagi sufiĉe frue por bremsi la aferon dekomence.

Ĉar temas pri vera Revolucio. Vera Revolucio estas tiu kiu subite respegulas drastan ŝanĝon en la pensmaniero de la amasoj kaj samtempe kontribuas pliampleksigi tiun ŝanĝon. Multaj personoj kiuj pasadas sian vivon sopirante al la revolucio kaj penante organizi ĝin, fine ne rekonas ĝin kiam la revolucio prezentiĝas per si mem laŭ maniero tute neatendita, t. e. la maniero laŭ kiu prezentiĝas ĉiu revolucio, ĉar la pripensitaj kaj atenditaj manieroj ne estas eblaj ĝuste pro tio ke la konservativaj fortoj baras la supozitajn vojojn.

Laŭ la mensa skemo de multaj personoj, tiel inter la revoluciaj kiel inter la konservativaj fortoj, la revolucioj estas klasifikeblaj en du grupoj: tiuj kiuj sukcesas kaj tiuj kiuj fiaskas. Kaj sukcesaj revolucioj estas tiuj kiuj provokas la disfalon de la ĝis tiam regantaj fortoj kaj ties anstataŭo fare de la revoluciuloj. Saman skemon oni uzas por pritaksi la kontraŭrevoluciojn. Mi intencos montri ke tiu mensa skemo estas erara. Multaj revolucioj (kaj ankaŭ kontraŭrevolucioj) plenumas sian rolon ŝanĝi la situacion kvankam laŭŝajne la afero rezultas sufokita far la ĝistiamaj kontrolantoj de la povo. Por tion vidi estas necese montri kelkajn historiajn ekzemplojn.

Dum la jaroj 1956 al 1962, en Hispanio, tiam dum la faŝista diktaturo de F. Franko, okazis en la universitatoj grava mobilizado de la gestudentoj, kaj ankaŭ grandaj strikoj de laboristoj, ĉefe en iuj regionoj kiel Asturio kaj Katalunio. Tiun procezon neniu difinus kiel “revolucio”, kaj se iu kuraĝus asigni tiun titolon al la tiama mobililizado sendube tiu sin sentus devigita aldoni ke la revolucio malsukcesis. Ja, la frankismo daŭris post tio ankoraŭ 15 jarojn kaj dum tiu periodo la politika reĝimo sufiĉe bonfartis. Kaj tamen ĝi estis jam kadavro. La mobilizado de la jaroj 1956 al 1962, eĉ se la reĝimo sukcesis sufoki ĝin, montris ke la frankismo havis kotajn piedojn, ĉar ampleksaj sektoroj de la hispana socio neadis legitimecon al tiu reĝimo. Plejparto

el la homoj de la novaj generacioj de ĉi tiu lando ne rekonis tiutipan povon. Do, la heredintojn de tiu povo devis manovri por efektivigi politikajn ŝanĝojn kiuj rezultus pli akcepteblaj por plejparto el la gehispanoj.

La Franca Revolucio de la jaro 1789 estas klasifikita inter la venkintaj revolucioj, kvankam fakte, post kelkaj jaroj tute malaperis la rezulto de tiu venko kaj revenis la reĝa povo al tiu lando. Sed oni devas atenti pri tio ke la decida faktoro de la venko de tiu revolucio ne estis la alpreno de la politika povo far la burĝaro kontraŭ la aristokrataro, nek la teroro kaj la gilotino de la revoluciaj jaro, ĉefe 1793, nek la senkapigo de la Reĝo Ludoviko la 16a kaj ties edzino Maria Antonieta, kaj eĉ ne la solena kaj fama Deklaracio de la Rajtoj de la Homo kaj la Civitano. Ĉio ĉi estis sekvoj, rezultoj de la Revolucio, sed ne faktoroj de la venko de la Revolucio. La vera faktoro de la revolucia venko estis la ŝanĝo kiu estis okazinta en la menso de senĉemizuloj (sans-kulots) de Parizo. La okazintaĵo kiu montris ke la pensmaniero de la francoj estis ŝanĝiĝinta estis la alsalto de la Pariza loĝantaro al la Bastilo. La fakto mem ke tiu alsalto okazis, kvankam ĝi ne estus rezultinta sukcesa, montras ke la francoj estis ĉesintaj kredi je la reĝa povo kaj la Dia Rajto sur kiu la reĝoj intencis bazi sian legitimecon. Estas kondamnita al la disfalo kaj malapero tio pri kio la popolo ĉesas kredi.

Io simila oni povas diri pri la Revolucio en Rusio. Tiu de la jaro 1905 estas klasifikita, laŭ la klasika skemo, kiel fiaskinta, kaj tiuj de la jaro 1917 (en Februaro kaj en Oktobro), kiel sukcesintaj. Sed la decida ŝanĝo estis okazinta la 9an de Januaro de la jaro 1905, la t.n. "sanga dimanĉo". Tiutage okazis manifestacio organizita de la car-lojala popo Georgij Gapon esperante, ke li povus rekte transdoni la peticion de la laboristoj al Nikolao la 2a, kaj gvidis la 80-140 mil partoprenantojn, al la antaŭaĵo de la Vintra Palaco. La marŝantoj kunportis krom la peticio ikonojn kaj bildon de la caroj. En la peticio ili postulis 8-horan labor-tagon, egalecon antaŭ la juĝinstancoj, respondecon de la ministroj, konsciencan liberecon kaj amnestion. Tiu komence paca manifestacio en Sankt-Peterburgo, finiĝis en amasmurdado de senarmilaj, rusaj popolanoj. Per tiu perforta ago de la cara aŭtoritato la rusa monarĥo perdis la fidon kaj estimon de siaj regatoj kaj la legitimecon regi ilin. Kvankam la movado estis tiele sufokita, la rusa monarkio restis kondamnita al pli malpli frua malapero. Eĉ se la bolŝevistoj ne estus atinginte la povon en 1917 la falo de la caroj estis nerenversigebla. Fakte, kvankam jam ne plu ekzistas en tiu lando la komunista reĝimo, neniam la caroj reakiris la povo tie. La rompiĝo inter la caro kaj la rusa popolo okazis en la menso de la rusaj popolanoj.

Oni povus prezenti multajn aliajn ekzemplojn. Mi nur prezentu plurajn por montri ke same okazas kun la kontraŭrevolucioj. La fakto ke la trupoj de la Varsovia Kontrakto sukcesis sufoki kelkajn kontraŭsovetajn movadojn (Hungario-1956, Ĉeĥoslovakio-1968…) ne atestis pri la forto sed pri la febleco de la komunistaj reĝimoj en Orienta Eŭropo. Vidante tiujn okazintaĵojn kaj tiujn aliajn de Polujo en 1981-1982, oni povus prognozi tiam ke la komunistaj reĝimoj ne havus brilan estontecon en tiu terzono. Ja, la jaro 1990 vidis la disfalon de tiu sistemo spite al ĝia ŝajna potenco. En la menso de grandparto el la loĝantaro de tiuj landoj jam estis okazintaj la ŝanĝoj favoraj al la kapitalismo, kaj la fiasko de la okazintaj kontraŭrevolucioj estis nur provizora prokrastiĝo de la fina rezulto.

Estas tre altsignifa ankaŭ la fakto ke dum tiuj kontraŭrevolucioj sukcesis en Orienta Eŭropo, en Ĉinio, en la jaro 1989, estis perforte sufokita, en la Pekina Placo de Tian-An-Men, movado simila al tiuj kiuj venkis en Eŭropo. La komunista reĝimo de Ĉinio rezistis, la kontraŭrevoluciuloj estis masakritaj, La Komunista Partio de tiu lando daŭre kontrolas la povon, kaj tamen… la kapitalismo en tiu lando estas pli forta kaj potenca ol ĉie ajn en la mondo. La kontraŭrevolucio, la kapitalismo, venkis en la menso de la ĉinoj spite al la fiasko de Tian-An-Men.

Nu, venas la momento ekzameni tion, kio estas okazanta en Hispanio. La miloj da gehispanoj kiuj mobiliziĝas ĉi tagoj scias ke en nia lando "la demokratio ne funkcias", tiele diras unu el la sloganoj kiujn ili krias kaj afiŝas. Aliaj sloganoj estas: "reala demokratio, jam", "oni metu finon al la privilegioj de la politikistoj", "alia mondo eblas", "pli gravas la personoj ol la merkatoj", "pluan paŝon al pli bona mondo", "socia revolucio, jam", "oni metu finon al la korupteco de la politika klaso", "la kapitalismo ne estas en krizo, ĝi estas la krizo"…

Pli kaj pli da personoj en Hispanio alvenis al la konkludo ke la du ĉefaj partioj de nia du-partia sistemo fakte havas saman politikon, kontraŭsocian politikon. Oni petas, interalie, ke la sistemo de voĉdonado estu pli proporcia, vere proporcia. En Hispanio la afero de la voĉdonado estas aranĝita tiameniere ke nur la partioj de la sistemo povas atingi sufiĉe da politika povo por regadi la landon. Ambaŭ partioj estas burĝaj kvan-kam unu el ili nomiĝas **Hispana Socialista Laborista Partio**. Krome ekzistas en iuj regionoj iuj partioj, sufiĉe majoritataj tie, kiuj estas naciismaj, sed ankaŭ ili burĝaj. Kaj la pribalota sistemo funkcias per mon-elspezado, kiun povas permesi al si nur la burĝaj partioj. Krome la partiaj kandidataroj por voĉdonado estas decidataj de la propraj partioj. La voĉdonantoj ne povas elekti la preferatajn ene de la listo de ĉiu kandidataro. Se oni ne prenas konvenajn disponojn tiurilate riskas ke pli kaj pli da gecivitanoj perdu la fidon kaj la intereson pri la balotoj. En la balotado de la 22a ĉimonate estis 33 procento da sindeteno aŭ nevoĉdonado. Se tiu procezo plu daŭras sensolva, povos okazi ke laŭ la pasado de la tempo la popolo forlasados la balotejojn same kiel estas forlasante la preĝejojn de la Rom-Katolika Eklezio, alia organizaĵo serve de la kapitalisma sistemo.

Resume. Mi kuraĝas konkludi ke la ŝanĝoj kiujn oni perceptas en la pensmaniero de sufiĉe grava parto el la hispana loĝantaro promesas kaj anoncas la finon de la sistemo tia kia ĝi estas nuntempe, kaj tio sendepende de la disvolviĝo de la  movado mem kaj de la perforto kiun oni povos aranĝi kontraŭ ĝi.



# Kuirante kun Pilar



## Krem-tubetoj

**Ingrediencoj por la pasto**

- 750 gramoj da faruno
- 100 gramoj da oleo
- 100 gramoj da blanka aŭ dolĉa vino
- 100 gramoj da lakto
- Iomete da Salo


**Ingrediencoj por la kremo**

- 3 kuleretoj da maizfaruno
- 1 litro da lakto
- 2 ovo-flavoj
- 250 gramoj da sukero

**ELLABORADO**

Unue oni preparas la pastajn tubetojn, jene: Varmigu paton kun oleo kaj citrona ŝelo. Poste oni lasas ĝin malvarmiĝi kaj tiam oni miksas kaj knedas la ingrediencojn de la pasto. Sekve oni envolvu la paston ĉirkaŭ cilindro por doni al ĝi tuban formon. Fritu la pastajn tubetojn.

Sekve oni preparas la kremon tiele: Oni varmigu la lakton kun iomete da cinamo, citrona ŝelo kaj la lakto. En aparta ujo oni metas iometon da malvarma lakto por dissolvi en ĝin la maizfarunon kaj la ovoflavojn. Kiam la cetero el la lakto bolas oni aldonu al ĝi la enhavon de la alia ujo kaj oni lasas ĉion boli dum iometa plua tempo. Kiam la kremo estas malvarma oni verŝas ĝin en la pastajn tubetojn.




# Dek reguloj por manipulado pere de amas-informiloj




**1. La strategio de la distrado.**

La ĉefa elemento de socia kontrolo estas la strategio de distrado konsistanta en la devojigo de la atento de la publiko el la gravaj problemoj kaj la ŝanĝoj deciditaj de la politikaj kaj ekonomiaj elitoj, pere de la tekniko de superŝutado de senĉesaj distraĵoj kaj sensignifa informado. Tiu strategio same estas nepre necesa por eviti ke la publiko interesiĝu pri esencaj konoj en la tereno de la scienco, la ekonomio, la psikologio…

Teni la publikan atenton for de la sociaj problemoj, allogita de negravaj temoj. Tenadi la publikon okupita, okupita, okupita, sen ajna tempo por pensado…

**2. Krei problemojn kaj poste oferi solvojn.**

Ĉi tiu metodo estas nomata "problemo–reago–solvo". Oni kreas problemon, iun elpensitan situacion por okazigi ian reagon far la publiko, cele de ke ĉi tiu mendu la solvojn kiujn oni volas akceptigi. Ekzemple: lasi disvolviĝi aŭ intensiĝi la urba perforto, aŭ organizi sangajn atencojn, cele de ke la publiko estu la mendanto de leĝoj pri sekureco aŭ politikaj domaĝe al la libereco. Aŭ ankaŭ: krei ekonomian krizon por igi akcepti kiel necesan malbonaĵon la retroiron de la sociaj rajtoj kaj la detruon de la publikaj servoj.






**3. La strategio de la laŭgradeco.**

Por ebligi ke oni akceptu ian neakcepteblan disponon, sufiĉas apliki ĝin laŭgrade, iom-post-iom, dum sinsekvaj jaroj. Tiamaniere sociekonomiaj kondiĉoj radikale novaj (novliberalismo) estis truditaj dum la jardekoj de 1980 kaj 1990: minimuma ŝtat-interveno, privatigoj, labora malstabileco kaj necerteco, amasa senlaboreco, salajroj nesufiĉaj por deca vivmaniero… tiom da ŝanĝoj kiuj estus provokintaj revolucion se oni estus aplikinte ilin dekomence.

**4. La strategio de preterlaso.**

Alia maniero igi akcepti nepopularan decidon estas prezenti ĝin kiel “doloran kaj necesan”, atingante la publikan akcepton, momente, por estonta aplikado. Pli facilas akcepti estontan ol tujan malboniĝon. Unue, ĉar la penado ne okazas ankoraŭ. Poste, ĉar la publiko, la amaso, ĉiam emas naive esperi ke “morgaŭ ĉio iros pli bone” kaj ke la petata penado povos esti evitata. Tio donas al la publiko pli da tempo por alkutimiĝi al la ideo de la ŝanĝo kaj akcepti ĝin rezignacie kiam alvenos la momento.






**5. Adresiĝi al la publiko kvazaŭ al infanaĝuloj.**

Plejparto el la propagando adresita al la granda publiko uzas diskurson, argumentojn, figurojn kaj tonon infanecajn, plejofte proksimajn al febleco, kvazaŭ la spektanto estus infanaĝa aŭ mens-nematura. Ju pli oni volas trompi la spektanton, des pli oni emas alpreni infanigantan tonon. Kial? Se oni adresas al iu persono kvazaŭ ĉi tiu estus 12-jaraĝulo, tiam do, subinflue de sugestio, la persono tre eble rezultus inklina al respondo aŭ reago sen kritika senso, similaj al tiu de vera 12-jarulo.

**6. Uzi la emocian aspekton prefere al la pripensado.**

Fari alvokon al la emocioj estas tekniko por okazigi inhibicion de la racia analiz-kapablo kaj de la kritika senso de la personoj. Aliflanke, la uzado de la emocia kapablo permesas malfermi la pordon de alireco al la subkonscio por tien enplanti aŭ inserti ideojn, dezirojn, timojn kaj kompulsiojn, aŭ instigi kondutojn…





**7. Teni la publikon en nescio kaj idioteco.**

Klopodi ke la publiko estu nekapabla kompreni la teknologiojn kaj metodojn uzitajn por ĝia kontrolo kaj sklaveco. La kvalito de la edukado, informado kaj distrado destinitaj al la malaltaj klasoj devas esti kiel eble plej povraj kaj senkvalitaj, tiamaniere ke la distanco, rilate al la scio, inter la malaltaj kaj la altaj klasoj rezultu tute nesuperebla, neŝanĝebla.

**8. Stimuli la publikon esti komplezema kun la vulgareco.**

Promocii ke le publiko pensu ke estas laŭmoda la fakto esti stulta, vulgara, neklera…

## 9. Plifortigi la memkulpecon.

Igi la individuojn kredi ke nur ili kulpas pri ilia propra malsukceso, rezulte de ilia nesufiĉa inteligento, ilia malkapablo aŭ ilia manko de penlaborado, ke ili estas la responsuloj de ilia malfeliĉa stato.
Tiele, anstataŭ ribeli kontraŭ la ekonomia sistemo, la individuoj sin subtaksas kaj sin kulpigas, kio generas depresian staton, unu el kies efikoj estas la inhibicio de ilia agado. Kaj, sen agado, ne eblas revoluciado!
























## 10. Koni la individuojn pli bone ol ili mem konas sin.

Laŭlonge de la lastaj kvindek jaroj, la senĉesa progresado de la scienco kaj la tekniko generis ege kreskantan breĉon inter la konoj de la publiko kaj tiuj posedataj kaj uzataj de la superregantaj elitoj. Dank' al la biologio, la neŭro-biologio kaj la aplikita psikologio, la "sistemo" ĝuis tre profundan konon pri la homa estaĵo, tiel de fizika kiel de psikologia vidpunkto, la sistemo sukcesis koni la ordinaran individuon pli bone ol ĉi tiu konas sin mem. Ĉi tio signifas ke, plejokaze, la sistemo efektivigas pli grandan povon kaj pli grandan kontrolon sur la individuoj, multe pli grandan ol tiu kiun la individuoj havas sur si mem.


SUFERANTE KUN RIDETO
LA PEZON DE LA HIPOTEKO
Kio estas 30-jara hipoteko?
Garantio de viv-loko kontraŭ misviv-tempodaŭro.
INMOBILIARIA LA BOMBOLLE
Kial vi mallevis la pantalonon? Ja, estas mi kiu vendas la loĝejon.
Okazas ke unue mi devis trakti kun la banko.
Kial vi faras tion? Jocjo
MARTO 2011
CRIIPP!
Patrino diras ke pro la hipoteko la salajro daŭras nur monat-duonon.
Sro. Petro. Ni ne vidis lin de kiam li vendis al ni la domon.
KRIZO
HIPOTEKO
Jes. Mi laboros 12 horojn ĉiutage, kaj ankaŭ dum la semajnfino.
Pri feriado...?
Mi alĝustiĝos al la necesoj de la entrepreno
Neniam mi pensis ke mi devus diri tiujn vortojn.
Kial ne ricevi ni, la direktoroj, krom la kutiman honorarion, kelkajn donacetojn?
Kiuj donacetoj?
Nu, unu jakteton, iujn ĉaledetojn, unu privatan ĉas-rezervejeton...
Finiĝis la bobelo de la konstruado, finiĝis la bobelo de la futbalo. Kio restas al ni?
La bobeloj de la ĉampan-ŝaŭmo.
Dekjara konstru-industria bobelo, Por kio?
Por posedi pli da jaktoj, pli da domoj, pli da milionoj...
Kaj malpli da skrupuloj
Mi estas konstru-entreprenisto kaj oni juĝos min. Mi bezonas lertajn advokatojn.
Nia honorario estas altekosta sed ni ĉiam sukcesas ke venku la leĝo kaj la justeco.
Ho, ne! Mi pagos al vi duoblon por ke okazu tute male .
Sro. Urbestro, ni petas ke oni faru multajn golfejojn.
Sed ĉu vi ne estas ekologiistoj?
Ĝuste pro tio. Ni volas grandan spacon sen betono.

# TRASUFERANTE HUMURE LA EKONOMIAN KRIZON

